# Naomi Klein

# La decido kapitalismo aŭ klimato

## La unua ĉapitro

**Naomi Klein**

# La decido kapitalismo aŭ klimato

# La unua ĉapitro

**Monda Asembleo Socia (MAS)**

Naomi Klein

La decido
kapitalismo aŭ klimato
La unua ĉapitro

Tradukita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)
Embres-et-Castelmaure

2016
ISBN

„Ni devas konsideri, ke nia tasko en tiu ĉi tempo transiras la klimatan ŝanĝiĝon. Ni devas meti niajn celojn pli alten kaj pli malproksimen. Se ni estas al ni tute sinceraj, temas pri tio, ĝisfunde ŝanĝi nian vivmanieron sur tiu ĉi planedo."

*Rebecca Tarbotton*, afergvidanta direktorino de la *Rainforest Action Network*, 1973-2012[1]

„En miaj libroj mi inventis homojn, kiuj saligas la Golfan Fluon, kiuj konstruas digojn por malebligi la deĵeton de glaĉerpartoj el la gronlanda glaciŝildo, kiuj por krei sallagojn pumpas marakvon en la dezertajn basenojn de Saharo kaj de Azio, kiuj por provizi trinkakvon kondukas degelitan glacion el Antarkto norden, kiuj gentehĥnike ŝanĝas bakteriojn por povi en arboradikojn stoki karbodioksidon, kiuj levas Floridon je naŭ metroj, por ke ĝi ree estu super la marnivelo, kaj (la plej malfacila tasko el ĉiuj) kiuj volas radikale transformi la kapitalismon."

*Kim Stanley Robinson*, sciencfikcia aŭtoro, 2012[2]

1 „*Rebecca Tarbotton*", *Rainforest Action Network, http://ran.org/becky*.
2 *Kim Stanley Robinson, „Earth: Under Repair Forever", On Earth*, 3-an de decembro 2012.

# Enhavo

Enkonduko.....8
Tiel aŭ alie, ĉio ŝanĝiĝas.....8
Popolŝoko.....16
Sufiĉe malbona tempoplanado.....27
Potenco, ne nur energio.....37
Ĉeso de neado.....38
Parto 1: Malbona tempplanado.....42
Ĉapitro 1: La dekstruloj pravas: La revolucia forto de la klimatŝanĝo.....43
Nepenseblaj veroj.....51
La kara mono ….....58
Plano B: Per varmiĝanta Tero riĉiĝi.....60
Kio tiom fiigas la klimatneadon.....67
La konservativuloj estas dorlotataj.....70
La milito de la mondperceptoj.....74

# Enkonduko

## Tiel aŭ alie, ĉio ŝanĝiĝas

„La plej multaj prognozoj pri la klimatŝanĝo deiras de la supozo, ke estontaj ŝanĝiĝoj – la ellaso de forcejaj gasoj, temperaturaltiĝoj kaj efikoj kiel la altiĝo de la marnivelo – okazos laŭpaŝe. Ke certa ellaskvanto kondukos al certa temperaturaltiĝo kaj tiu siavice al certa, milda kaj iom-post-ioma altiĝo de la marnivelo. Sed en la historio de la Tero ekzistas ekzemploj por tio, ke relative malgranda ŝanĝiĝo de la klimata elemento sekvigis abruptajn ŝanĝojn en la tuta sistemo. Per aliaj vortoj, la altiĝo de la tutglobaj temperaturoj super certan sojlon povus okazigi abruptajn, neantaŭvideblajn kaj eble neinversigeblajn ŝanĝojn kun ampleksaj kaj eble nehaltigeblaj sekvoj. Ĉe tiu punkto eble lanĉiĝas nehaltigeblaj procezoj, eĉ se ni ne plu aldonas kroman $CO_2$ al la atmosfero. Tio estus, kvazaŭ bremso ne funkcius kaj la stirmeĥanismo blokiĝus, tiel ke ni jam ne kontrolus la problemon kaj ĝiajn sekvojn.”

Raporto de la *American Association for the Advancement of Science*, la mondvaste plej granda scienca socio, en la jaro 2014[1]

„Mi amas la odoron de ellasgasoj.”

*Sarah Palin*, 2011[2]

1 *Mario Malina k.a., „What We Know: The Reality, Risks and Response to Climate Change”, AAAS Climate Science Panel, The American Association for the Advancement of Science*, 2014, p. 15s.

2 *„Sarah Palin Rolls Out at Rolling Thunder Motorcycle Ride”, Fox News,* 29-an de majo 2011.

Tra la aviadilaj laŭtparoliloj la pasaĝeroj de la flugo 3935 de Vaŝingtono al *Charleston*, Sud-Karolinio, estis ĝentile petataj forlasi la aviadilon kune kun siaj manpakaĵoj.

Ili malsupren iris la ponteton kaj kolektiĝis sur la varmega rulvojo. Tie ili malkovris nekutiman scenon: La radoj de sia *US-Airways*-aviadilo estis sinkintaj en la nigran asfalton kvazaŭ en freŝan betonon. Ili sidis tiom firme kaj profunde, ke la tirmaŝino ne kapablis liberigi la aviadilon. La aerkompanio esperis ke la flugmaŝino sen la pezo de la tridek kvin pasaĝeroj pli facile eltireblis. Eraro. Iu interretigis foton: „Kial mia flugo estis nuligita? Ĉar en Vaŝingtono estas tiel damne malvarma, ke nia maŝino sinkis dek centimetrojn profunde en la asfalton.”[3]

Per pli granda, pli forta tirmaŝino oni fine sukcesis eltiri la aviadilon, tiel ke ĝi povis starti kun tri horoj da malfruo. Proparolanto de la flugkompanio respondecis „nekutime altajn temperaturojn” pri la okazaĵo.[4]

En la somero de 2012 efektive estis nekutime varme. (Kiel ankaŭ jam en la antaŭa jaro kaj en la posta jaro.) Kaj la kaŭzo de tio ne estas sekreto: la malŝpara brulado de fosiliaj energiportantoj, ĝuste tio, kion la aerkompanio intencis, kvankam la fandiĝanta asfalto unue malebligis la realigon de la intenco. La ironio de tiu historio – la brulado de fosiliaj energiportantoj ĝuste tiom radikale ŝanĝas la klimaton, ke ĝi malebligas al ni bruligi fosiliajn energiportantojn – ne detenis la pasaĝerojn de la flugo 3935 reeniri kaj daŭrigi sian vojaĝon. Cetere la klimatŝanĝo estis menciita en neniu el la grandaj novaĵraportoj pri tiu okazaĵo.

Mi ne rajtas juĝi pri tiuj pasaĝeroj. Ni ĉiuj, kiuj en ajna loko flegas konsumeman vivostilon, estas figurasence pasaĝeroj de la flugo 3935. Vide al krizo, kiu minacas nian transvivadon kiel specio, nia tuta kulturo simple daŭrigas precize tion, kio kaŭzis tiun krizon, eĉ kun iom pli granda fortelspezo. Same kiel la flugkompanio, kiu uzis tirmaŝinon kun pli forta motoro por eltiri la aviadilon, la monda ekonomio aldon-

3 *Martin Weil, „US Airways Plane Gets Stuck in 'Soft Spot' on Pavement at Reagan National” The Washinton Post,* , 7-an de julio 2012; *„Why Is My Flight cancelled?” Imgur, http://imgur.com.*

4 *Martin Weil*, l.c.

as ion, per tio ke ĝi akiras fosiliajn brulaĵojn jam ne nur el konvenciaj fontoj, sed en eĉ pli malpura kaj pli danĝera maniero – bitumenon el gudrosablo en *Alberta*, oleon el profundmaraj boraĵoj, gason el *fracking*, karbon el eksplodigo de montoj, ktp.

Intertempe ĉiu grava naturkatastrofo produktas novajn paradoksajn instantfotojn de klimato, kiu por precize tiuj industribranĉoj, kiuj respondecas pri ĝia varmigo, donas ĉiam pli malkomfortajn kondiĉojn. Ekzemple la jarcent-inundo de 2013 en *Calgary*, kiu devigis la ĉefetaĝojn de la gudrosablaj entreprenoj en *Alberta* ĉesigi la funkciadon kaj sendi siajn dungitojn hejmen, dum trajno kun ekflamemaj naftoproduktoj sur kolapsanta fervojponto ŝanceliĝis super la abismo. Aŭ la malsekego ĉe Misisipo en la antaŭa jaro, dum kiu la akvonivelo tiom malaltiĝis, ke transportŝipoj ŝarĝitaj per oleo kaj karbo estis dum pluraj tagoj blokitaj kaj atendis ke pioniraj korpusoj de la armeo elkavigu veturkanalon (la rimedoj por tio estis envere destinitaj al disponoj de rekonstruado post la jarcent-inundo jaron antaŭe en la sama loko). Aŭ la karbocentraloj en aliaj landopartoj, kiujn oni devis provizore haltigi, ĉar la riveroj, el kiuj ili normale tiras sian malvarmigan akvon, estis tro varmaj aŭ tro sekiĝintaj (en kelkaj okazoj ambaŭ).

Ni ĉiuj vivas kun tiu kontraŭdiro; tio estas ankaŭ tute ne evitebla, se oni vivas en momento de la historio, en kiu diligente ignorata krizo trafas nin plenfrape – kaj malgraŭ tio ni kun duobla energio daŭrigas tion, kio nur kaŭzis tiun krizon.

Mi pli longe neis la klimatŝanĝon ol mi volus. Kompreneble mi sciis, ke ĝi ekzistas. Ne estis kiel ĉe *Donald Trump* kaj la adeptoj de la *Tea-Party*, kiuj asertas, ke ĉio ĉi estas nura trompo, kio videblas simple jam per tio, ke daŭre okazas vintroj. Sed mi ne okupiĝis pri la detaloj kaj nur superrigardis la tiurilatajn gazet-artikolojn, speciale la vere timigajn. La sciencaj detaloj pri tio estis por mi tro komplikaj, kaj mi diris al mi, ke la mediprotektantoj ja okupiĝas pri tio. Ankaŭ pri mia „elita statuso” de multflugulo, kiun atestas la brila karto en mia monujo, mi trovis nenion riproĉindan.

Multaj el ni tendencas al tiu speco de klimat-neado. Ni mallonge rigardas, poste ni ne plu rigardas. Aŭ ni rigardas kaj faras ŝercon pri ĝi („kroma signo de apokalipso!”). Kio estas nur alia speco de nerigardo.

Aŭ ni rigardas, sed konsolas nin per tio, ke la homo estas inteligenta kaj do inventos ian teĥnikan miraklaĵon kiu sendanĝere elsuĉos la karbondioksidon el la atmosfero aŭ magie bremsos la varmegon de la suno. Kio – kion mi eltrovis ĉe la esploradoj por tiu ĉi libro – estas ankaŭ nur alia maniero de nerigardo.

Aŭ ni rigardas, sed vidas la tuton el ekstreme racia vidpunkto („resume, estas pli efike koncentriĝi al la ekonimia evoluo ol al la klimatŝanĝo, ĉar riĉeco estas la plej bona protekto kontraŭ ekstremaj veteroj"), kvazaŭ kelkaj pliaj dolaroj ŝanĝus ion, kiam la tuta urbo estas sub akvo. Jen tipa maniero de nerigardo de politikaj fakidiotoj.

Aŭ ni rigardas, sed diras al ni, ke en la momento ni havas ion pli gravan por fari ol okupiĝi pri io tiom malproksima kaj abstrakta – kaj ĉe tio ni tamen vidis la akvon en la novjorka metroo kaj la homojn en Nov-Orleano, kiuj sidis sur siaj domtegmentoj, kaj scias, ke neniu estas sekura, plej malmulte la plej malfortaj inter ni. Kaj kiom ajn komprenebla tio estas, ĝi estas same maniero ne rigardi.

Aŭ ni rigardas, sed diras al ni, ke ni povas nenion fari ol koncentriĝi al ni mem. Ni meditas kaj aĉetas niajn nutraĵojn en kampulaj merkatoj kaj vendas nian aŭton. Sed ni faras nenian provon ŝanĝi la sistemon kiu faras la krizon neevitebla, ĉar tio estus multe tro da „malbona energio" kaj tio ĉiukaze ne funkcius. Kaj eĉ se tio unuavide ŝajnas esti rigardado, ĉar multaj el tiuj ŝanĝoj de la vivstilo efektive estas parto de la solvo, eĉ per tiu sinteno ni estas unuokule blindaj.

Aŭ ni rigardas – vere rigardas –, kaj poste ŝajnas ĉion forgesi. Pensas de tempo al tempo pri tio kaj denove forgesas ĝin. Tio estas ja la klimatŝanĝo – malfacilas teni ĝin ĉeesta dum iom pli longa tempo. Ni flegas tiun strangan manieron de ekologia en-el-ŝalta amnezio pro tute kompreneblaj kialoj. Ni neas, ĉar ni timas, ke ĉio ŝanĝiĝos, se ni lasas veni la krizon en ĝia tuta amplekso tute proksimen al ni. Kaj pri tio ni tute pravas.[5]

5 Jenaj aŭtoroj liveras gravajn sociologiajn kaj psiĥologiajn rigardmanierojn de la ĉiutaga klimat-neado: *Kari Marie Norgaard, Living in Denial: Climate Change, Emotions, and Everyday Life (Cambridge, MA, MIT Press, 2011); Rosemary Randall, „Loss and Climate Change: The Cost of Parallel Narratives", Ecopsychology 1.3 (2009)*, p. 118-129; kaj la eseoj en Sally Weintrobe, ed., Engaging with Climate Change (East Sussex: Rout-

Ni scias, ke la klimatŝanĝo ĝisfunde ŝanĝos nian mondon, se ni restos sur la nuna vojo kaj se la ellasoj de jaro al jaro pliiĝas. Grandaj urboj probable sinkos en la maron, malnovaj kulturoj estos vorataj de la inundoj, kaj estas pli ol verŝajna, ke niaj infanoj pasigos grandan parton de sia vivo fuĝante antaŭ fiaj ŝtormoj kaj ekstremaj malsekecoj aŭ resaniĝante aŭ ripozante post ili. Por ke tiu estonteco fariĝu realo, ni bezonas fari nenion. Ni bezonas simpe nur ne agi. Daŭrigi kiel ĝis nun, ĉu ĉar ni fidas teĥnikajn atingojn aŭ kulturas nian ĝardenon aŭ pretekstas ke ni estas bedaŭrinde tro okupataj por povi okupiĝi pri tio.

Ĉio, kion ni devas fari por tio, estas fari kvazaŭ ni ne havus elkreskintan krizon. Daŭre nei, ke ni timas ĝin. Tiel ni paŝon post paŝo atingas ĝuste tiun situacion, kiun ni plej timas, kiun ni ne kuraĝas rekte rigardi. Tute sen ajna plia klopodo.

Ekzistas eblecoj malebligi tian malluman estontecon aŭ almenaŭ fari ĝin iomete pli eltenebla. La hoko en la ezoko estas nur, ke por tio necesas fundamenta ŝanĝo. Por ni konsumemaj samtempuloj tio signifas ŝanĝi nian vivmanieron, nian specon de ekonomio, eĉ la koncepton pri tio, kian spacon ni okupu sur la Tero. La bona mesaĝo tekstas, ke multaj el tiuj necesaj ŝanĝoj estas ĉio alia ol minacaj. Multaj estas eĉ vere pasiigaj. Sed longan tempon mi ne sciis tion.

Mi ankoraŭ tre precize scias, kiam mi ĉesis fermi la okulojn antaŭ la realo de la klimatŝanĝo, aŭ almenaŭ, kiam mi por la unua fojo vere rigardis ĝin. Tio estis en aprilo de 2009 en Ĝenevo, ĉe renkontiĝo kun la ambasadorino de Bolivio ĉe la Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK), la tiam mirige juna *Angélica Navarro Llanos*. Ĉar Bolivio estas malriĉa lando kun malgranda buĝeto por eksterlandaj vojaĝoj, *Navarro Llanos* antaŭ nelonge transprenis apud la komercan ankaŭ la klimatan fakon. Ĉe tagmanĝo en malplena ĉina restoracio ŝi klarigis al mi (dum ŝi per manĝbastonetoj desegnis diagramon de la tutmonda ellas-evoluo), ke ŝi vidas la klimatŝanĝon kiel teruran minacon por sia popolo, sed ankaŭ kiel ŝancon.

Minaco pro evidentaj kialoj: Bolivio estas ekstreme dependa de siaj glaĉeroj kiel fonto de trink- kaj uz-akvo por akvumado, kaj la neĝkovritaj montopintoj, kiuj videblas super ĝia ĉefurbo, en zorgiga

ledge, 2013).

rapido griziĝas kaj bruniĝas. Laŭ *Navarro Llanos* la ŝanco konsistas en tio, ke landoj kiel ŝia, kiuj preskaŭ neniom kontribuis al la altiĝo de la ellasoj, povis deklari sin „klimato-kreditoroj". Per tio ili rajtus pretendi financan kaj teĥnologian subtenon flanke de la grandaj malpurigistaj landoj por pagi la altajn kostojn de pliaj klimatkaŭzitaj katastrofoj kaj iri ekologian disvolvovojon.

Mallonge antaŭe, en la UN-klimatkonferenco, ŝi faris paroladon, en kiu ŝi pledis por tiaj transigaj pagoj, kaj donis al mi kopion de ĝi. „Milionoj da homoj", tekstis tie, „sur malgrandaj insuloj, en la plej malmulte evoluintaj landoj, en landoj sen aliro al la maro kaj en protektendaj komunumoj en Brazilo, Hindujo, Ĉinujo kaj en la tuta mondo suferas sub la efikoj de problemo, al kiu ili neniel kontribuis … Se ni volas videble malpliigi la ellasojn en la venonta jardeko, tiam ni bezonas amasan mobilizadon en neniam konita amplekso. Ni bezonas marŝalplanon por la Tero. Tiu plano devas enteni financajn kaj teĥnologiajn transigojn en senprecedenca amplekso. Ĝi devas provizi ĉiujn landojn per teĥnologioj por certigi ke la ellasoj estu reduktataj kaj la vivnivelo de la homoj samtempe altigata. Por tio restas al ni nur tempo de dek jaroj."[6]

Marŝalplano por la Tero estus kompreneble tre multekosta – centoj da miliardoj, se ne bilionoj da dolaroj (*Navarro Llanos* ne volis diri nombrojn). Kaj oni povintus kredi, ke sole nur tiuj kostoj farus tian ideon iluzio – ĉar ni troviĝis en la jaro 2009, ĉe la apogeo de la tutmonda financkrizo. Sed tiutempe la brutala logiko de la konsumredukto – transdoni la fakturojn de la bankistoj al la civitanoj, en formo de maldungoj en la publika sektoro, fermo de lernejoj kaj simile – ankoraŭ ne fariĝis normala, kaj tiel la krizo faris la proponojn de *Navarro Llanos* ne malpli konvinkaj, sed havis la malan efikon.

Ni ĉiuj ĵus spertis, kiel subite bilionoj da dolaroj disponeblis, kiam niaj financaj elitoj proklamis krizon. Se oni lasas la bankojn bankroti, oni persvadis nin, tiam la tuta ekonomio kolapsos. Ke temas pri la kolektiva transvivado; kaj pro tio oni devas iel aperigi la monon. Ĉe

6 *Angélica Navarro Llanos, „Climate Debt: The Basis of a Fair and Effective Solution to Climate Change"*, prezentado ĉe la teĥnika kontrolado pri historia respondeco, pritema laborgrupo sub la Klimata Kadro-konvencio, Bonno, 4-an de junio 2009.

tio oni forbalais kelkajn grandajn mirrakontojn pri nia financsistemo (Ĉu vi bezonas pli da mono? Presu ĝin!). Kelkajn jarojn antaŭe multaj registaroj en sia mastrumado de la publikaj financoj iris tute similan vojon, nome post la teroristaj atakoj de la 11-a de septembro 2001. En multaj okcidentaj landoj mono ŝajnis esti malgrava punkto, kiam oni volis enlande konstrui sekurecan kaj ĉiokontrolan ŝtaton kaj eksterlande fari militon.

Sed ĉe la klimatŝanĝo nia politika gvidantaro neniam faris tiajn kriz-disponojn, kvankam ĝi entenas la riskon neniigi multege pli da vivoj ol kelkaj kolapsantaj bankoj aŭ konstruaĵoj. La malaltigoj, kiujn sciencistoj konsideras necesaj ĉe la ellaso de forcejaj gasoj por konsiderinde malaltigi la riskon de katastrofo, estas komprenataj kiel puraj rekomendoj, kies realigon oni povas eterne prokrasti. Tute evidente ne la klaraj faktoj decidas pri tio, kiam situacio estas konsiderata kriza, sed potencpolitikaj prioritatoj. Sed ni ne estas kondamnitaj al sola rigardado: Ne nur politikistoj povas proklami krizon. Amasaj movadoj de tute normalaj homoj ankaŭ povas fari tion.

La sklavismo ne fariĝis krizo por la britaj kaj usonaj elitoj, ĝis kiam la adeptoj de sklavliberigo faris ĝin tia. Rasa diskriminacio ne ŝajnis venigi krizon, ĝis kiam la civitanrajta movado faris ĝin tia. Seksa diskriminacio ne kondukis al krizo, ĝis kiam la virinismo faris ĝin tia. Rasdisigo en Sudafriko ne produktis krizon ĝis kiam la anti-*apartheid*-movado faris ĝin tia.

Kaj ekde kiam sufiĉe da homoj malfermas la okulojn kaj deklaras, ke la klimatŝanĝo estas granda krizo, kiu postulas ian marŝalplanon, ankaŭ ĝi fariĝos tia. La politika klaso devos reagi al tio, per tio ke ĝi unuflanke disponigas rimedojn kaj aliflanke ĉirkaŭiras la regulojn de la libera merkato, kiuj montriĝas tre fleksiĝemaj, kiam temas pri la interesoj de la elito. Tiu ebleco ĉiam malkaŝe aperas, kiam katastrofo por mallonga tempo venas en la konscion. „Mono ĉe tiaj helpagadoj ne estas malhelpo. Kiom ajn estas bezonata, ni disponigos ĝin", deklaris la brita ĉefministro *David Cameron* – s-ro konsumredukto persone –, kiam en februaro 2014 pro inundego grandaj partoj de lia lando troviĝis sub akvo kaj la publiko indignis pro la mankantaj helpklopodoj de la registaro.[7]

7 *„British PM Warns of Worsening Floods Cirsis", Agence France-Presse*,

Kiam mi aŭskultis la priskribon de *Navarro Llanos* de la bolivia vidmaniero, mi komprenis, ke la klimatŝanĝo – se oni pritraktas ĝin simile kiel la ĵus menciitan inundon kiel mondvastan urĝostaton – povus fariĝi pelforto por la homaro por ne nur pli bone protekti nin kontraŭ la veteraj ekstremaĵoj, sed por fari nian socion multrilate pli sekura kaj pli justa. La resursoj neceaj por rapide rezigni pri fosiliaj brulaĵoj kaj adaptiĝi al estontaj malfacilaj veterkondiĉoj povus konduki grandajn partojn de la homaro el la malriĉeco kaj doni al ili publikan infrastrukturon, kiu dolore mankas, de pura trinkakvo ĝis elektro. Tiu ĉi vizio pri la estonteco ege transiras la ideon nur transvivi aŭ elteni la klimatŝanĝon, „mildigi" ĝin aŭ „adaptiĝi" al ĝi, kiel la Unuiĝinta Naciaro[8] tiel malserene formulas. Ĝi estas vizio pri tio, kiel ni povas kolektive utiligi la krizon por kuraĝi la salton en pli bonan mondon, ĉiukaze en pli bonan mondon ol estas la nuna.

Post la interparolado kun *Navarro Llanos* mi konstatis, ke mi jam ne timis okupiĝi pri la sciencaj faktoj de la klimata minaco. Mi ĉesis eviti artikolojn kaj sciencajn studaĵojn, kaj mi legis ĉion, kion mi povis trovi. Mi ankaŭ ĉesis lasi la problemon al la mediprotektantoj, ĉesis kredigi al mi, ke tio ne estas mia problemo, ne mia tasko. Kaj per interparoloj kun aliaj membroj de la kreskanta klimatjusteca movado mi ekkonis, ke la klimatŝanĝo povus multmaniere fariĝi katalizanto por pozitiva ŝanĝo – per tio, ke ĝi liveras al la progresemaj fortoj la entute plej bonan argumenton por postuli la rekonstruadon kaj la revivigon de la regiona ekonomio; elŝiri niajn demokratiojn el la detrua influo de la konzernoj; bloki danĝerajn novajn liberkomercajn traktatojn kaj aliformuli ilin; investi en subevoluintan publikan infrastrukturon, ekz-e en amas-transportilojn kaj pageblan loĝospacon; nuligi la privatigon de gravaj servoj, ekz-e de prizorgado je akvo kaj energio; anstataŭigi nian malsanan kampkulturan sistemon per pli sana; malfermi limojn por enmigrantoj, kiuj pro la sekvoj de la klimatŝanĝo devis forlasi sian hejmlandon; fine agnoski la rajtojn de la indiĝenaj popoloj – ĉio ĉi kontribuus ĉesigi la groteskan amplekson de malegaleco en kaj inter niaj landoj.

Kaj mi komencis rimarki signojn – novajn aliancojn kaj freŝajn

11-an de februaro 2013.

8 Alternativa, kaj envere la trafa esprimo anstataŭ la ĝis nun uzata formulo „Unuiĝintaj Nacioj". -vl

argumentojn – de tio, ke la minacanta klimata krizo povus fariĝi la fundamento por potenca amasmovado, se la diversaj interrilatoj estus pli larĝe ekkonataj. Amasmovado, kiu kunigus ĉiujn ĉi ŝajne izolitajn problemojn en unu koheran bildon. En imagon pri tio, kiel eblas sukcese protekti la homaron kontraŭ la katastrofaj efikoj de plej profunde maljusta ekonomia sistemo same kiel kontraŭ la sekvoj de malstabiligita klimata sistemo. Mi verkis tiun ĉi libron, ĉar mi akiris la konvinkon, ke la klimatprotekto povus esti katalizanto por tiu ŝanĝo.

## Popolŝoko

Sed mi verkis ĝin ankaŭ, ĉar la klimatŝanĝo povas lanĉi multajn diversajn kaj multe malpli dezirindajn formojn de sociaj, politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj.

En la pasintaj dek kvin jaroj mi okupiĝis pri socioj, kiuj estas elmetitaj al ekstremaj ŝokoj – ĉu pro ekonomia kolapso, naturkatastrofoj, teror-atencoj aŭ militoj. Kaj mi detale okupiĝis pri tio, kiel tiuj socioj reagas al tiaj situacioj de ekstrema streso. Kiel tiuj eventoj ŝanĝas la kolektivan senton pri tio, kio eblas, en la pozitiva aŭ, multe pli ofte, en la negativa senco. En mia lasta libro, *La ŝokterapio*, mi prezentis, ke dum la pasintaj kvar jardekoj konzerninteresoj sisteme eluzis la plej diversajn krizojn por trudi politikon, kiu riĉigas etan eliton – per malreguladoj, per malaltigo de socialaj elspezoj kaj per grandskalaj privatigoj en la publika sektoro. Krizoj servis ankaŭ kiel preteksto por radikalaj limigoj de la civitanaj rajtoj kaj por alarme gravaj rompoj de homrajtoj.

Multo indikas, ke la klimatŝanĝo tiurilate ne estos escepto, ke ankaŭ tiu krizo estos uzata por ŝovi al la unu elcento ankoraŭ pli da resursoj anstataŭ lanĉi solvojn kiuj donas veran ŝancon por malebligi Ter-varmigon kun katastrofa amplekso kaj por protekti nin kontraŭ la neeviteblaj katastrofoj. La komencoj de tiu ĉi procezo jam konturiĝas. Ĉie en la mondo, ŝtataj arbaroj transformiĝas en privatigitajn uzlignajn plantejojn kaj protektejojn, por ke iliaj posedantoj povu kolekti tiel nomatajn „ellasatestojn", profitdona trompo, pri kiu mi parolos poste. Ekzistas floranta komerco per „veter-estontaĵoj", kiuj permesas al entreprenoj kaj bankoj veti pri veterŝanĝoj, kvazaŭ mortigaj katastrofoj estus ĵetkuba ludo en *Las Vegas* (inter 2005 kaj 2006 la merkato pri

veter-derivaĵoj preskaŭ kvinobliĝis, de 9,7 miliardoj al 45,2 miliardoj da dolaroj). Mondvaste agantaj reasekuristoj gajnas miliardojn per vendo de novaj specoj de protektkonceptoj al evolulandoj, kiuj preskaŭ neniom kontribuis al la klimata krizo, sed kies infrastukturo estas grave tuŝata de ĝiaj efikoj.[9]

Kaj en tiu ĉi momento de sincero la armadkonzerno *Raytheon* deklaris, ke „supozeble estiĝos kreskantaj komercaj eblecoj, ĉar kiel reago al la klimatŝanĝiĝo la konduto kaj la bezonoj de la konsumantoj ŝanĝiĝos." Al tiuj komercaj eblecoj apartenas ne nur la pli alta bezono je helpaj servoj de la entrepreno en katastrofoj, sed ankaŭ „bezono je militaj produktoj kaj servoj, ĉar pro sekecoj, inundoj kaj ventegoj, kaŭzataj de la klimatŝanĝiĝo, povus estiĝi sekurec-problemoj."[10] Tion oni memoru, kiam estiĝas duboj pri la urĝo de la problemo: La privataj milicoj jam mobiliziĝas.

Sekecoj kaj inundoj ofertas apud la kreskantan bezonon je armilportantaj viroj ankoraŭ multajn aliajn komercajn eblecojn: Inter 2008 kaj 2010 oni deponis almenaŭ 261 patentojn ligitajn kun kulturado de „klimatrezistaj" plantoj – specoj, kiuj devas spiti ekstremajn veterkondiĉojn; preskaŭ 80 elcentoj de tiuj patentoj estis regataj de ses grandaj kampkulturaj konzernoj, inter ili *Monsanto* kaj *Syngenta*. La superŝtormo *Sandy* siavice estis bonŝanco por la disvolvistoj de nemoveblaĵoj en Nov-Ĵerzeo (*New Jersey*), kiuj enpoŝigis la milionojn por novkonstruaĵoj en malforte trafitaj regionoj, dum la homoj en forte difektitaj socialaj loĝejoj ĝis hodiaŭ vivas sub premsonĝaj kondiĉoj, same kiel okazis al la loĝantoj de Nov-Orleano post la uragano *Katrina*.[11]

Ĉio ĉi ne estas surprizo. Nia nuntempa sistemo estas konstruita tia, ke ĝi ĉiam serĉas novajn vojojn por privatigi la komunan havaĵon kaj

9 „*Exponential growth in Weather Risk Management Contracts*", *Weather Risk Management Association*, gazetara informo, junio 2006; Eric Reguly, „*No Climate-Change Deniers to be Found in the Reinsurance Business*", *Globe and Mail*, 28-an de novembro 2013.

10 „*Investor CDP 2012 Information Request Raytheon Company*", *Carbon Disclosure Project*,2012, http://www.cdp.net.

11 „*Who Will Control the Green Economy?*", *ETC Group, 2011, p. 23; „Sandy Founds Went to NJ Town With Little Storm Damage", NBC News*, 2-an de februaro 2014.

generi profiton el katastrofoj; se oni lasas ĝin laŭplaĉe fari, tiam ĝi kapablas fari nenion alian. Sed la ŝok-strategio ne estas la sola maniero, en kiu socioj reagas al krizoj. Tion ni ĉiuj spertis en la pasintaj jaroj, kiam la financa krizo, kiu komenciĝis en 2008 ĉe *Wall Street*, disvastiĝis al la tuta mondo. Subita kresko de la prezoj por vivrimedoj estis unu el la motivoj de la Araba Printempo. La ŝparpolitiko kondukis al amasmovadoj en multaj landoj, de Grekujo tra Hispanujo, Ĉilio, Usono ĝis Kebekio. Multaj el ni intertempe estas trejnitaj pri protestoj kontraŭ tiuj, kiuj cinike uzas krizojn por prirabi la publikan sektoron. Sed tiuj protestoj ankaŭ montris, ke ne sufiĉas simple diri nur ne. Por ke opoziciaj movadoj ne restu nur pajlofajro, ili bezonas ampleksan vizion pri tio, kio paŝu en la lokon de la fiaskanta sistemo, kaj solidajn politikajn strategiojn por trudi tiujn celojn.

Antaŭe la progresemaj fortoj sciis, kiel oni faras tion. Ekzistas multaj historiaj ekzemploj de tio, kiel meze de grandaj krizoj oni atingis venkojn por la sociala kaj ekonomia justeco. Al tio kalkuleblas speciale la *New Deal* post la borsa kolapso de 1929 kaj la starigo de multaj programoj de socia prizorgado post la Dua Mondmilito. Tiu politiko estis ĉe la elektantoj tiom populara, ke por ĝia leĝa fiksado la potenculoj ne bezonis manipuladojn, kiajn mi priskribis en *La ŝok-strategio*. Decida estis la organizado de potencaj amasmovadoj kontraŭ ĉiuj, kiuj volis daŭrigi la katastrofan staton, movadoj, kiuj postulis por ĉiuj konsiderinde pli grandan parton de la ekonomia kuko. Al la daŭremaj (kvankam pribatalataj) atingoj de tiuj eksterordinaraj historiaj eventoj apartenas interalie la ŝtata malsanul-asekuro en multaj landoj, pensiula salajro, konstruado de socialaj loĝejoj kaj la ŝtata apogo al arto.

Mi estas konvinkita, ke la klimatŝanĝo prezentas ankoraŭ pli grandskalan historian ŝancon. Lige kun la klopodo por malaltigi la ellason de poluciaj substancoj al la mezuro rekomendata de multaj sciencistoj, ni havas nun ree la okazon antaŭenigi politikon, kiu konsiderinde plibonigas la vivon de la homoj, fermas la abismon inter malriĉuloj kaj riĉuloj, kreas multajn bonajn laborojn kaj ĝisfunde revivigas la demokration. Alie ol la ŝok-strategio en sia plej alta formo – subpremadoj kaj akra konkurencbatalo por resursoj – la klimatŝanĝo povas estigi popol-ŝokon, desuban baton. Ĝi povas distribui la poten-con en multajn manojn anstataŭ faskigi ĝin en la manoj de malmultaj

kaj amase etendi la komunan proprieton anstataŭ popece forvendi ĝin. Kaj dum la maldekstre tendencaj ŝok-kuracistoj eluzas urĝo-situaciojn (naturajn same kiel homfaritajn) por trudi politikon, kiu faris nin ankoraŭ pli vundeblaj de krizoj, la transformo, kiun tiu ĉi libro montras, produktas la precizan malon: Ĝi kaptus la problemon ĉe la radiko, la problemon, kiu ja faligis nin en la krizon, kaj donus al ni ne nur pli elteneblan klimaton ol tiun, al kiu ni aktuale stiras, sed ankaŭ multe pli justan ekonomian sistemon ol estas la nuna.

Sed antaŭ ol eĉ nur unu el tiuj ŝanĝoj eblas – antaŭ ol ni povu kredi, ke la klimatŝanĝo povas ŝanĝi nin –, ni devas unue ĉesi preterrigardi.

* * *

„Vi intertraktas jam dum mia tuta vivo.” Tiun frazon diris la kanada *College*-studentino *Anjali Appadurai*, kiam ŝi dum la UN-klimatkonferenco de 2011 en Durbano rigardis la kunvenintajn ŝtatajn intertraktantojn. Ŝi ne troigis. La registaroj de la mondo jam de pli ol du jardekoj interkonsiliĝas pri tio, kiel oni povas haltigi la klimatŝanĝiĝon – komencante en la sama jaro, kiam la tiam dudekunujarulino naskiĝis. Kaj tamen, en sia memorinda parolado, kiun ŝi faris nome de la junularaj delegitoj, ŝi klarigis: „En tiu tempo vi preterlasis plenumi konsentojn, vi mistrafis celojn kaj rompis promesojn.”[12]

Efektive la internacia organizaĵo, taskita malebligi „danĝeran” mezuron de la klimatŝanĝiĝo, en sia pli ol dudekjara ekzisto (kaj en pli ol naŭdek oficialaj sesioj de intertraktado ekde la decido de la klimatkonvencio de 1992) ne nur ne atingis progresojn, sed registras kvazaŭ seninterrompan procezon de malprogresoj. Niaj registaroj malŝparis jarojn per manipulado de nombroj kaj disputante pri komencaj datoj kaj konstante provis prokrasti ilin, kiel studentoj siajn laboraĵojn.

La katastrofa rezulto de ĉiu ĉi vualado kaj prokrastado estas nun nerefutebla. Laŭ provizoraj datumoj la mondvasta ellaso de $CO_2$ en 1013 estis 61-elcente pli alta ol en 1990, la jaro, kiam oni faris por la unua fojo seriozajn intertraktadojn pri klimata interkonsento. „Ju pli ni parolas pri la neceso malaltigi la ellasojn, des pli ili altiĝas”, deklaris

12 *„'Get It Done': Urging Climate Justice, Youth Delegate Anjali Appadurai Mic-Checks UN Summit”, Democracy Now!*, 9-an de decembro 2011.

la ekonomik-sciencisto *John Reilly* de la MIT. La sola afero, kiu reale pli rapide pliiĝas ol niaj ellasoj, estas la vortriĉaj konsentoj malaltigi ilin. La ĉiujara UN-pintkunveno, daŭre la granda espero je politika trarompo por la klimatprotekto, intertempe tute ne plu vekas la impreson de forumo de seriozaj intertraktadoj kaj donas preskaŭ la impreson de sufiĉe multekosta kaj $CO_2$-ŝarĝita sesio de grupa terapio, kie la reprezentantoj de la plej minacataj landoj de la mondo eligas sian ĉagrenon kaj sian koleron, dum malpli altrangaj reprezentantoj de la landoj, kiuj plejparte kulpas pri ilia tragedio, algapas siajn ŝupintojn.[13]

Jen la etoso ekde la fiasko de la antaŭe alte laŭdita UN-klimata pintkunveno 2009 en Kopenhago. En la lasta vespero de tiu giganta aranĝo mi troviĝis ĉe grupo de aktivuloj por klimata justeco, inter ili unu el la plej eminentaj kampanjistoj en Britujo. Dum la tuta pintkunveno tiu junulo elradiis optimismon kaj paciencon, ĉiutage informis dekojn da ĵurnalistoj pri la rezultoj de la unuopaj intertraktoj kaj kion la diversaj ellasceloj reale signifas. Spite al la defioj lia optimismo pri la perspektivoj de la pintkunveno ne rompiĝis. Kiam poste ĉio estis pasinta kaj la mizera rezulto klaris, tiam li kolapsis antaŭ niaj okuloj. En akre lumigita itala gastejo li senretene singultis. „Mi vere pensis, ke Obama komprenis tion", diris li ree kaj ree.

Mi memoras tiun vesperon kiel la momenton, en kiu la klimata movado fariĝis plenkreska: Ĝi estis la momento, kiam ni ĉiuj reale konsciiĝis, ke neniu venos por savi nin. La brita psiĥoanalizistino kaj klimatfakulino Sally Weintrobe priskribas tion kiel la „fundamentan heredaĵon" de la pintkunveno – la brulantan kaj doloran ekkonon, ke „niaj politikistoj ne okupiĝas pri ni … Ni batalas por transvivi, kaj neniu helpas nin."[14] Kvankam ni jam tiel ofte seniluziiĝis pro la

13 *Corinne Le Quéré k.a.*, *„Global Carbon Budget 2013"*, *Earth System Science Data 6* (2014), p. 253; *„Greenhouse Gases Rise by Record Amount"*, *Associated Press*, 3-an de novembro 2011.

14 Jen kritikaj esploraĵoj pri la historiaj kaj politikaj fonoj de la 2-grada celo ĉe: Joni Seager, „Death by Degrees. Taking a Feminist Hard Look at the 2 Degrees Climate Policy, Kvinder, Køn og Foraksning (Danlando) 18 (2009), p. 11-22; Christopher Shaw, „Choosing a Dangerous Limit for Climate Change: An Investigation into How the Decision Making Process Is Constructed in Public Discourses", Dissertation, University of Sussex, 2011, elŝutebla sub http://www.notargets.org.uk; Christopher Shaw,

misfaro de niaj politikistoj, tiu certeco tamen frapas nin bate. Efektive estas tiel, ke dependas sole de ni, kaj ĉia reala espero en tiu ĉi krizo devas veni de malsupre.

En Kopenhago la registaroj de la plej grandaj poluciaj landoj – inter ili Usono kaj Ĉinujo – subskribis sendevigan interkonsenton kun la konsento teni la Tervarmigon sub 2 celsiaj gradoj, elirante ĉe la datumoj de antaŭ ni komencis funkciigi nian ekonomion per karba energio. Tiu ĉie konata celo, laŭdire la „sekura" limo de la klimatŝanĝiĝo, estis ĉiam politike difinita datumo, kiu pli celas eviti ekonomiajn kolapsojn ol protekti kiom eble plej grandan nombron da homoj. Kiam la 2-grada celo estis oficiale anoncita en Kopenhago, multaj delegitoj pasie kontraŭargumentis dirante, ke tiu celo signifas la mortkondamnon por kelkaj malalte situantaj insulŝtatoj kaj por grandaj partoj de Afriko sude de Saharo. Efektive ĝi estas por ni ĉiuj ekstreme riska celo: Ĝis nun la mezuma temperaturo altiĝis nur je 0,8 gradoj, kaj jam ni spertas multajn alarmajn efikojn, interalie en la somero de 2012 senprecendencan degelon de la gronlanda glaciŝildo kaj acidiĝon de la maroj okazantan multe pli rapide ol atendite. Se ni allasas, ke la temperaturoj kreskas pli ol duoble, tio havos sendube danĝerajn sekvojn.[15]

En sia raporto de 1012 la Monda Banko skizis la riskon de tiu celo.

---

15 „Choosing a Dangerous Limit for Climate Change: Public Representations of the Decision Making Process", *Global Environmental Change* 23 (2013), p. 563-571. KOPENHAGO: Copenhagen Accord, United Nations Framework Convention on Climate Change, 18-an de decembro 2009, p. 1; „TODESSTRAFE": „CJN CMP Agenda Item 5 Intervention", Parolado de la aktivulino Sylvia Wachira en la kopenhaga klimat-konferenco, Climate Justice Now!, 10-an de decembro 2009, http://www.climate-justice-now.org; GRONLANDO: J.E. Box k.a., „Greenland Ice Sheet", Arctic Report Card 2012, National Oceanic and Astmospheric Administration, 14-an de januaro 2013; ACIDIĜO: Bärbel Hönisch k.a., „The Geological Record of Ocean Acidification", *Science* 335 (2012), p. 1058-1063; Adrienne J. Sutton k.a., „Natural variability and anthropogenic change in equatrorial Pacific surface ocean $pCO_2$ and pH", *Global Biogeochemical Cycles* 28 (2014), p. 131-145; DANĜERAJ KONSEKVENCOJ: James Hansen k.a., „Assessing 'Dangerous Climate Change': Required Reduction of Carbon Emissions to Protect Young People, Future Generations and Nature", *PLOS ONE* 8 (2013), e81648.

„Dum la tutplaneda varmiĝo proksimiĝas al la marko de 2 gradoj kaj transiras ĝin, estas la risko ke lanĉiĝas nelinearaj renvers-elementoj. Ekzemplo de tio estas la disfalo de la okcident-antarkta glaci-ŝildo, kiu kondukas al pli rapida altiĝo de la marnivelo, aŭ grandampleksa arbomortiĝo en la amazonia pluvarbara regiono, kiu kondukas al tranĉa malboniĝo de ekologiaj sistemoj, riveroj, kampkulturo, energi-akiro kaj de niaj vivbazoj. Tio aldone kontribuus al la Tervarmigo en la 21-a jarcento kaj koncernus tutajn kontinentojn.”[16] Per aliaj vortoj: Se ni allasas, ke la temperaturoj altiĝas super certan punkton, tiam ni jam ne havas kontrolon pri tio, kie la hidraga kolono haltos.

La pli granda problemo – kaj la kaŭzo pro kiu la kopenhaga pint-kunveno estigis tian malesperon – estas tamen io alia: Ĉar la registaroj ne interkonsentis pri devigaj celoj, ili povas laŭplaĉe ignori siajn konsentojn. Kaj precize tio okazas en la momento. La ellasoj tiom rapide altiĝas, ke 2 gradoj el hodiaŭa vidpunkto aperas kvazaŭ utopia revo, se ni ne ĝisfunde ŝanĝas nian ekonomian sistemon. Kaj ne nur mediprotektantoj alarmas. En la sama raporto de 2012 la Monda Banko avertis, ke „ni [ĝis la jarcentŝanĝo] moviĝas en la direkto de 4-grada varmigo, kiu estas karakterizita per ekstremaj varmeg-ondoj, malabundo de la mondvastaj nutraĵ-provizoj, perdo de ekologiaj sistemoj kaj de speci-multeco kaj per vivminaca altiĝo de la marniveloj.” Kaj ni legas tie ankaŭ, ke „krome ne certas, ĉu adaptiĝo al la 4-grada mondo eblas.” Kevin Anderson, eksa direktoro (kaj nuna vicdirektoro) de la *Tyndall Centre for Climate Change Researc*h, kiu establiĝis kiel unu el la gvidaj klimatesploraj institutoj de Britujo, diras tion ankoraŭ pli senindulge. Por li, varmigo de 4 gradoj estas „malkongrua kun ĉia akceptebla ideo de organizita, justa kaj civilizita tutmonda komunumo”.[17]

Ni ne scias precize, kia 4-grada mondo aspektus, sed eĉ en la plej

16 „Climate Change Report Warns of Dramatically Warmer World This Century”, Monda Banko, gazetara informo, 18-an de novembro 2012.

17 Saml.; Hans Joachim Schellnhuber k.a., „Turn Down the Heat: Why a 4 °C Wamer World Must Be Avoided”, raporto de la Pocdama Instituto pri Klimat-Esplorado por la Monda Banko, novembro 2012, p. xviii; Kevin Anderson, „Climate Change Going Beyond Dangerous – Brutal Numbers and Tenuous Hope”, *Development Dialogue* n-ro 61, septembro 2012, p. 29.

favora kazo ĝi verŝajne etus katastrof-scenaro. Ĉe 4-grada varmigo la marniveloj ĝis la jaro 2100 mondvaste altiĝus je 1 m aŭ eble eĉ al 2 m (kaj en postaj jarcentoj almenaŭ je kelkaj kromaj metroj). Insulaj ŝtatoj kiel Maledivoj kaj Tuvaluo malaperus en la maro, kaj multaj marbordaj regionoj en Ekvadoro, Brazilo kaj Nederlando kaj granda parto de Kalifornio kaj la nordoriento de Usono kaj gigantaj regionoj de suda kaj sudorienta Azio inundiĝus. Al la verŝajne endanĝeritaj grandurboj kalkuliĝas Los-Anĝeleso, Vankuvero, Londono, Mumbajo, Honkongo kaj Ŝanhajo.[18]

18 Ĝeneralan superrigardon, kiu resumas la sciencan esploradon pri la verŝajnaj efikoj de 4-grada mondo, donas Schellnhuber k.a., „Turn Down the Heat" kaj la speciala eldono kun la titolo: „Four Degrees and Beyond: tha Potential for a Global Temperature Increase of four Degrees and its Implication", kunmetita kaj eldonita de Mark G. New k.a., Philosophical Transactions of the Royal Society A 369 (2011), p. 1-241. En 2013 la Monda Banko eldonis sekvo-raporton, en kiu la regionaj sekvoj de 4-grada temperatur-altiĝo esploriĝis, kun aparta fokuso al Afriko kaj Azio; Hans Joachim Schellnhuber k.a., „Turn Down the Heat": Climate Extremes, Regional Impacts, and the Case for Resilience", raporto de la Pocdama Instituto pri Klimat-sekvaj esplorado por la Monda Banko, junio, 2013. Eĉ ĉe la plej ellas-intensaj scenaroj, kiuj povus konduki al 4-grada varmigo, la Monda Klimat-Konsilantaro prognozas pli malgrandan altiĝon de la tutmonda marnivelo ol ĉi tie indikite, sed multaj fakuloj taksas tiun tro konservativa. Ekzemplojn por studoj pri tiu ĉi sekcio liveras Schellnhuber k.a., „Turn Down the Heat", p. 29; Anders Levermann k.a., „The Multimillennial Sea-Level Commitment of Global Warming", *Proceedings of the National Academy of Sciences* 110 (2013), p. 13748; Benjamin P. Horton k.a., „Expert Assessment of sea-level rise by AD 2300", *Quarternary Science Reviews* 84 (2014), p. 1-6. Por pli da informoj pri la endanĝeriĝo de malgrandaj insulŝtatoj kaj de la marbordaj regionoj de Latinameriko kaj de suda kaj sudorienta Azio pro la altiĝo de la marnivelo, se ni daŭrigas kiel nun kaj ĉe aliaj (ankaŭ pli optimismaj) ellas-scenaroj vidu la kontribuaĵojn de la Working Group II pri la 4-a kaj la 5-a Assessment Report de la IPCC, ambaŭ elŝutebla sub http://www.ipcc.ch. Vidu la ĉapitrojn 10, 13 kaj 16 de M. L. Perry k.a., ed., *Climate Change 2007: Impacts, Adaptation and Vulnerability, Contribution of Working Group II to the Fourth Assessment Report of the Intergovernmental Panel on Climate Change* (Cambridge: Cambridge University Press, 2007); kaj la ĉapitrojn 24, 27 kaj 29 de V.R. Barros k.a., ed., *Climate Change 2014: Impacts, Adaptation, and Vulnerability, Part*

## Enkonduko

Brutalaj varmeg-ondoj kun dekmiloj da mortviktimoj eĉ en riĉaj landoj sur ĉiuj kontinentoj escepte de Antarkto fariĝus normala somera fenomeno. Pro la varmego ĉe gravaj grenspecoj en la tuta mondo okazus dramecaj malaltigoj de rikoltoj (ĉe hindia tritiko kaj usona maizo la rikolto povus fali al 60 elcentoj), kaj tio en epoko, kiam la bezono pro la loĝantara kresko kaj la kreskanta bezono de viando ege altiĝos. Kaj ĉar la greno estos elmetita ne nur al la varmostreso, sed ankaŭ al ekstremaj eventoj kiel grandsurfacaj malsekecoj, inundoj aŭ parazitaj plagoj, la perdoj povus esti ankoraŭ pli gravaj ol la modeloj prognozas. Se oni tiam ankoraŭ aldonas detruajn uraganojn, furiozajn sovaĝajn fajregojn, detruitajn fiŝospacojn, ampleksajn kolapsojn de akvoprovizado, mortadon de specioj kaj mondvaste etendiĝantajn malsanojn, tiam malfacile imagas, ke paca, ordigita socio konserveblas (se entute io tia nuntempe ekzistas).[19]

---

*B: Regional Aspects, Contribution of the Working Group II to the Fifth Assessment Report of the Intergovernmental Panel on Climate Change* (Cambridge: Cambridge University Press, 2014). Pri Kalifornio kaj la nordoriento de Usono vidu Matthew Heberger k.a., „Potential Impacts of Increased Coastal Flooding in California Due to Sea-Level-Rise", Climatic Change 109, Issue I Supplement (2011), p. 229-249; kaj Asbury H. Sallenger Jr., Kara S. Doran kaj Peter A. Howd, „Hotspot of Accelerated Sea-Level-Rise on the Atlantic Coast of North America", *Nature Climate Change* 2 (2012), p. 884-888. Nova analizo de la grandurboj, kiuj eble estas aparte minacataj de la altiĝo de la marnivelo, troviĝas ĉe Stephane Hallegatte k.a., „Future Flood Losses in Major Coastal Cities", *Nature Climate Change* 3 (2013), p. 802-806.

19 Superrigardon pri la regionaj temperatur-altiĝoj lige kun 4-grada aŭ plia Tervarmiĝo liveras: M.G. Sanderson, D.L. Hemming kaj R.A. Betts, „Regional Temperature and Precipitation Changes Under High-end (≥4°C) Global Warming", Philosophical Transactions of the Royal Society A 369 (2011), p. 85-98. Vidu ankaŭ: „Climate Stabilization Targets: Emissions, Concentrations, and Impacts over Decades to Millenia", Committee on Stabilization Targets for Atmospheric Greenhouse Gas Constentrations, National Research Council, National Academy of Sciences, 2011, p. 31; Schellnhuber k.a., „Turn Down the Heat", p. 37-41. DEKMILOJ: Jean-Marie Robine, „Death Toll Exceeded 70.000 in Europe During the Summer of 2003", Comptes Rendus Biologies 331 (2008), p. 171-178; RIKOLTOPERDOJ: „Climate Stabilization Targets", National Academy of Sciences, p. 160sj.

Kaj ĉe ĉio ĉi oni ne forgesu la jenon: Nur optimismaj scenaroj deiras de tio, ke la varmiĝo meznombre atingos la konstantan valoron de proksimume 4 gradoj kaj ke ne atingos renversajn punktojn kun nekontrolebla varmigo. Laŭ plej lastaj modeloj oni prefere akceptu la ideon, ke 4-grada varmigo povas sekvigi multnombrajn ekstreme danĝerajn rekupligajn efikojn – ekz-e Arkton, kiu en septembro estas regule senglacia, aŭ, laŭ nova studaĵo, tutmondan vegetaĵaron, kiu estas tro satigita por daŭre efiki kiel findinda „karbonaĵ-kaptilo", tiel ke pli da $CO_2$ estas liberigota ol stokota. Se tio okazos, tiam jam ne estos espero antaŭdiri la efikojn. Kaj tiu procezo povus okazi jam pli frue ol prognozite. En majo de 2014 esploristoj de la NASA kaj de la universitato de Kalifornio en *Irvine* malkovris, ke la glaĉer-degelo, en regiono de la okcidenta Antarkto granda kiel proksimume Francujo, intertempe „ŝajnas nehaltigebla". Tio verŝajne signifas la disfalon de la tuta okcidentantarkta glaciŝildo, kio, laŭ Eric Rignot, la gvida aŭtoro de la studaĵo, „sekvigas altiĝon de la marnivelo inter tri kaj kvin metroj. Per tio, milionoj da homoj mondvaste perdos sian hejmlandon". Tiu disfalo tamen povus okazi en tempo de pluraj jarcentoj, tiel ke ankoraŭ restas tempo por malrapidigi la fenomenon per reduktado de ellasoj kaj malebligi la plej grandan malbonon.[20]

Sed multe pli timinda ol ia ajn el tiuj faktoj estas, ke multaj establitaj klimat-analizistoj deiras de tio, ke ni, se ni daŭrigas kiel ĝis nun, direktas nin al varmigo de pli ol 4 gradoj. En 2011, la Internacia Ener-

20 SENGLACIA ARKTO: Saml., p. 132sj. VEGETAĴARO: Andrew D. Friend k.a., „Carbon Residence Time Dominates Uncertainty in Terrestrial Vegetation Responses to Future Climate and Atmospheric $CO_2$", *Proceedings of the National Academy of Sciences* 111 (2014), p. 3280; „4 Degree Temperature Rise Will End Vegetation 'Carbon Sink'", University of Cambridge, gazetara informo, 17-an de decembro 2013; STUDAĴO OKCIDENTA ANTARKTO: E. Rignot k.a., „Widespread, Rapid Grounding Line Retreat of Pine Island, Thwaites, Smith, and Kohler Glaciers, West Antarctica, from 1992 to 2011", *Geophysical Research Letters* 41 (2014), p. 3502-3509; „ŜAJNAS NEHALTIGEBLA": „West Antarctic Glacier Loss Appears Unstoppable", Jet Propulsion Laboratory, NASA, gazetara informo, 12-an de majo 2014; „MILIONOJ DA HOMOJ PERDOS SIAN HEJMLANDON" kaj „DAŬRE RESTAS TEMPO": Eric Rignot, „Global Warming: It's a Point of No Return in West Antartctica. What Happens Next?" *Observer*, 17-an de majo 2014.

gi-Agentejo (IEA), konsiderata kiel singarda, publikigis raporton, kiu prognozis eĉ 6-gradan varmigon. „Ĉiu lernejano scias", diris la ĉef-ekonomikisto de la IEA, „ke tio havos katastrofajn efikojn por ni ĉiuj." (Ekzistas klaraj indikoj por tio, ke ĉe 6-grada varmigo supozeble pluraj renversopunktoj transiriĝos, kun sekvoj ne nur malrapide aperontaj, kiel ĉe la ĵus priskribita disfalo de la okcidentantarkta glaciŝildo, sed kun verŝajne abruptaj ŝanĝoj kiel la amasa liberigo de metano el la arkta permafrosta grundo.) La konzerno de ekonomia kontrolado *PricewaterhouseCoopers* ankaŭ publikigis raporton, kiu avertas entreprenojn pri tio, ke ni moviĝas direkte al „4 aŭ eĉ 6 gradoj de Tervarmigo".[21]

Oni devas imagi ĉiujn ĉi prognozojn kune proksimume tiel, kvazaŭ en la propra domo ĉiuj alarmsignaloj samtempe ekhurlas. Kaj poste la alarmsistemoj en ĉiuj domoj de la strato, unu post la alia. La antaŭdiroj tutsimple montras, ke la klimata krizo fariĝis ekzistokrizo por la homa specio. Krizo de tia grandeco ekzistis ĝis nun nur unufoje en la historio, nome kiam la homoj en la Malvarma Milito timis, ke la mondo direktiĝas al atoma holokaŭsto, kiu farintus grandegan parton de la planedo neloĝebla. Sed tio estis (kaj restas) minaca kuliso, tre eta ebleco, se la geopolitika pinto ne plu kontroleblus. Tiutempe la granda plimulto de la atomsciencistoj ne avertis nin pri tio, ke ni sufiĉe certe endanĝerigas nian tutan civilizacion, se ni tutsimple daŭrigas vivi nian normalan ĉiutagon kaj faras tion, kion ni ĉiam faris – sed la klimatesploristoj de hodiaŭ ja faras tion, eĉ de jaroj.

La klimatologo Lonnie G. Thompson de la universitato *Ohio State*, mondfama specialisto pri glaĉerdegelo, klarigis en 2010: „Klimatesploristoj, same kiel la plej multaj sciencistoj, estas flegma popoleto. Al ni ne gustas teatraj minacoj, ke la ĉielo povus fali sur niajn kapojn. Multaj el ni sentas sin en siaj laboratorioj aŭ ĉe surlokaj esploroj pli komfortaj ol en intervjuoj kun ĵurnalistoj aŭ ĉe prelegoj antaŭ kongre-

21 „World Energy Outlook 2011", International Energy Agency, 2011, p. 40; „World Energy Outlook 2011" (filmeto), Carnegie Endowment for International Peace, 28an de novembro 2011; Tomothy M. Lenton k.a., „Tipping Elements inthe Earth's Climate System", *Proceedings of the National Academy of Sciences* 104 (2008), p. 1788; „Too Late for Two Degrees?" Low Carbon Economy Index 2012, Price-waterhouseCoopers, novembro 2012, p. 1.

saj komisionoj. Kaj kial la klimatesploristoj nun laŭtigas siajn voĉojn kaj avertas kontraŭ la danĝeroj de la klimatŝanĝiĝo? Ĉar praktike ni ĉiuj intertempe konvinkiĝis, ke la tutplaneda varmigo estas klara, akuta danĝero por la civilizacio."[22]

Ne eblas formuli tion pli klare. Sed anstataŭ reagi en zorgo kaj fari ĉion eblan por ŝanĝi sian kurson, grandaj partoj de la homaro tutkonscie daŭrigas sian iradon kiel antaŭe. Sed ĉe tio ili, same kiel la pasaĝeroj de la flugo 3935, lasas sin subteni de pli forta kaj pli polucia motoro.

Kio okazis al ni?

## Sufiĉe malbona tempoplanado

Al tiu demando oni jam plej diverse respondis – ke estas ekstreme malfacile, instigi ĉiujn registarojn de la mondo al interkonsento, ke ne ekzistas veraj teĥnikaj solvoj, ke aktiviĝi ne kongruas kun la homa esto, se la minaco estas ŝajne tre malproksima, kaj – lastatempe – ke ni ĉiukaze jam fuŝis ĉion kaj jam ne povas fari ion alian ol ĝui la panoramon, dum ni moviĝas al la abismo.

Kelkaj el tiuj respondoj estas pravaj, sed finanalize ĉiuj estas ne sufiĉaj. Ekz-e la aserto, ke simple tro malfacilas instigi ĉiujn landojn al komuna strategio. Jes, tio malfacilas. Sed ekzistas multnombraj ekzemploj el la pasinteco, ke registaroj, subtenataj de la Unuiĝinta Naciaro, kunlaboris por solvi malfacilajn translimajn problemojn, de la ozon-malpliigo ĝis la atomarmiloj. La rezultantaj interkonsentoj ne estis perfektaj, tamen vera progreso. Kaj dum la registaroj fiaskis ĉe konstruado de jure deviga arĥitekturo por redukti la ellasojn, ĉar la kunlaborado laŭdire estas tro malfacila, ili samtempe sukcesis fondi la Mondan Organizaĵon pri Komerco (MOK) – alte kompleksan aparaton, kiu reguligas la tutmondan cirkuladon de varoj kaj servoj, kun klaraj preskriboj kaj gravaj punoj por malobeoj.

La aserto, ke mankas teĥnikaj eblecoj, estas same ne konvinka. Energio el renovigeblaj fontoj kiel vento kaj akvo estas pli malnova ol

22 Lonnie G. Thompson, „Climate Change: The Evidence and Our Options", *The Behavior Analyst* 33 (2010), p. 153.

uzado de fosiliaj energioj, fariĝas ĉiam pli malmultekosta kaj pli efika kaj ĉiam pli bone stokeblas. En la pasintaj dudek jaroj okazis vera eksplodo de daŭrigeblaj produktoj kaj de verda urboplanado. Ni havas ne nur la teĥnikajn rimedojn por forlasi la fosiliajn brulaĵojn, sed ankaŭ sennombrajn niĉojn, en kiuj klimatfavora vivstilo jam tre sukcese estis elprovita. Kaj tamen ni ne sukcesas atingi grandskalan ŝanĝon, kiu donus al ni la ŝancon komune malebligi la katastrofon.

Do, ĉu kulpas nur la homa naturo? Jam multajn fojojn ni homoj montris nian pretecon, en kazo de minaco, fari kolektivan oferon, ekz-e kiam en la Unua kaj Dua Mondmilitoj ni transiris al porciumigo de nutraĵoj, estigis privatajn kaj komunajn legomĝardenojn, la tiel nomatajn *victory gardens*, kaj aĉetis milit-pruntedonaĵojn. Por ŝpari benzinon, dum la Dua Mondmilito en Britujo preskaŭ ne okazis privataj aŭtoveturadoj, en Usono la uzado de publikaj transportiloj inter 1938 kaj 1944 kreskis je 87 elcentoj kaj en Kanado je 95 elcentoj. En la jaro 1943 20 milionoj da usonaj mastrumoj – tri kvinonoj de la loĝantaro – kulturis *victory*-ĝardenojn, kies rikoltoj estis 42 elcentoj de la tuta en tiu jaro konsumita freŝ-legomaĵo. Notindas, ke ĉiuj ĉi agadoj kune konsiderinde malpliigis la ellason de karbondioksido.[23]

Certe, la milito prezentiĝis kiel rekta kaj tuja minaco, sed tio validas ankaŭ pri la klimata krizo, kiu verŝajne kunkaŭzis multajn grandajn katastrofojn en kelkaj el la plej grandaj urboj de la mondo. Tamen, la epoko de militaj malhavoj pasis, kaj ni dorlotiĝis, aŭ ĉu eble ne? La homoj de hodiaŭ estas tro centritaj al si mem, tro avidaj je rekompenco, ol por rezigni pri la libereco ĉiumomente povi cedi al ĉia kaprico – almenaŭ tiel nia kulturo ĉiutage persvadas nin. Sed fakte ni konstante faras kolektivajn oferojn por abstrakta pli alta havaĵo. Ni

23 En la Unua kaj Dua Mondmilitoj en Usono, Britujo kaj Kanado estis diversaj nomoj por „victory gardens" [„venko-ĝardenoj"] kaj „victory bonds" [„venko-pruntaĵoj"]; aliaj nomoj estis ekz-e „war gardens" [„milit-ĝardenoj"] kaj „defense bonds" [„defend-pruntaĵoj"]. Ina Zeisinger-Bargielowska, *Austerity in Britain: Rationing, Controls, and Consumptiuon, 1939-1955* (Oksfordo: Oxford University Press, 2000), p. 54 s; Amy Bentley, *Eating for Victory: Food Rationing and the Politics of Domesticity* (Ĉikago: University of Illinois Press, 1998), p. 138-139; Franklin D. Roosevelt, „Statement Encouraging Victory Gardens", 1-an de aprilo 1944, The American Presidency Project, http://www.presidency.ucsb.edu

oferas niajn pensiojn, niajn akre elbatalitajn laborrajtojn, niajn artsubtenojn kaj la posttagmezan prizorgadon en la lernejoj. Niaj infanoj devas lerni en ĉiam pli grandaj klasoj kaj estas instruataj de ĉiam pli stresataj instruistoj. Ni akceptas la drastajn prezaltigojn por la detruaj energifontoj, kiuj certigas nian moviĝemon kaj kiuj estas la brulaĵo kaj pelforto de nia vivo. Ni akceptas, ke la bus- kaj metro-tarifoj altiĝas, dum la servo restas sama aŭ eĉ malboniĝas. Ni akceptas, ke la studado ĉe publika universitato trudas al ni ŝuldomonton, kiun ni dum nia duona vivo repagos – ideo ankoraŭ neimagebla antaŭ nur unu generacio. En Kanado, kie mi vivas, ni nun devas alkutimiĝi al tio, ke la poŝtaĵoj jam ne liveriĝas al nia domo.

De tridek jaroj oni ĉiam malpli investas en la publikan sektoron. Oni defendas ĉion ĉi nome de la malabundo, konsumredukto, kiu nuntempe devas servi kiel pravigo por la senĉesaj kolektivaj oferoj. Antaŭe, aliaj vortoj kaj esprimoj, same disigitaj de la ĉiutaga vivo, servis por simila celo: ekvilibra buĝeto, altigo de efikeco, instigo al ekonomia kresko.

Se ni povas oferi tiom multajn kolektivajn atingaĵojn por la stabiligo de sistemo, kiu faras la ĉiutagan vivon pli multekosta kaj pli danĝera, ŝajnas al mi ke tiam ni devus esti ankaŭ kapablaj fari kelkajn grave necesajn ŝanĝojn en nia vivstilo por stabiligi la fizikajn sistemojn de kiuj la tuta vivo sur la Tero dependas. Tiom pli, ke multaj el la necesaj ŝanĝoj por radikala malaltigo de la karbondioksidaj ellasoj ankaŭ klare plibonigus la vivkvaliton de la plej multaj homoj sur la Tero – la infanoj en Pekingo povus ekstere ludi sen spirmaskoj, kaj milionoj de bonaj laborlokoj kreiĝus en la kampo de senpolucia energio. Ŝajnas, ke ne ekzistas manko de mallongtempaj kaj de meztempaj instigoj por fari la ĝuston por nia klimato.

La tempo mallongas, tute klare. Sed ni povus jam morgaŭ devontigi nin rigore malaltigi la $CO_2$-ellason kaj, helpe de la koncerna teĥnologio, transiri al energifontoj sen-$CO_2$. Ĝis la fino de tiu ĉi jardeko kompleta alikonstruo povus jam esti komencita. La instrumentaro jam nun disponeblas. Estas vere, ke la marnivelo tamen altiĝus kaj ŝtormegoj venus, sed ni havus multe pli grandan ŝancon por malebligi vere katastrofan varmigon. Tutaj landoj saviĝus kontraŭ la marondoj. „Se mi forbruligis vian domon”, foje diris Pablo Solón, la eksambasoro de

Bolivio ĉe la Unuiĝinta Naciaro, „la minimumo, kion mi povas fari por vi, estas akcepti vin en mia domo. Kaj se mi ĝuste en tiu ĉi momento ekbruligas ĝin, mi preferte tuj komencu estigi la fajron.”[24]

Sed ni ne komencas estigi la fajron. Ni male ankoraŭ pli vigligas la fajron per benzino. Post malaltiĝo en la jaro 2009 – escepto pro la tutmonda financa krizo – la tutmondaj ellasoj en 2010 kreskis je 5,9 elcentoj! Tio estas la plej granda absoluta pliiĝo ekde la industria revolucio.[25]

Do mi renvenas al la demando: Kio okazis al ni? Kio vere detenas nin estingi la fajron, kiu minacas forbruligi nian komunan domon?

Mi kredas, ke la respondo estas multe pli simpla ol multaj volas kredigi al ni: Ni ne faris la necesajn agojn por redukti la ellasojn, ĉar tiuj agoj staras en fundamenta kontraŭeco al la malreguligita kapitalismo, la reganta ideologio, ekde kiam ni klopodas por trovi eliron el la krizo. Ni ne progresas, ĉar la disponoj, kiuj plej taŭgus por malebligi la katastrofon – kaj kiuj profitigus al la plej granda parto de la homaro – estas ekstrema minaco por la elita malplimulto, kiu tenas nian ekonomion, nian politikan procezon kaj niajn plej gravajn komunikilojn en strangolado. En alia momento de la historio la problemo eble estintus superebla. Sed kiel komunumo ni havas la grandan malbonŝancon, ke la scienco faris sian klaran diagnozon de klimata minaco ĝuste en la momento, en kiu la elitoj ĝuis ne limigitan politikan, kulturan kaj intelektan potencon tiom, kiom ne plu post la 1920-aj jaroj. Efektive, registaroj kaj sciencistoj komencis jam en 1988 serioze pensi pri radikala malpliigo de la forcejaj gasoj – precize en la jaro, kiu kun la subskribo de la usona-kanada liberkomerca traktato, la mondvaste plej granda duflanka komerca rilato, markis la komencon de la tiel nomata „tutmondigo”. La traktato estis poste etendita, kun Meksiko, al la Nordamerika Liberkomerca Traktato (NAFTA).[26]

Kiam historiistoj retrorigardas al la lastaj dudek kvin jaroj de inter-

24 Pablo Solón, „Climate Change: We Need to Guarantee the Right to Not Migrate”, Focus on the Global South, http://focusweb.org.

25 Glen P. Peters k.a., „Rapid Growth in $CO_2$ Emissions Afteer the 2008-2009 Global Financial Crisis”, *Nature Climate Change 2* (2012), p. 2

26 Spencer Weart, *The Discovery of Global Warming* (Kambriĝo, MA: Harvard University Press, 2008), p. 149.

naciaj traktadoj, tiam du grandaj formadprocezoj elstaras. Unuflanke la klimata procezo, stumblante kaj lamante kaj fine maltrafanta siajn celojn, kaj aliflanke la konzern-stirita rapidega procezo de tutmondigo, kiu atingas unu venkon post la alia: de la unua nomita unua liberkomerca traktato tra la fondo de la Monda Organizaĵo pri Komerco, la sennombraj privatigoj en la ekonomioj de la eksaj sovetiaj ŝtatoj, la transformado de vastaj partoj de Azio en gigantajn liberkomercajn zonojn ĝis la „strukturadoptigaj programoj" en Afriko. Kompreneble okazis ankaŭ malprogresoj en la tutmondiga procezo – ekz-e la prokrastado de komercaj intertraktoj kaj de liberkomercaj interkonsentoj pro publikaj protestoj. Sed la ideologiaj fundamentoj de tiu projekto estis sukcese ankritaj, projekto ĉe kiu envere neniam temis pri translima komerco – ekz-e vendi francan vinon en Brazilo aŭ usonajn komputilprogramojn en Ĉinujo. Ĉiam temis pri tio, uzi tiujn amplekajn interkonsentojn kaj serion de ceteraj instrumentoj por krei tutmondan politikan kadron, kiu donis al la multnaciaj konzernoj la maksimuman liberecon produkti siajn varojn kiom eble plej malmultekoste kaj vendi ilin kiom eble plej libere de reguladoj – kaj ĉe tio pagi kiom eble plej malmulte da impostoj. La plenumado de tiu dezirlisto, tiel oni diris al ni, instigus la ekonomian kreskon, de kiu ni lastanalize ĉiuj profitus. Sed la komercaj traktatoj gravis nur tiom, kiom ili kongruis kun tiu pli ampleksa agendo kaj malkaŝe esprimis ĝin.

Ni konas eĉ tro bone la tri politikajn kolonojn de tiu ĉi nova erao: privatigo en la publika sektoro, malreguligo de la entreprena sektoro kaj malaltigo de la impostoj por entreprenoj, financataj per tranĉoj en la publikaj elspezoj. Oni jam multe skribis pri la realaj kostoj de tiu politiko – la malstabileco de la financmerkatoj, la ekscesoj de la superriĉuloj kaj la malespero de la pli kaj pli malhaveblaj malriĉuloj kaj la lamentinda stato de la publika infrastrukturo kaj de la publikaj servoj. Sed oni publikigis tre malmulte pri tio, kiel la merkata fundamentismo dekomence sisteme sabotis nian kolektivan respondon al la klimatŝanĝo, al minaco, kiu ĝuste en tiu momento staris antaŭ la pordo, kiam tiu ideologio spertis sian plej grandan floradon.

La kerna problemo troviĝis en tio, ke la publika vivo tiam staris tiom sub la klabo de la merkatideologio, ke la plej rektaj kaj evidentaj respondoj al la klimatŝanĝo aperis kiel politike herezaj. Kiel socio povus ekz-e amase investi en publikajn transportilojn kaj infrastruk-

turojn, kiam la publika sektoro estis sisteme malmuntata kaj disvendata? Kiel la ŝtato povus pli forte reguligi la fosilian industrion, impostigi ĝin kaj submeti ĝin al punoj, se ĉiuj ĉi disponoj estis fifamigataj kiel restaĵoj de la komunista planekonomio? Kaj kiel la sektoro de renovigeblaj energioj, kiuj devis anstataŭi la fosiliajn brulaĵojn, povus akiri la por tio necesajn apogajn kaj protektajn disponojn, kiam „protektismo" estis insultvorto?

La klimatmovado povintus provi batali kontraŭ la ekscesa ideologio, kiu blokis tiom da saĝaj disponoj, kaj kuniĝi kun aliaj sektoroj, por montri, kiel la senbrida konzernpovo riskas la priloĝeblon de la Tero. Anstataŭ tio, grandaj partoj de la klimatmovado malŝparis valorajn jarojn per la provo kvadratigi la cirklon, findante ke la malreguligita kapitalismo, la libera merkato mem trovos solvojn por la problemo. (Kvankam mi rimarkis nur post jaroj, kiom profundaj estas la implikoj inter la grandaj poluistoj kaj la grandaj medi-organizaĵoj.)

Sed la venkado de la merkatfundamentismo akrigis la klimatan krizon tiutempe ne nur per blokado de efikaj disponoj por protekti la klimaton. La politikaj decidoj, kiuj praktike liberigis la multnaciajn konzernojn el ĉiaj limigoj, ankoraŭ pli rekte kontribuis al la baza kaŭzo de la Ter-varmigo – la altigo de la forcejaj gasoj. La nombroj estas frapaj: en la 1990-aj jaroj, kiam la projekto de merkat-integrado ĵus komencis, la tutmondaj ellasoj kreskis jare je 1 elcento. En la 2000-aj jaroj, kiam „soljlolandoj" kiel Ĉinujo estis komplete integritaj en la mondan ekonomion, la ellasoj katastrofe pafis supren – dum preskaŭ la tuta unua jardeko la jara kreskokvoto estis 3,4 elcentoj. La rapida kresko daŭras ĝis hodiaŭ, interrompita nur en la jaro 2009 de la mondvasta financa krizo.[27]

Retrovide apenaŭ direblas, kiel tio povintus okazi alie. Tiu erao estis stampita de du faktoroj, la amasa eksporto de produktoj tra grandaj distancoj (ĉe konstanta bruligado de fosiliaj energiportantoj) kaj la

27 Corrine Le Quéré k.a., „Trends in the Sources and Sinks of Carbon Dioxide", Nature Geoscience 2 (2009), p. 832, kiel citita en Andreas Malm, „China as Chimney of the World: The Fossil Capital Hypothesis", *Organization & Environment 25* (2012): p. 146; Glen P. Peters k.a., „Rapid Growth in $CO_2$ Emissions After the 2008-2009 Global Financial Crisis", *Nature Climate Change 2* (2012), p. 2.

eksporto de unike malŝparega modelo de konsumado, de produktado kaj de kampkulturo (kiu ankaŭ baziĝas sur trouzado de fosiliaj energiportantoj) eĉ en la plej forajn angulojn de la mondo. Per aliaj vortoj, la liberigo de la mondaj merkatoj, instigita de la elminado de neniam estiĝintaj kvantoj de fosiliaj brulaĵoj, dramece akcelis ĝuste tiun procezon, kiu akvigas la glacion de Arkto.

Kaj pro tio ni troviĝas nun en ekstreme malfacila kaj iom paradoksa situacio. Ĉar dum jardekoj ni ĵetis $CO_2$ en la ĉielon, kiam envere ni devintus redukti la ellasojn, la disponoj por malebligi katastrofan varmigon troviĝas nun ne nur en kontraŭeco al la malreguligita kapitalismo, kiu en la 1980-aj jaroj komencis sian venkadon, sed al la kerna slogano de nia ekonomia modelo: kreski aŭ cedi.

Ekde kiam karbondioksido estas liberigita en la aeron, ĝi restas tie dum centoj da jaroj, parte ankaŭ pli longe, kaj retenas la varmon. La efikoj estas kumulaj kaj kun la tempo fariĝas ĉiam pli gravaj. Laŭ la specialisto pri ellasoj Kevin Anderson ĉe la *Tyndall Centre* (kaj aliaj), en la pasintaj dudek jaroj tiom da karbondioksido akumuliĝis en la atmosfero, ke nia sola espero teni la varmigon sub la internacie interkonsentita valoro de 2 celsiaj gradoj, konsistas en tio, ke la riĉaj landoj reduktas siajn ellasojn je proksimume 8 ĝis 10 elcentoj jare.[28] La „libera" merkato simple ne povas plenumi tiun taskon. Tiom egale restanta redukto de ellasoj okazis ĝis nun nur ĉe ekonomiaj kolapsoj aŭ gravaj malkreskoj de la konjunkturo.

En la dua ĉapitro mi parolos pli detale pri la nombroj, sed fine gravas unu afero: Nia ekonomia sistemo kaj nia planeda sistemo troviĝas inter si en milito. Aŭ pli precize dirite, nia ekonomia sistemo militas kontraŭ multaj vivoformoj sur la Tero, interalie kontraŭ la homo. Tio, kion nia klimato bezonas por ne kolapsi, estas redukto de la resurso-konsumo de la homo; tio, kion nia ekonomia modelo postulas, por ne kolapsi, estas senbara ekspansio. Nur unu el tiuj reguladsistemoj ŝanĝeblas, kaj tiu ne estas la naturleĝoj.

28 Kevin Anderson kaj Alice Bows, „Beyond 'Dangerous' Climate Change: Emission Scenarios for a New World", *Philosophical Transactions of the Royal Spcoety A 369* (2011). ü. 35; Kevin Anderson, „EU 2030 Decarbonisation Targets and UK Carbon Budgets: Why So Little Science?", Kevin Anderson.info, 14-an de junio 2013, http://kevinandereson.info.

Bonŝance absolute eblas ŝanĝi nian ekonomion kaj formi ĝin tia ke ĝi domaĝas la resursojn, kaj tio en justa maniero, tiel ke la malfortuloj estas protektataj kaj la respondeculoj portas la pli grandan parton de la ŝarĝo. Oni povas instigi $CO_2$-ŝparajn ekonomiajn branĉojn al ekspansio kaj al kreado de laborlokoj kaj samtempe apogi ŝrumpadon en partoj de alta karbondioksida ellaso. La problemo tamen troviĝas en tio, ke tia mezuro de ekonomia planado kaj kontrolado rompas la limojn de la reganta ideologio. Nia aktuala sistemo kapablas reduktiĝi nur per unu maniero: per brutala kraŝo, kaj en tiu kazo la plej malfortaj homoj suferas plej.

Do, restas al ni nur la elekto inter du ekstremoj: Allasi, ke la klimatŝanĝo ĝisfunde ŝanĝas nian mondon, aŭ pli aŭ malpli ĝisfunde ŝanĝi nian ekonomion, por eviti tiun sorton. Sed unu afero devas esti klara al ni: Nia jardekojn longa kolektiva neado de la problemo malebligis ĉiajn laŭgradajn, laŭpaŝajn solvojn. Singardemaj korektadoj de la nuna stato jam ne estas opcio, ekde kiam ni en la 1990-aj jaroj komencis pufigi la „amerikan" (usonan) revon al supergrando kaj poste disvastigis tiun koncepton en la tuta mondo. Kaj jam ne estas nur radikaluloj, kiuj opinias radikalan ŝanĝon necesa. En 2012 dudek unu gajnintoj de la *Blue Planet Prize* – inter ili James Hansen, la eksa direktoro de la *Goddard*-instituto pri spacaj studoj de la NASA (*NASA Goddard Institute for Space Studies*), kaj la norvega eksa ĉefministrino Gro Harlem Brundtland – verkis vojmontran raporton. En ĝi legeblas: „Vide al senprecedenca krizo, la socio ne havas alian elekton ol fari drastajn disponojn por malebligi pereon de la civilizacio. Aŭ ni ŝanĝas nian vivmanieron kaj kreas komplete novan mondsocion, aŭ nia vivmaniero ŝanĝiĝas por ni."[29]

Tion multaj homoj en gravaj pozicioj povas nur malfacile akcepti, ĉar ĝi dubindigas ion, kio eble estas ankoraŭ pli potenca ol la kapitalismo, nome la fetiĉo de interkonsent-politiko – esti saĝa kaj sobra, renkontiĝi en la mezo kaj tro emociiĝi pri nenio. Tio estas la dominanta pensado de nia epoko, kaj ĝi estas multe pli disvastiĝinta inter maldekstruloj, kiuj okupiĝas pri klimatpolitiko, ol inter konservativuloj, de kiuj multaj simple neas la ekziston de krizo. La klimatŝanĝo

29 Gro Harlem Brundtland k.a., „Environment and Development Challenges: The Imperative to Act", komuna papero de la premiitoj de la Blue Planet Prize, The Asahi Glass Foundation, 20-an de februaro 2012, p. 7.

estas grava minaco por tiu modera kurso, ĉar hezitantaj disponoj efikos neniom: La programoj de la prezidanto Obama sub la moto „Ĉiuj respondoj estas ĝustaj”, kiel li mem priskribas sian ag-metodon, havas proksimume tiajn perspektivojn por sukceso kiel la dietojn „vi povas manĝi ĉion”, kaj la klaraj tempolimoj, kiujn la scienco indikas, postulas, ke ni fine esprimu nian koleron.

Per tio, ke mi prezentas la klimatŝanĝon kiel batalon inter la kapitalismo kaj la Tero, mi ne anoncas novajn saĝojn. La batalo estas jam okazanta, sed en la momento gajnas la kapitalismo, sen ke ĝi bezonas ion fari por tio. Ĝi gajnas ĉiufoje, kiam ekonomia kresko servas kiel preteksto por ree prokrasti la klimatprotekton aŭ por ne plenumi konsentitajn ellas-celojn. La kapitalismo venkas, kiam oni klarigas al la grekoj, ke ilia sola eliro el la ekonomia krizo konsistas en tio, ke ili en sia mirinde bela maro permesu alte riskajn petrol- kaj gas-boradojn. Ĝi venkas, kiam oni kredigas al la kanadanoj, ke ilia sola espero ne fini kiel la grekoj konsistas en dehakado de iliaj nordaj pingloarbaroj por atingi la dikfluan bitumenon en la gudrosablo de la provinco Alberto. Ĝi venkas, kiam parko en Istambulo devas cedi por krei spacon por plia aĉetcentro (*shopping mall*). Ĝi venkas, kiam en Pekino oni klarigas al gepatroj, ke estas akceptebla prezo por la ekonomia progreso, se ili devas sendi siajn tusantajn infanojn en spirmaskoj kun gajaj trukfilmaj vizaĝoj. Ĝi venkas ĉiufoje, kiam ni rezigne akceptas, ke ni havas jam nur la elekton inter du malbonoj: malabundo aŭ elminado de krudmaterialoj, veneniĝo aŭ malriĉeco.

La defio do ne konsistas en tio, preni multan monon en la manon kaj nove difini la politikan direkton, sed pensi alie, radikale alie, por ke ŝanĝo eĉ nur ebliĝu. En la nuna momento la reganta merkatlogiko kun sia etiko de dominado kaj de konkuro paralizas preskaŭ ĉiajn seriozajn klopodojn en la batalo kontraŭ la klimatŝanĝo. Ruiniga konkurenco inter la landoj de jardekoj blokas la UN-klimatajn intertraktadojn: La riĉaj landoj obstinas kaj deklaras, ke ili ne malaltigos siajn ellasojn, ĉar ili ne volas riski perdi siajn pintajn poziciojn en la tutmonda hierarĥio; la pli malriĉaj landoj insistas pri sia rajto polui la medion tute same kiel ni riĉaj landoj faris tion sur nia vojo al prospero, kvankam tio ankoraŭ pli malbonigas la katastrofon, sub kiu la malriĉuloj plej suferas. Por ŝanĝi ion en tio, mondpercepto devas trudiĝi, kiu ne vidas la naturon, aliajn landojn kaj niajn proprajn naj-

barojn kiel kontraŭulojn, sed kiel partnerojn en grandioza projekto, en kiu ĉiuj nove inventas sin.

Tio estas granda postulo. Sed ĝi estas ankoraŭ pli akra: Ĉar ni tiom longe prokrastis la tuton, ni devas ekfunkciigi tiun masivan ŝanĝon nun senprokraste. La Internacia Energiagentejo avertas, ke nia fosilia ekonomio definitive fiksos danĝeran varmigon, se ni ne sukcesas kontroli niajn ellasojn ĝis la timinde proksima jaro 2017. „La tiam ekzistanta energi-infrastrukturo produktos la tutan kvanton de $CO_2$", kiun nia buĝeto planas, se ni volas limigi la varmigon al 2 celsiaj gradoj, „kaj ne toleras spacon por kromaj centraloj, fabrikoj kaj ceteraj infrastrukturaj instalaĵoj, se tiuj ne estas sen ellaso de $CO_2$, kaj tio estus ekstreme multekosta." Do, oni verŝajne tute prave deiras de tio, ke la registaroj ne pretus devigi la fermon de daŭre profitigaj centraloj kaj fabrikoj. Fatah Birol, la ĉefekonomikisto de la Internacia Energi-Agentejo, diras tion tute senorname: „La pordo por la 2-grada celo baldaŭ fermiĝos. En 2017 ĝi definitive fermiĝos." Mallonge, ni atingis – en la vortumo de kelkaj aktivuloj – la „jardekon nulo" de la klimata krizo: Aŭ ni ŝanĝas nin nun aŭ ni maltrafis la ŝancon.[30]

Ĉio ĉi signifas, ke la kutimaj trankviligaj frazoj de la merkat-fundamentistoj – Ni staras ĝuste antaŭ teĥnika solvo! Malpura evoluo estas nur fazo survoje al pura medio, oni rigadu nur la Londonon de la 19-a jarcento! – ĉi-foje ne funkcias. Ni ne plu havas cent jarojn, por ke Ĉinujo kaj Hindujo povu transiri siajn Dickens-fazojn. Ĉar ni perdis jardekojn, ni devas nun sukcesigi la ŝanĝon. Ĉu tio eblas? Absolute. Ĉu tio eblas, sen ataki la bazajn regulojn de la senreguligita kapitalismo? Neniel.

Unu el la homoj, kiujn mi renkontis en tiu ĉi vojaĝo kaj kiujn vi ekkonos en tiu ĉi libro, estas Henry Red Cloud, Lakota-indiano kaj entreprenisto, kiu instruas junajn praloĝantojn por fariĝi sunenergiaj teĥnikistoj. Li rakontas al siaj studentoj, ke ekzistas tempoj, en kiuj ni devas akcepti malgrandajn progresojn – kaj aliaj tempoj, „en kiuj oni devas kuregi kiel buflo".[31] Nun estas tia tempo, en kiu ni devas kuregi.

30 „World Energy Outlook 2012", IEA, p. 40; James Herron, „Energy Agency Warns Governments to Take Action Against Global Warming", *Wall Street Journal*, 10-an de novembro 2011.

31 Persona intervjuo kun Henry Red Cloud, 22-an de junio 2011.

# Potenco, ne nur energio

Antaŭ mallonge mi legis je mia surprizo ian kulpokonfeson de Gary Stix, gvidanta redaktisto de la *Scientific American*. En 2006 li eldonis specialan eldonon pri respondoj al la klimata ŝanĝo, kaj kiel tiel ofte ĉe tiu temo la artikoloj grandparte koncentriĝis al prezentado de mirigaj teĥnologioj kun malalta ellaso de $CO_2$. Sed en 2012 Stix skribis, ke li pretervidis multe pli grandan kaj multe pli gravan parton de la historio – nome ke ni devas krei la sociajn kaj politikajn kadrokondiĉojn, por ke la teĥnologia ŝanĝo entute havu ŝancon anstataŭi la tro profitigan nunan staton. „Se ni vere volas efike kontraŭagi la klimatŝanĝon, ni devas koncentriĝi al radikalaj solvoj en la socia sfero. La relativa efikeco de la venonta generacio de sunenergiaj ĉeloj, kompare kun tio, estas sensignifa."

En tiu ĉi libro temas pri tiuj ĉi radikalaj ŝanĝoj sur socia same kiel sur politika, ekonomia kaj kultura nivelo. Malpli interesas min la teĥnikaj aspektoj de la transformo – la transiro de fosilia al renovigebla energio, de individua al amasa transporto, de kreskaĉantaj antaŭurboj al dense konstruitaj urbocentroj favoraj al piedirantoj –, sed pli la potencpolitikaj kaj ideologiaj baroj, kiuj ĝis nun malebligis, ke ia ajn el la delonge agnoskataj solvoj realiĝu en necesa amplekso.

Ŝajnas al mi, ke nia problemo multe malpli rilatas kun la teĥnika flanko de la sunenergio ol kun potencpolitiko – speciale kun la demando, ĉu eblas potenc-deŝovo de la grandaj konzernoj al komunumoj. Tio siavice dependas de tio, kiom la amaso de tiuj homoj, kiuj en la nuna sistemo malprosperas, sukcesas fariĝi socia potenco sufiĉe decida kaj multfaceta por ŝanĝi la potenckondiĉojn. Ĉe la esploradoj por tiu ĉi libro mi ankaŭ atingis la ekkonon, ke tiu ŝanĝo postulos alipensadon pri la esenco de politika potenco – pri nia rajto elminigi ĉiam pli da resursoj sen porti la konsekvencojn de tio, pri nia kapablo submeti al nia volo kompleksajn naturajn sistemojn. Tiu ĉi ŝanĝo ne nur dubindigas la kapitalismon, sed la konsistigajn erojn de la materiismo, sur kiu la moderna kapitalismo baziĝas, pensmanieron, kiun iuj nomas „elminejismo".

Ĉar malantaŭ ĉio ĉi troviĝas pli profunda vero, kiun ni ĉiuj evitas: ke la klimatŝanĝo ne estas „problemo" aldonebla al la listo de farenda-

ĵoj, tuj post sanprizorgado kaj impostoj. Ĝi estas veksignalo por la civilizacio. Potenca mesaĝo – transdonita en la lingvo de fajroj, inundoj, malsekecoj kaj specimortado –, kiu diras al ni, ke ni bezonas ĝisfunde novan ekonomian modelon, kaj novan manieron kundividi la Teron inter ni. Kiu diras al ni, ke ni devas plu evolui.

## Ĉeso de neado

Iuj diras, ke por tia alikonstruado jam ne estas tempo; ke la krizo tro urĝas kaj ke la horloĝo tiktakas. Ĝuste, estus aŭdaca aserti, ke la sola solvo de la krizo konsistas en tio, revoluciigi nian ekonomion kaj ĝisfunde ŝanĝi nian mondpercepton kaj ke ĉio alia estas ĉiukaze senutila. Ekzistas multaj eblaj disponoj kiuj konsiderinde malaltigus la ellasojn kaj kiujn oni tuj povus kaj devus fari. Sed ni ne faras tion. La kaŭzo de tio estas, ke per nia preterlaso fari la grandajn batalojn por ŝanĝi la ideologian direkton kaj la sociajn potencrilatojn iom post iom kreis kuntekston, en kiu forta reago al la klimatŝanĝo ŝajnas esti malebla, speciale en tempoj de ekonomia krizo (kiu de kelka tempo ŝajnas regi daŭreme).

Tiu ĉi libro do proponas alian strategion: pensi grandskale, komenci tute profunde kaj fiksi la ideologiajn mezurilojn tre malproksime de la subpremanta merkatfundamentismo, kiu montriĝis kiel la plej granda malamiko por la bonfarto de la Tero. Se ni povas nur iomete deŝovi la kulturan kuntekston, tiam aperas eta spaco por saĝaj reformoj, per kiuj la parto de karbondioksido en la aero moviĝus almenaŭ en la ĝustan direkton. Kaj venki estas kontaĝa, do kiu scias? Eble kelkaj el la ideoj en tiu ĉi libro, kiuj hodiaŭ ŝajnas al ni nekredeble radikalaj – baza enspezo por ĉiuj, nova komerca juro, vera agnosko de la rajtoj de indiĝenaj popoloj, por protekti grandajn partojn de la mondo kontraŭ medidetrua elminado de krudmaterialoj – en kelkaj jaroj sonas tute saĝaj aŭ eĉ substancaj.

De kvaronjarcento ni provas alkonduki singardan, popaŝan ŝanĝon, adapti la fizikajn bezonojn de la planedo al la bezonoj de ekonomia modelo, kiu alstrebas konstantan kreskon kaj ĉiam novajn profiteblecojn. La rezultoj estis katastrofaj kaj metis nin en ankoraŭ pli danĝeran situacon ol komence de la eksperimento.

Kompreneble ne ekzistas garantioj por tio, ke sistema metodo havas pli bonajn ekspektojn de sukceso – kvankam, kiel ni poste ankoraŭ vidos, ekzistas historiaj ekzemploj, kiuj esperigas. La vero estas: Tiu ĉi estas mia ĝis nun plej malfacila libro, ĉar la esplorado por ĝi kondukis min al tiom radikalaj respondoj. Mi ne dubas pri ilia neceso, sed ĉiutage mi pridubas ilian politikan fareblon, speciale ĉar la klimatŝanĝo metas al ni tiom mallongan kaj tiom senindulgan tempolimon.

Ankaŭ pro personaj kialoj al mi malfacilis verki tiun ĉi libron.

Kio plej ĉagrenas min, ne estas la sciencaj studaĵoj pri degelantaj glaĉeroj, kiujn mi antaŭe evitis, sed la libroj, kiujn mi antaŭlegas al mia dekdujara filo. Unu el liaj favorataj libroj havas la titolon „Serĉante la rangiferon”. Temas pri kelkaj infanoj, kiuj ege deziras iam vidi rangiferon. Ili serĉas ĉie, en arbaro, en marĉo, en dorna vepraĵo kaj sur monto, serĉante „longkruran, tubernazan, kornaron portantan rangiferon”. La spritaĵo estas, ke sur ĉiu paĝo kaŝiĝas rangifero. Fine ĉiuj bestoj venas el siaj kaŝejoj, kaj la infanoj krias entuziasem: „Ni ankoraŭ neniam vidis tiom da rangiferoj!”

Kiam mi antaŭlegis al li tiun libron proksimume la sepdek kvinan fojon, frapis min ekkono: Mia filo eble neniam vidos rangiferon. Mi provis regi min. Poste mi eksidis ĉe la komputilo kaj komencis skribi miajn travivaĵojn en norda Alberto, la gudrosabla regiono, kie la membroj de la *Beaver-Creek*-nacio rakontis al mi, kio okazis kun la rangiferoj. Virino priskribis al mi, ke dum ĉasado ŝi mortigis rangiferon, kies karno estis jam verda. Mi aŭdis ankaŭ multon pri strangaj tumoroj, kiuj laŭ la opinioj de la lokanoj estis kaŭzitaj de tio, ke la bestoj trinkis akvon poluitan de gudrosablaj venenoj. Sed precipe mi aŭdis pri tio, ke la rangiferoj simple malaperis.

Kaj ne nur en Alberto. „Rapida klimatŝanĝo transformas la Nordajn Arbarojn en rangifer-tombejon”, titolis la *Scientific American* en majo de 2012. Jaron kaj duonon poste, la *New York Times* raportis, ke unu el la du rangiferaj populacioj de Minesoto, kun kvar mil bestoj en la 1990-aj jaroj ŝrumpis al nur cent.[32]

32 Gary Stix, „Effective World Government Will Be Needed to Stave Off Climate Catastrophe”, *Scientific American*, 17-an de marto 2012.

Ĉu mia filo iam ajn vidos rangiferon?

Alifoje afliktis min malgranda bildlibro. Ĝi montris plej diversajn bestojn ĉe karesa alpremiĝo, kaj ĉiufoje troviĝis gaja frazo pri la respektiva pozicio. Ekzemple: „Kiel karese alpremiĝas la vesperto?" – „Surkape, surkape." Pro ia kialo mia filo ĉiufoje ridegas ĉe tiu paĝo. Mi klarigas al li, ke vespertoj dormas kun la kapo malsupre.

Sed ĉe tio mi devis la tutan tempon pensi pri raporto, laŭ kiu meze de rekorda varmego en parto de *Queensland* en Aŭstralio centmiloj da mortintaj kaj mortantaj vespertoj falis el la ĉielo. Tutaj kolonioj estis neniigitaj.[33]

Ĉu li iam ajn vidos vesperton?

Mi sciis, ke mi havis problemon, kiam mi antaŭ nelonge rimarkis, ke mi debatis kun marstelo. Ruĝaj kal violkoloraj ekzistas nur ĉe la roka marbordo de Brita Kolumbio, kie miaj gepatroj vivas, mia filo naskiĝis kaj mi pasigis la duonon de mia plenkreskula vivo. Infanoj amas tiujn marstelojn, ĉar oni povus vere bele rigardi ilin, se oni singarde levas ilin. „Tio estas la plej bela tago en mia vivo!", kriis mia sepjara nevino Miriam, kiu estis vizite ĉe ni el Ĉikago, post longa posttagmezo en la tajdaj marĉoj.

Sed aŭtune de 2013 komencis disvastiĝi historioj pri stranga malsano, kiu en la pacifika marbordo mortigis marstelojn dekmilope. Oni nomis tion „*sea star wasting syndrom*", ĉe kiu multaj specoj vivante disfalas. La animaloj transformiĝis en kurbitaj amasetoj, iliaj brakoj defalis kaj iliaj korpoj ŝrumpis. La sciencistoj staris antaŭ enigmo.[34]

Kiam mi legis tiujn historiojn, mi kaptis min ĉe la deziro, ke tiuj senvertebraj animaloj ankoraŭ eltenu jaron – ĝis kiam mia filo povu ĝui ilian belecon. Poste venis la duboj: Eble estas pli bone, se li neniam vidu marstelon, almenaŭ ne en tia stato …

33 Daniel Cusick, „Rapid Climate Changes Turn North Woods into Moose Graveyard", *Scientific American*, 18-an de majo 2012; Jim Robbins, „Moose Die-Off Alarms Scientists" *New York Times*, 14-an de oktobreo 2013.

34 Josh Bavas, „About 100,000 Bats Dead After Heatwave in Southern Queensland", ABC News (Aŭstralio), 8-an de januaro 2014.

## Ĉeso de neado

Kiam antaŭe tia timo penetris tra mia kiraso el klimatneado, mi faris ĉion por forŝovi ĝin, mi ŝanĝis la televidkanalon, forklakis la paĝon. Nun mi provas allasi ĝin. Ŝajnas al mi, kvazaŭ mi ŝuldus tion al mia filo, same kiel ni ĉiuj ŝuldas tion al ni mem kaj al ni ĉiuj.

Sed kiel ni rilatu kun tiu timo, kiu venas de tio, ke ni vivas sur mortanta planedo, kiu ĉiutage fariĝas malpli loĝebla? Unue, akcepti, ke ĝi ne plu malaperos. Ĝi estas la tute racia reago al la neeltenebla fakto, ke ni vivas en pereanta mondo, en mondo, al kies morto multaj el ni kontribuas per tio, ke ili faras ion kiel: prepari teon, veturi al la nutraĵbazaro kaj, jes, ankaŭ: naski infanojn.

Kaj krome ni devas uzi ĝin. Timo estas reago por transvivi. Timo igas nin forkuri, alten salti, ĝi vekas superhomajn fortojn en ni. Sed ni devas havi celon, al kiu ni povas kuri. Sen celo, timo estas simple nur paraliza. La sola truko, la sola espero do konsistas en tio, ke ni povas mildigi kaj kompensi la timon antaŭ estonteco malamika al la vivo per la perspektivo de tio, ke ni povos krei ion pli bonan ol tio, kion multaj el ni eĉ nur kuraĝis esperi.

Jes, ni perdos multon, devos rezigni pri pluraj luksaĵoj, tutaj industribrancoj malaperos. Kaj jam estas tro malfrue por ankoraŭ haltigi la klimatŝanĝon; ĝi jam estas ĉi tie, kaj ĉiam pli teruraj katastrofoj venos al ni, sendepende de tio, kion ni faras. Sed ankoraŭ ne estas tro malfrue por eviti la plej malbonan, kaj ankoraŭ estas tempo por ŝanĝi nin mem, por ke ni ne traktu nin reciproke tiom kruele, kiam tiuj katastrofoj alvenos. Ŝajnas al mi, ke tio estas tre valora.

Ĉar krizo de tia amplekso estas universala, ĝi ŝanĝas simple ĉion. Ĝi ŝanĝas tion, kion ni povas fari, kion ni povas esperi, kion ni povas atendi de ni kaj de niaj politikistoj. Ĝi signifas, ke ĉiuj ĉi aferoj, kiuj laŭdire estas neeviteblaj, devas ĉesi. Kaj ĝi signifas, ke multaj aferoj, kiuj laŭdire estas maleblaj, devas okazi nun tuj.

Ĉu ni povas sukcesi tion? Mi scias nur, ke nenio estas nedetenebla. Escepte la fakto, ke la klimatŝanĝo ŝanĝos ĉion. Kaj por tre mallonga tempo ni havas la manieron de tiu ŝanĝo ankoraŭ en nia mano.

# Parto 1: Malbona tempplanado

„La karbo estas vere ne apud, sed super ĉiuj havaĵoj. Ĝi estas la brulaĵo de la lando – la ĉioma rimedo – la produktadfaktoro en ĉio, kion ni faras.”

*William Stanley Jevons, ekonomikisto, 1865*[1]

„Estas malĝojige, pensi ke la naturo parolas
kaj la homoj ne aŭskultas.”

*Victor Hugo, 1840*[2]

1 William Stanley Jevons, *The Coal Question: An Inquiry Concerning the Progress of the Nation, and the Probabla Exhaustion of our Coal-Mines* (Londono: Macmillan and Co., 1965), p. viii.

2 En la originalo: „C'est une triste chose de songer que lanature parle et que le genre humain n'écoute pas.” Victor Hugo, *Œuvres complètes de Victor Hugo*, vol. 35, ed. de Jeanlouis Cornuz (Parizo: Etitions Rencontre, 1968), p. 145.

# Ĉapitro 1: La dekstruloj pravas: La revolucia forto de la klimatŝanĝo

„Klimatesploristoj unuanimas: La klimatŝanĝo okazas, kaj tio nun kaj ĉi tie. Surbaze de klaraj pruvoj proksimume 97 elcentoj de la klimatesploristoj venis al la konkludo, ke ekzistas homfarita klimatŝanĝo. Tiu opinio estas pruvita ne nur de unuopa studaĵo, sed de multnombraj datumoj el la pasintaj dudek jaroj, kiuj ĉiuj montras en la saman direkton – sciencaj esploraĵoj, enhavaj analizoj de studaĵoj kontrolitaj en la *Peer-Review*-metodo kaj publikaj eldiroj de praktike ĉiuj organizaĵoj de tiukampaj fakuloj."

Raporto de la *American Association for the Advancement of Science*[3] el la jaro 2014

„Tio ne fareblas sen ĝisfunde ŝanĝi la usonan vivstilon, strangoli la ekonomian evoluon kaj forpreni la komercan bazon de grandaj partoj de nia ekonomio."

Tom Donohue, prezidanto de la usona komerca ĉambro, pri ambicia reduktado de la karbondioksidaj ellasoj.[4]

Sinjoro en la kvara vico petas la parolon.

Li prezentas sin kiel *Richard Rothschild* kaj klarigas, ke li kandidatas en *Carroll County* en *Maryland* kiel distrikta konsilanto, ĉar li konvinkiĝis, ke la disponoj por kontraŭbatali la Tervarmigon estas nenio alia ol „atako al la usona meztavola kapitalismo". Lia demando al la fakuloj sur la podio en la hotelo *Marriott* en Vaŝingtono estas: „Ĉu ĉe tiu tuta movado ne temas nur pri verda troja ĉevalo, en kies ventro troviĝas ruĝa, marksisma socialekonomio?"[5]

3 Mariano Malina k.a., „What We Know: The Reality, Risks and Response to Climate Change", The AAAS Climate Science Panel, The American Association for the Advancement of Science, 2014, p. 3

4 Thomas J. Donohue, „Managing a Changing Climate: Challenges & Opportunities for teh Buckeye State, Remarks", parolado de la 1-a de majo 2008 en Columbus, Ohio.

5 Session 4: Public Policy Realities (filmeto), 6th International Conference

Ĉi tie, en la Sesa Internacia Konferenco pri la Klimatŝanĝo, kiun la *Heartland*-Instituto okazigis fine de junio 2011, tio konsiderendas kiel pure retorika demando. Tiu okazaĵo estas la plej grava renkontiĝo por ĉiuj, kiuj neas la sciencan unuanimecon, ke la Tervarmiĝo estas kaŭzata de homa agado. Estas proksimume, kvazaŭ oni demandus ĉe la Germana Federacia Banko, ĉu oni povas fidi la grekojn. Tamen la podiumaj parolantoj ne preterlasas konfirmi al la demandinto, kiom multe li pravas.

Kiel unua respondas Marc Morano, la ĉefo de la klimatskeptika novaĵblogo *Climate Depot*. „Hodiaŭ ni en Usono estas reguligataj ĝis en niaj duŝilokapoj, ampoloj  kaj lavmaŝinoj", li deklaras. Kaj „ni allasas, de la usona SUV antaŭ niaj okuloj sinkas en la tombon." Se la verduloj en tio sukcesos, avertas Morano, ni havos baldaŭ $CO_2$-buĝeton por ĉiu viro, por ĉiu virino kaj por ĉiu infano sur tiu ĉi planedo, kontrolata de internacia instanco."[6]

La venonta estas Chris Horner, *senior fellow* ĉe la *Competitive Enterprise Institute*, kiu specialiĝis en kovrado de specialistoj per sensencaj procesoj kaj sub la preteksto de la rajto je informlibereco eltrovi informojn ĉe instancoj. Li altiras al si la tabolmikrofonon. „Oni povas kredi, ke temas pri la klimato", li opinias malserene, „kaj multaj homoj faras tion, sed tiu kredo estas erara." La frue griziĝinta Horner, kiu kun sia arĝenta hararo povus esti eldiboĉinta sozio de Anderson Cooper, ŝatas citi Saul Alinsky, ikono de la protestmovado de la 1960-aj jaroj: „La problemo ne estas la vera problemo." La problemo evidente troviĝas en tio, ke „nenia libera socio farus al si tion, kion tiu agendo postulas … La una dispono estus forigi la ĝenajn liberecojn, kiuj ĉiam denove baras la vojon."[7]

Laŭ la mezuro de la *Heartland*-instituto, la aserto, ke la klimat-

on Climate Change, The Heartland Institute, 30-an de junio 2011.

6 Saml.

7 „Va. Taxpayers Request Records from University of Virginia on Climate Scientist Michael Mann", American Tradition Institute, gazetara informo, 6-an de januaro 2011; Christopher Horner, „ATI Environmental Law Center Appeals NASA Denial of Request for Dr. James Hansen's Ethics Disclosures", American Tradition Institute, gazetara informo, 16-an de marto 2011; Session 4: Public Policy Realities (filmeto), The Heartland Institute.

ŝanĝo estas konspiro por rabi al la usonanoj ilian liberecon, estas ankoraŭ relative sendanĝera. Dum tiu dutaga konferenco mi fariĝis atestanto, ke la moderna mediprotekta movado estas komparata kun kvazaŭ ĉia amasmurdo en la homara historio, de la katolika inkvizicio tra la naziaj hororaĵoj ĝis la stalinaj purigadoj en Ruslando. Mi aŭdas, ke la elektokampanja promeso de Barack Obama, subteni: rafinejojn por biologiaj brulaĵoj, kompareblas kun la plano de la prezidanto Mao „meti altfornon en ĉiun postkorton" (Patrick Michaels de la Cato Institute). Ke la klimatŝanĝo servas kiel „preteksto por la nacisocialismo" (Harrison Schmitt, eksa respublikana senatano kaj eksa astronaŭto). Kaj ke mediprotektantoj same kiel aztekaj pastroj oferas sennombrajn homojn por kontentigi la diojn kaj ŝanĝi la veteron (same Marc Morano).[8]

Sed antaŭ ĉio mi aŭdas ĉiam novajn variaĵojn de la tezo, kiun la distrikta konsilisto el la kvara vico prezentis: ke la klimatŝanĝo estas troja ĉevalo kaj celas forigi la kapitalismon kaj anstataŭigi ĝin per ia „verda komunitarismo". La klimatŝanĝo, kiel la konferenca proparolanto Larry Bell koncize resumas en sia libro *Climate of Corruption*, „temas malmulte pri la stato de la medio kaj multe pri tio, katenigi la kapitalismon kaj transformi la usonan vivmanieron (*American Way of Life*) en la intereso de tiu tutmonda alidistribuado de la riĉaĵo.[9]

Ĉe tio ili ŝajnigas, ke la delegitoj rifuzas la klimat-esploradon nur ĉar ili serioze pridubas ties ekkonojn. La organizantoj faras ĉiajn klopodojn por veki la ŝajnon de kredinda scienca konferenco, unuflanke per le elekto de ĝia temo, la „Reveno al scienca metodo", aliflanke per la nomoj de siaj aranĝoj: La mallongigo ICCC por *International Conference on Climate Change* nur per unu litero malsamas ol la mondvaste agnoskita aŭtoritato pri la temo klimatŝanĝo, la *Intergovernmental Panel on Climate Change* (Monda klimata konsilantaro), en kiu 195 registaroj kaj miloj da sciencistoj kunlaboras. Sed la diver-

8 Obama for America, „Barack Obama's Plan to Make America a Global Energy Leader", oktobro 2007; persona intervjuo kun Patrick Michaels, 1-an de julio 2011; Session 5: Sharpening the Scientific Debate (filmeto), The Heartland Institute; persona intervjuo kun Marc Morano, 1-an de julio 2011.

9 Larry Bell, *Climate of Corruption: Politics and Power Behind the Global Warming Hoax* (Austin: Greenleaf Books, 2011), p. xi.

saj kontraŭaj teorioj prezentataj en la *Heartland*-konferenco – arboringoj, sunmakuloj, la mezepoka varmperiodo – estas malnovaj gurdaĵoj kaj delonge refutitaj. La plej multaj parolantoj estis eĉ ne sciencistoj, sed ŝatokupaj esploristoj: inĝenieroj, ekonomikistoj kaj advokatoj, krome veteristo, astronaŭto kaj „spacarĥitekto" – kaj ili ĉiuj kredas, ke ili kun siaj duonbakitaj kalkuloj estas pli saĝaj ol 97 elcentoj de la klimatesploristoj mondvaste.[10]

La aŭstralia geologo Bob Carter pridubas, ke la klimato entute varmiĝas, dum la astrofizikisto Willie Soon koncedas, ke certa varmiĝo okazis, sed ke tio havas nenion komunan kun la ellaso de forcejaj gasoj, sed estas la seko de natura fluktuado de la sunaktiveco. Patrick Michaels de la Cato-instituto kontraŭdiras al ambaŭ. Laŭ lia opinio la $CO_2$ efektive altigas la temperaturojn, sed li konsideras la efikojn tiom malgrandaj, ke ni pro tio prefere „entreprenu nenion". Diversaj opinioj estas la korsango de ĉia intelekta kunveno, sed en la *Heartland*-konferenco tiu sufiĉe kontraŭdira materialo absolute ne estigas diskuton inter la neantoj – neniu provas defendi iun el la pozicioj kontraŭ alia aŭ eltrovi kiu pravas. Dum oni projekcias temperaturajn kurbojn al la vando, pluraj anoj de la plejparte iom aĝa publiko ŝajnas eĉ endormiĝi.[11]

Kiam la steluloj de la movado surpaŝas la scenejon – ne triarangaj sciencistoj, sed la unua vico de la ideologiaj militistoj kiel Morano kaj Horner, tiam tamen la publiko vigliĝas. Ĉar la vera celo de la aranĝo konsistas en tio, doni forumon al la ĝisostaj neantoj, en kiu ili povas armi sin per retorikaj slaboj, kiujn ili en la sekvaj semajnoj kaj monatoj batos al la oreloj de la mediprotektantoj kaj klimatesploristoj. La ĉi

10 Peter D.Doran kaj Maggie Kendall Zimmermann, „Examining the Scientific Consensus on Climate Change", Eos 90 (2009), p. 22 s; William R.L. Anderegg k.a., „Expert Credibility in Climate Change" Proceedings of the national Academy of Sciences, 107 (2010), p. 12107 sj.

11 Keynote Address (filmeto), The Heartland Institute, 1-an de julio 2011; Bob Carter, „There IS a Problem with Global Warming … It Stopped in 1998", Daily Telegraph, 9-an de aprilo 2006; Willie Soon kaj David R. Legates, „Avoiding Carbon Myopia: Three Considerations for Policy Makers Concerning Manmade Carbon Dioxide", Ecology Law Currents 37 (2010), p. 3; Willie Soon, „It's the Sun, Stupid!", *The Heartland Institute*, 1-an de marto 2009, http://heartland.org; Keynote Address (filmeto), The Heartland Institute, 30-an de junio 2011.

tie elprovitaj argumentoj plenigos la komentajn kolumnojn sub ĉiu artikolo kaj *YouTube*-filmeto, en kiu aperas la nocioj „klimatŝanĝo" kaj „Tervarmiĝo". Kaj centoj de dekstre orientitaj komentistoj kaj politikistoj remaĉos ilin – de respublikanaj esperportantoj por la prezidantelekto ĝis distriktaj konsilistoj kiel Richard Rothschild. En intervjuo rande de la konferenco Joseph Bast, la prezidanto de la *Heartland*-instituto, fanfaronas pri tio, ke „miloj da artikoloj kaj komentoj kaj paroladoj … baziĝas sur informoj de partoprenantoj de iu el tiuj ĉi konferencoj aŭ estis instigitaj de ili."[12]

La nombro de ĉiuj informaj kontribuaĵoj, kiuj neniam publikiĝis aŭ sendiĝis, estas tamen ankoraŭ pli impresa, kvankam pri tio neniu parolis. En la jaroj antaŭ tiu ĉi konferenco malgraŭ la pliiĝo de ekstremaj veter-okazaĵoj noteblis forta reduktiĝo de la komunikilaj raportoj pri la klimatŝanĝo: en 2007 la tri grandaj usonaj televidkompanioj – CBS, NBC kaj ABC – sendis 147 kontribuaĵojn pri la klimatŝanĝo; en 2011 nur dek kvar. Ankaŭ tio apartenas al la strategio de la klimatneantoj, ĉar ilia celo konsistis neniam nur en disvastigo de duboj, sed ĉiam ankaŭ en timigo – en la klara mesaĝo, ke sole per la temigo de la klimatŝanĝo oni devis atendi en sia poŝta enirpaĝo kaj en siaj komentaj kolumnoj amasojn da venenaj komentoj.[13]

La *Heartland*-instituto, pensfabriko kun sidejo en Ĉikago, kiu dediĉas sin al „subtenado de merkatekonomiaj solvoj", okazigas tiajn konferencojn ekde 2008 unu- aŭ du-foje jare. Kaj ĝis la momento de tiu ĉi kunveno ĝia strategio ŝajnis esti sukcesa. Morano – kiu povas fieri pri la aŭtoreco de la kampanjo „*Swift Boat Veterans for Truth*", kiu kunkaŭzis la malvenkon de John Kerry ĉe la kampanjo de la prezidant-elektoj de 2004 – en sia prelego prezentis al la publiko tutan serion de venkoj. Leĝdonado pri la klimato en la usona senato: fiaskigita! La UN-klimata pintkunveno en Kopenhago: bankroto! La klimatprotekta movado: antaŭ memmortigo! Li eĉ projekciis al ekrano serion da citaĵoj de klimat-aktivuloj, kiuj neniigis sin reciproke (kion pro-

12 Persona intervjuo kun Joseph Bast, 30-an de junio 2011.

13 En la jaroj post la konferenco la nombro de kontribuaĵoj rekreskis al dudek naŭ en la jaro 2012 kaj tridek en la jaro 2013. Douglas Fischer, „Climate Coverage Down Again in 2011", *The Daily Climate*, 3-an de januaro 2012; Douglas Fischer, „Climate Coverage Soars in 2013, Spurred by Energy, Weather", *The Daily Climate*, 2-an de januaro 2014.

gresemuloj ja tiom majstre regas), kaj instigis la publikon ilin „celebri”.[14]

Mankis nur aerbalonoj kaj pluvo da konfetoj el la plafono.

***

Ŝanĝo de publika opinio pri la grandaj sociaj kaj politikaj demandoj okazas ĝenerale nur iom post iom. Se tamen okazas abrupta ŝanĝo, tiam ĝenerale antaŭiras dramecaj okazaĵoj. Kaj ĝuste pro tio la opinienketistoj estis tiom surprizitaj pri tio, kio okazis en nur kvar jaroj pri la percepto de la klimatŝanĝo. Laŭ enketo de la enketesplora instituto *Harris* de 2007, 71 elcentoj de la usonanoj kredis, ke la daŭra uzado de fosiliaj brulaĵoj ŝanĝos la klimaton. Ĝis 2009 la nombro falis al 51 elcentoj, kaj en junio 2011 jam nur 44 elcentoj de la usonanoj opiniis tion, malpli ol la duono de la loĝantaro. Similaj tendencoj montriĝis en Britujo kaj Aŭstralio. Scott Keeter, la direktoro pri enket-esplorado ĉe la *Pew Research Center for the Peaple and the Press*, nomis la evoluon en Usono „unu el la plej grandaj mallongtempe okazintaj ŝanĝoj en la nova historio de la publika opinio”.[15]

Ekde la minimuma punkto de 2010/2011 la kredo je la ekzisto de la klimatŝanĝo en Usono iomete pliiĝis. (Iuj supozas, ke la kaŭzo estas interalie la apero de ekstremaj vetersituacioj, sed „la pruvoj estas ankoraŭ sufiĉe malkompletaj”, klarigas la sociologo Riley Dunlap ĉe la ŝtata universitato de Oklahomo, kiu specialiĝis pri la politikaj aspektoj de la klimata ŝanĝo.) Ĉiukaze restas okulfrapa, ke la nombroj ĉe la dekstra flanko de la politika spektro daŭre malaltiĝas.[16]

14 Joseph Bast, „Why Won't Al Gore Debate?”, The Heartland Institute, gazetara informo, 27-an de junio 2007; Will Lester, „Vietnam Veterans to Air Anti-Kerry Ads in W.Va.”, Associated Press, 4-an de aŭgusto 2004; Leslie Kaufman, „Dissenter on Warming Expands His Campaign”, *New York Times*, 9-an de aprilo 2009; John H. Richardson, „This Man Wants to Convince You Global Warming Is a Hoax”, Esquire, 30-an de marto 2010; Session 4: Policy Realities (filmeto), The Heartland Institute.

15 „Big Drop in Those Who Believe That Global Warming Is Coming”, Harris Interactive, gazetara informo, 2-an de decembro 2009; „Most Americans Think Devastating Natural Disasters Are Increasing”, Harris Interactive, gazetara informo, 7-an de julio 2011; persona intervjuo kun Scott Keeter, 12-aan de septembro 2011.

16 Lydia Saad, „A Steady 57 % in U.S. Blame Humans for Global Warming”,

El hodiaŭa perspektivo povas ŝajni ne imagebla, sed ankoraŭ en 2008 en Usono pri la klimatŝanĝo transpartiaj aliancoj ŝajnis eblaj. En tiu jaro la ĝisosta respublikano Newt Gingrich faris televidan filmeton kun la demokrata kongres-delegitino Nancy Pelosi, tiam la parlamenta proparolantino, en kiu ili promesis kunigi siajn fortojn kaj komune batali kontraŭ la klimatŝanĝo. Kaj en 2007 Rupert Murdoch – kies informkanalo *Fox* neŝanceleble agas por grandigi la komunumon de la klimat-neantoj – lanĉis programon por instigi la kunlaborantojn de la televido aĉeti hibridajn aŭtojn (Murdoch anoncis, kel li mem akiris iun de ili).

Tiuj tempoj definitive pasis. Hodiaŭ pli ol 75 elcentoj de la demanditoj, kiuj nomas sin demokratoj kaj liberaluloj, kredas, ke la homo ŝanĝas la klimaton – nombro, kiu malgraŭ jaraj fluktuadoj ekde 2001 nur iomete altiĝis. En akra kontrasto al tio, la plej multaj respublikanoj decidis rifuzi la sciencan interkonsenton. En kelkaj regionoj nur proksimume 20 elcentoj de la demanditoj, kiuj nomas sin respublikanoj, sekvas la opinion de la scienco. La sama ideologia abismo troviĝas en Kanado. Laŭ enketo de *Environics* de oktobro 2013, nur 41 elcentoj de la demanditoj, kiuj identigas sin kun la reganta Konservativa Partio, kredas, ke la klimatŝanĝo ekzistas kaj estas kaŭzata de la homo, dum 76 elcentoj de adeptoj de la maldekstra Nova Demokrata Partio kaj 69 elcentoj de la adeptoj de la modera Liberala Partio opinias, ke la klimato ŝanĝiĝas. Kaj la sama fenomeno montriĝis siavice en Aŭstralio, Britujo kaj Okcidenteŭropo.[17]

---

Gallup Politics, 18-an de marto 2014; „October 2013 Political Survey: Final Topline", Pew Research Center for the People & the Press, 9-an – 12-an de oktobro 2013, p. 1; persona retpoŝta interŝanĝo kun Riley Dunlap, 2014-03-29.

17 DEMOKRATOJ KAJ LIBERALULOJ: Aaron M. McCright kaj Riley E. Dunlap, „The Politicization of Climate Change and Polarization in the American Public's Views of Global Warming 2001-2010, The Sociological Quarterly 52 (2011), p. 188, 193; Saad, „A Steady 57 % in U.S. Blame Humans for Global Warming"; RESPUBLIKANOJ: Anthony Leiserowitz k.a., „Politics and Global Warming: Democrats, Republicans, Independents, and the Tea Party", Yale Project on Climate Change Communication and George Mason University Center for Climate Change Sommunication, 2011, p. 3 s; 20 ELCENTOJ: Lawrence C. Hamilton, „Climate Change: Partisanship, Understanding, and Public Opinion", Carsey Institute,

Ekde la politika fendiĝo de la partioj ĉe la temo klimatŝanĝo, multaj sociscienc aj studaĵoj okupiĝis pri la demando, kiom precize kaj kial la politika konvinko influas la sintenon al la Tervarmiĝo. Laŭ la *Cultural Cognition Projec*t de la *Yale Law School* ekz-e la „kultura mondpercepto" – do la politika tendenco aŭ la ideologia sinteno direkte al la cetera homaro – stampas „la opiniojn de persono pri la Tervarmiĝo pli forte ol ĉia cetera individua trajto".[18] Do pli ol la aĝo, la etna aparteno, la stato de klereco aŭ la aparteno al partio.

La esploristoj el *Yale* raportas, ke personoj kun klara „egaleca" kaj „komuneca" mondpercepto (karakterizitaj per emo je kolektiva agado kaj je socia justeco) plejparte akceptas la sciencan interkonsenton pri la klimatŝanĝo. Inverse, personoj kun klare „hierarĥia" kaj „individuisma" mondpercepto (karakterizita per rifuzo de ŝtataj helpoj por malriĉuloj kaj malplimultoj, insista subteno de la industrio kaj per la kredo ke ĉiu pli aŭ malpli ricevas tion, kion li meritas) plimulte rifuzas la sciencan interkonsenton.[19] La pruvoj estas preme klaraj. En la segmento de la usona loĝantaro kun neskueble „hierarĥiaj" opinioj nur 11

printempo de 2011, p. 4; ENKETO DE OKTOBRO 2013: „Focus Canada 2013: Canadian Public Opinion About Climate Change", The Environics Institute, 2013-11-18, http://www.environicsinstitute.org; AŬSTRALIO:, BRITUJO KAJ OKCIDENTEŬROPO: Bruce Tranter, „Political Divisions over Climate Change and Environmental Issues in Australia", Envireonmental Politics 20 (2011), p. 78-96; Ben Clements, „Exploring public opinion on the issue of climate change in Britain", British Pliticx 7 (2012), p. 183-202; Aaron M. McCright, Rily E. Dunlap kaj Sandra T. Marquart-Pyatt, „Climate Change and Political Ideology in the European Union", Michigan State University, Working Paper, 2014.

18 Detalan, bone kompreneblan superrigardon pri la esplorado de la neado de sciencoj de la dekstruloj liveras Chris Mooney, *The Republican Brain: The Science of Why They Deny Science – and Reality* (Hoboken, NJ: John Wiley & Sons, 2012); KULTURA MONDPERCEPTO: Dan M. Kahan k.a., „The Second National Risk and Culture Study: Making Sense of – and Making Prgress in – the American Culture War of Fact", The Cultural Cognition Project at Yale Law School, 2007-09-27, p. 4, konsultebla ĉe http://www.cultural-cognition.net.

19 Dan Kahan, „Cultural Cognition as a Conception of the Cultural Theory of Risk", en *Handbook of Risk Theory: Epistemology, Decision Theory, Ethics, and Social Implications of Risk*, ed. de Sabine Roeser k.a. (Londono: Springer, 2012), p. 731.

elcentoj taksas la klimatŝanĝon kiel „altan riskon”, kompare kun 69 elcentoj de la demanditoj, kiuj decide identigas sin kun „egalecaj” opinioj.[20]

La juro-profesoro Dan Kahan ĉe la universitato *Yale*, ĉefa aŭtoro de tiu studaĵo, atribuas la proksiman interrilaton inter „mondpercepto” kaj akcepto de la klimata esplorado al la „kultura percepto”, al la procezo, per kiu ni ĉiuj – sendepende de ĉiaj politikaj preferoj – filtras novajn informojn tiel, ke nia „preferata opinio pri bona socio” estu apogata. Kiam novaj informoj ŝajnas konfirmi tiun vidmanieron, tiam ni volonte transprenas ilin. Sed kiam ili estas minaco por nia kredsistemo, tiam nia cerbo tuj komencs produkti kontraŭkorpojn por fordefendi la malbonvenajn entrudiĝantojn.[21]

Kiel Kahan klarigis en *Nature*, „la homoj trovas la ideon maltrankviliga, ke konduto, kiun ili taksas nobla, estas malutila por la socio, kaj ke konduto, kiun ili taksas malnobla, utilas la socion. Ĉar la konsento al tia eldiro povus disigi ilin disde ilia ĉirkaŭaĵo, kaj pro tio ili tre forte tendencas rifuzi ĝin.”[22] Per aliaj vortoj, ĉiam estas pli facila nei la realon ol allasi ke nia mondpercepto ŝanceliĝas – vero, kiu validis por ĝisostaj stalinistoj ĉe la apogeo de la politikaj purigadoj same kiel hodiaŭ por la liberecanaj klimat-neantoj. Cetere, maldekstruloj same kapablas nei malkomfortajn sciencajn verojn. Dum konservativuloj nature estas „sistempravigantoj” kaj pro tio defendas sin kontraŭ faktoj, kiuj dubindigas la regantan ekonomian sistemon, la plej multaj maldekstruloj estas nature sistemskeptikuloj kaj tre ofte pridubas faktojn, kiuj venas de entreprenoj kaj de registaroj. Tio povas konduki al ia faktorezistemo, observebla ekz-e ĉe homoj, kiuj opinias, ke multnaciaj produktantoj de medikamentoj vualis la interrilaton inter vakcinoj dum infaneco kaj aŭtismo. Tiuj krucmilitistoj estas rezistemaj kontraŭ pruvoj, kiuj refutas ilian konvinkon – por ili ĉi tie agas nur la sistemo, kiu protektas sin mem.

20 Kahan k.a., „The Second National Risk and Culture Study”, p. 4.

21 Dan Kahan, „Fixing the Communications Failure”, Nature 463 (2010), p. 296; Dan Kahan k.a., „Book Review – Fear of Democracy: A Cultural Evaluation of Sunstein on Risk”, *Harvard Law Review* 119 (2006), p. 1083.

22 Kahan, „Fixing the Communications Failure”, p. 296.

Tiu defendsinteno parte ankaŭ klarigas, kial en la klimata debato hodiaŭ la emocioj eksplodas. Ankoraŭ en 2007 la klimatŝanĝo estis io, kies ekziston preskaŭ ĉiuj koncedis – sed ili ne aparte maltrankviliĝis pro tio. (Se oni petas la usonanojn pri listo de prioritatoj de iliaj politikaj zorgoj, tiam la klimatŝanĝo daŭre estas ĝenerale lastranga.)[23]

Sed hodiaŭ konsiderinda parto de la elektantoj en multaj landoj renkontas tiun temon kun pasia intereso, eĉ kun obsedo – ĉe kio ili ĉefe strebas prezenti la klimatŝanĝon kiel „trompon", kiun la maldekstruloj prezentas al ili por devigi ilin ŝanĝi iliajn ampolojn, loĝaĉi en sovetstilaj konstruaĵoj el antaŭfabrikitaj elementoj kaj rezigni je tutterenaj veturiloj. En la kredsistemo de tiuj desktruloj la neado de la klimatŝanĝo intertempe okupas tiom centran lokon kiel malaltigo de impostoj, posedo de armiloj kaj batalo kontraŭ abortigo. Kaj do la klimatesploristoj hodiaŭ raportas pri pelĉasaj kampanjoj, kiaj antaŭe estis organizitaj nur kontraŭ abortigaj kuracistoj. En la distrikto *Bay Area* en Kalifornio lokaj *Tea-Party*-aktivuloj perturbis kunsidojn de la urba administracio, en kiuj diskutiĝis malgrandaj disponoj por daŭrigeblo, kun la pravigo, ke ĉio ĉi estas parto de konspiro financata de la Unuiĝinta Naciaro por akapari la mondregadon. Heather Gass de la *Tea Party* en la *East Bay* en malfermita letero al tia kunsido formulis tion jene: „Iun tagon [en la jaro 2035] vi vekiĝos en sociala loĝejo, vivtenas vin per nutraĵ-raciumoj, viaj infanoj estas en ŝtataj busoj veturigataj al centroj de endoktrinado, dum vi ie en kelo faras ŝtate preskribitan laboron, en loĝloko, kie ekzistas nur publikaj transportiloj, ĉar vi ne havos aŭton, kaj kiu scias, kio fariĝos viaj maljuniĝantaj gepatroj, sed tiam estos tro malfrue. Vekiĝu!!!"[24]

Tute senambigue la klimatŝanĝo havas ion, kio por kelkaj homoj prezentiĝas kiel giganta minaco.

23 Rebecca Rifkin, „Climate Change Not a Top Worry in U.S.", Gallup, 2014-03-12; „Deficit Reducttion Declines as Policy Priority", Pew Research Center for the People & the Press, 2014-01-27; „Thirteen Years of the Public's Top Priorities", Pew Research Center or the People & the Press, 2014-02-27, http://www.people-press.org.

24 Heather Gass, „EBTP at the One Bay Area Agenda 21 Meeting", East Bay Tea Party, 2011-05-07, http://theeastbayteaparty.com.

## Nepenseblaj veroj

Kiam oni promenas preter la standoj de la *Heartland*-subtenantoj, tiam oni vidas tuj, kio tie okazas. La *Heritage Foundation* proponas siajn raportojn, same la *Cato Institute* kaj la *Ayn Rand Institute*. La movado de la klimatneantoj estas ĉio alia ol organika estaĵo de „skeptikaj" sciencistoj, sed ĉiuflanke la kreaĵo de ideologia reto, kiu ĉi tie prezentiĝas kaj kiu ĉefe respondecas pri tio, ke la ideologia mapo en la pasintaj jardekoj mondvaste estis nove desegnita. Studaĵo publikigita en 2013 de Riley Dunlap kaj la politiksciencisto Peter Jacques montris, ke 72 elcentoj de la libroj, en kiuj la klimatŝanĝo estas neata – la plej multaj el ili eldoniĝis ekde la 1990-aj jaroj – rilatas kun dekstraj pensfabrikoj. Se oni preterlasas la kreskantan nombron de mempublikigitaj titoloj, tiam la parto kreskas al 87 elcentoj.[25]

Multaj el tiuj institutoj fondiĝis fine de la 1960-aj kaj komence de la 1970-aj jaroj, kiam la usona ekonomia elito timis, ke la publika opinio danĝere deturnas sin de la kapitalismo kaj apogas, kvankam ne la socialismon, tamen agreseman kejnzismon. Kiel reagon al tio ĝi startigis kontraŭrevolucion kaj lanĉis finance plej bone provizitan intelektan movadon, kiu asertas, ke avido kaj senlima strebo al posedo ne estas io, pri kio oni devas senkulpiĝi, sed kiu donas la plej grandan ŝancon por la homa emancipiĝo ekde la komenco de la mondo. Sub tiu ekonomi-liberala flago ili batalis por politiko de impost-malaltigoj, liberkomercaj traktatoj kaj privatigo de ŝtataj kernsektoroj, de la telefona tra la energia ĝis la akva prizorgado – pakaĵo, kiu preskaŭ ĉie en la mondo estas konata kiel „novliberalismo".

Fine de la 1980-aj jaroj, post jardeko da Thatcher en Britujo kaj

25 Pli pri la rolo de la konservativa movado ĉe la neado de la klimatŝanĝo vidu: Riley E. Dunlap kaj Aaron M. McCright, „Organized Climate Change Denial", en *The Oxford Handbook of Climate Change and Society*, ed. de John S. Dryzek, Richard B. Norgaard kaj David Schlosberg (Oxford: Oxford University Press, 2011), p. 144-160; kaj Aaron M. McCright kaj Riley E.Duinlap, „Anti-Reflexivity: The American Conservative Movement's Success in Undermining Climate Science and Policy", *Theory, Culture, and Society* 27 (2010), p. 100-133. STUDAĴO PRI KLIMATNEAJ LIBROJ: Riley E.Dunlap kaj Peter J.Jacques, „Climate Change Denial Books and Conservative Think Tanks: Exploring the Connection", *Amercan Behavioral Scinecist* 57 (2013), p. 705 s.

Reagan en Usono, kaj kun la kolapso de la komunismo, tiuj ideologiaj militistoj fine povis anonci sian venkon: La historio estis oficiale finiĝinta, kaj laŭ la multe cititaj vortoj de Thatcher, ekzistis „nenia alternativo" al ilia merkat-fundamentismo. Pufe plenaj de memfido ili poste komencis instali sian sistemon de ekonomia liberaligo favore al la entreprenistoj, en ĉiu lando, kiu ĝis tiam ankoraŭ rezistis, kaj ĝenerale tio funkciis plej bone en tempoj de politika ribelado kaj de ekonomiaj krizegoj. Per liberkomercaj traktatoj kaj la membreco en la Monda Organizaĵo pri Komerco tiu evoluo estis poste cementigita.

Ĉio okazis bele kaj sukcese. La sistemo eĉ transvivis la financan kraŝon de 2008, kiun estis rekte kaŭzinta banka sektoro grandparte liberigita el la jugo de reguloj kaj de superrigardo. Sed por la kunvenintoj en la hotelo *Mariott* la klimatŝanĝo prezentas tute novan kvaliton de minaco. Ĉi tie ne temas pri la favorataj politikaj projektoj de respublikanoj aŭ demokratoj, sed pri la fizikaj limoj de la atmosfero kaj de la oceanoj. Se la malserenaj prognozoj de la IPCC restas sen kontraŭdiro kaj se la tute normala sinsekvo de la aferoj igas nin iri al renversaj punktoj kiuj endanĝerigas la civilizacion, la konsekvencoj evidentas: La ideologia krucmilito, elkovata en pensfabrikoj kiel *Heartland*, *Cato* kaj *Heritage*, haltigendas per kriĉantaj bremsoj. Cetere, la ĝisostaj krucmilitistoj ne lasis sin trompi per diversaj provoj ŝajnigi kvazaŭ la klimatprotekto harmoniigeblus kun la merkat-logiko (komerco pri ellasoj, elcentaĵoj pro klimatprotekto, monigo de la „servoj" kiujn la naturo disponigas). Ili scias tute precize, ke nia tutmondigita ekonomio fariĝis ebla nur per la uzado de fosiliaj energiportantoj kaj ke ĝi komplete dependas de ili kaj ke tiom fundamenta dependeco ne ŝanĝeblas per kelkaj mildaj intervenoj. Por tio necesas masivaj intervenoj: ampleksaj malpermesoj de aktivecoj malutilaj por la klimato, konsiderindaj subvencioj por verdaj alternativoj, altaj punoj por malobeoj, novaj impostoj, novaj publikaj laborprogramoj, retrofarado de privatigoj – la listo de ideologiaj hororaĵoj estas senfina. Mallonge, ĉio, kion tiuj pensfabrikoj – kiuj jam ĉiam estis reprezentantoj de la multe pli potencaj konzern-interesoj – de jardekoj fervore kontraŭbatalas.

Kaj jen ankoraŭ la afero pri la „tutmonda justeco", kiu ĉe klimataj intertraktadoj ĉiam reaperas. La justec-debato baziĝas sur la simpla scienca fakto, ke la Tervarmiĝo estas kaŭzita per akumulo de forcejaj

gasoj en la atmosfero tra ducent jaroj. Tio signifas, ke la landoj, kiuj havas grandan avancon de industriiĝo, kaŭzis multe pli da ellasoj ol la plej multaj ceteraj. Kaj tamen multaj landoj kun la plej malmultaj ellasoj estas unue kaj plej forte trafataj de la efikoj de la klimatŝanĝo (kio estas kaŭzita unuflanke de ilia malfavora geografia situo kaj aliflanke de ilia malriĉeco kaj de ilia kun tio ligita pli forta vundeblo). Por kontraŭagi tiun strukturan malegalecon kaj por deteni industriiĝantajn sojlolandojn kiel Ĉinujon kaj Hindujon malstabiligi la tutmondan klimatan sistemon, Nordameriko kaj Eŭropo, kiuj jam pli longe produktas ellasojn, devas unue transpreni la pli grandan parton de la ŝarĝo. Krome, sendube necesas konsiderindaj transigoj de resursoj kaj de teĥnologio, por kontraŭbatali la malriĉecon per instrumentoj kun malalta $CO_2$-ellaso. Tion celis la bolivia klimat-intertraktantino Angélica Navarro Llanos, kiam ŝi postulis *Marshall*-planon por la Tero. Kaj tiu formo de alidistribuado de riĉaĵo estas por institucioj kiel la *Heartland Institute* la plej fia el ĉiaj penseblaj krimoj.

Eĉ klimatprotekto en al propra lando por tiuj homoj suspekte odoras je socialismo; ĉiuj ĉi postuloj je densa, pagebla loĝejkonstruo kaj tute novaj publikaj trafikiloj – por ili tio estas nur okazo por donaci kaŝitajn subvenciojn al la malriĉuloj, kiuj mem kulpas pri sia situacio. Por eĉ ne paroli pri tio, kion la batalo kontraŭ $CO_2$-ellasoj signifas por la principo de la tutmonda liberkomerco, por kiu geografiaj distancoj kvazaŭ ne ekzistas, kvazaŭ ili estus puraj fantaziaĵoj, kiujn oni povas krevigi per dizelaj kamionegoj de *Walmart* kaj de la kestego-ŝipoj de *Maersk*.

Sed ilia plej granda zorgo estas la jena: Se la sistemo de la liberaj merkatoj efektive kondukis al fizikaj kaj ĥemiaj procezoj, kiuj, se ili daŭre okazas senbride, minacas la ekziston de grandaj partoj de la homaro, tiam la tuta krucmilito por morala blankigo de la kapitalismo tute vaniĝis. Vide al tiaj perspektivoj la avido eble tamen ne estas tiom bona. Kaj ĝuste tio estas la kaŭzo de la subita pliiĝo de la klimatneado inter ĝisostaj konservativuloj: Ili komprenis, ke ili, ekde kiam ili agnoskas la ekziston de klimatŝanĝo, perdos la niatempan ideologian batalon – kaj tiu temas pri la demando, ĉu ni devas plani kaj organizi nian socion tiel, ke ĝi respegulu niajn celojn kaj valorojn, aŭ ĉu ni povas lasi tiun taskon al la magia ludo de la merkatfortoj.

Imagu por momento, kia la temaro devas aspekti por iu kiel la *Heartland*-prezidanto Joseph Bast, afabla barba sinjoro, kiu studas ekonomiajn sciencojn ĉe la universitato de Ĉikago kaj en persona interparolado klarigis al mi, ke estas lia persona alvokiteco „liberigi homojn el la tiraneco de aliaj homoj”.[26] Bast vidas en la klimatprotekto la finon de la mondo. Tio ne estas tia aŭ ne estas nepre tia, tamen forta redukto de la ellasoj laŭ indikoj de la scienco kun ĉiuj ĝiaj intencoj kaj celoj signifas la finon de la mondo *lia*. La klimatŝanĝo kolapsigas la ideologian konstruaĵon, sur kiu la hodiaŭa kapitalismo baziĝas. Kredsistemo, kiu diabligas kolektivan agadon kaj deklaras la militon al ĉia merkat-regulado kaj al la publika sektoro, simple ne harmoniigeblas kun problemo, kiu postulas senprecedencan kolektivan agadon kaj radikalan bridadon de tiuj merkatfortoj, kiuj grandparte respondecas pri tiu ĉi krizo kaj seninterrompe pli malbonigas ĝin.

Por multaj, speciale religiaj konservativuloj, la defio estas ankoraŭ pli ampleksa, ĉar ili vidas minacata ne nur sian kredon je la merkatoj, sed la kernon de sia imago pri la senco de la ekzisto de la homo sur la Tero. Ĉu ni estas la mastroj kaj devas submeti la Teron al ni, aŭ ĉu ni, kiel specio inter aliaj, estas elmetitaj al potencoj, kiuj estas tiom kompleksaj kaj ne antaŭvideblaj, ke eĉ niaj plej kapablaj komputiloj ne povas fari al si bildon pri tio? Laŭ Robert Manne, profesoro pri politiko ĉe la universitato *La Trobe* en Melburno, la klimat-esplorado estas por multaj konservativuloj „ofendo al ilia plej profunda kaj plej kara kred-principo: la kapablo kaj eĉ la rajto de la 'homaro' submeti al si la Teron kaj ĉiujn ĝiajn fruktojn kaj starigi 'regadon' super la naturo.” Por tiuj konservativuloj, laŭ Manne, „tia ideo estas ne nur simple malĝusta. Ĝi estas neakceptebla kaj plej ofenda. Tiuj, kiuj predikas tiun dogmon, estas kontraŭbatalendaj kaj metendaj al pilorio.”[27]

Ĝuste tion ili faras, kaj ju pli persone ili faras tion, des pli bone – ekz-e atakante la vicprezidinton Al Gore pro liaj majestaj posedaĵoj, aŭ la klimatesploriston James Hansen pro la honorarioj por liaj paroladoj. Por ne forgesi la '*Klimagate*', pufigita skandalo, ĉe kiu la *Heartland*-anoj kaj iliaj aliancanoj asertis ke ili trovis pruvojn pri manipulitaj datumoj, post kiam ili elspionis retpoŝtaĵojn de klimates-

26 Persona intervjuo kun Joseph Bast, 2011-06-30.

27 Robert Manne, „How Can Climate Change Denialism Be Explained?”, *The Monthly*, 2011-12-08.

ploristoj kaj redonis ilin tordite (la sciencistoj estis plurfoje tribunale liberigitaj je ĉiaj akuzoj). En 2012 la *Heartland*-instituto kaptis sin en sian propran kaptilon, kiam ĝi lanĉis plakatkampanjon, en kiu homoj, kiuj kredas je la klimatŝanĝiĝo („klimathisteriuloj" en la ĵargono de la neantoj), estas komparataj kun la murda sekt-gvidanto Charles Manson kaj la UNA-bombisto Ted Kaczynski: „Mi daŭre kredas je la klimatŝanĝo. Kaj vi?", staris en dikaj ruĝaj literoj apud bildo de Kczynski. Ĉe *Heartland* oni komprenas la neadon de la klimat-esploraĵoj kiel militon kaj agas laŭ tio.[28]

Multaj neantoj tute malkaŝe koncedas, ke ilia malfido kontraŭ la scienco fontas el grandega timo antaŭ la katastrofaj politikaj konsekvencoj, se la klimatŝanĝo efektive ekzistas. La brita blogisto kaj regula *Heartland*-preleganto James Delingpole formulis tion jene: „La moderna medimovado progresigas multajn aferojn, kiujn la maldekstruloj plej ŝatas: alidistribuadon de la riĉaĵo, pli altajn impostojn, pli fortan ŝtatan intervenon kaj reguladon." La *Heartland*-prezidanto Joseph Bast ankoraŭ pli drastas: Por la maldekstro „la klimatŝanĝiĝo estas simple ideala. … Ĝi liveras la kialon por tio, ke ni devas fari ĉion, kion [la maldekstro] ĉiukaze volis."[29]

Bast, kiu rezignas pri la arogantumado de aliaj klimatneantoj, same malkaŝe koncedas, ke li kaj liaj kolegoj komencis okupiĝi pri klimataj temoj ne ĉar ili konsideris la sciencajn ekkonojn malĝustaj. Ilia zorgo estis pli ĝuste la ekonomiaj kaj politikaj konsekvencoj, kiujn tiuj ekkonoj sekvigas, kaj ili komencis refuti ilin. „Se ni okupiĝas pri la temo, ni venas al la konkludo: Tio estas sekura koncepto por la amasa pliigo de ŝtataj intervenoj", Bast klarigis al mi, kaj plue: „Antaŭ ol

28 GORE: „Al Gore Increases His Carbon Footprint, Buys House in Ritzy Santa Barbara Neighborhood", Hate the Media!, 2010-05-02; HANSEN: William Lajeunesse, „NASA Scientist Accused of Using Celeb Status Among Environmental Groups to Enrich Himself", Fox News, 2011-06-22; Christopher Horner, „A Brief Summary of James E. Hansen's NASA Ethics File", American Tradition Institute, 2011-11-18; LIBERIGITA: David Adam, „'Climategate' Review Clears Scientists of Dishonesty over Data", Guardian, 2010-07-07; AFIŜKAMPANJO: Wendy Koch, „Climate Wars Heat Up with Pulled Unabomber Billboards", *USA Today*, 2012-05-04.

29 Persona intervjuo kun James Delingpole, 2011-07-01; Intervjuo kun Bast, 2011-06-30.

akcepti tion, ni prefere ĵetu rigardon al la esplorado. Mi kredas, ke tiel konservativaj kaj liberecaj rondoj komencis cerbumi kaj diris al si: Ni ne simple akceptu tion kiel kredon, sed prefere faru proprajn esploradojn."[30]

Nigel Lawson, iam financministro sub Margaret Thatcher, kiu volonte klarigas, ke verdo estas „la nova ruĝo", moviĝas sur similaj pensaj reloj. Lawson fanfaronas esti privatiginta britajn ŝlosilajn sektorojn, malaltiginta la impostojn por riĉuloj kaj esti rompinta la potencon de la grandaj sindikatoj. Sed la klimatŝanĝo, laŭ liaj vortoj, donas „novan permeson enmiksiĝi, interveni kaj reguligi." Pro tio ne povas esti alie, laŭ lia konkludo, ol ke temas pri konspiro – la klasika inversigo de la principo de kaŭzo kaj efiko.[31]

En la movado de la klimatneantoj troviĝas multaj figuroj implikitaj en similaj pensaj konfuzoj. Fizikistoj de la malnova tipo kiel S. Fred Singer, kiu antaŭe disvolvis raketan teĥnologion por la usona armeo kaj en la regulado de ellasoj perceptas torditan eĥon de la komunismo, kontraŭ kiu li batalis dum la Malvarma Milito (Naomi Oreskes kaj Eric Conway tre konkrete prezentis tion). La saman melodion kantas la ĉeĥa ŝtatprezidinto Václav Klaus, kiu faris paroladon en *Heartland*-klimat-konferenco, dum li ankoraŭ oficis kiel prezidanto. Klaus, kies profesia kariero komenciĝis ankoraŭ sub la komunista regado, ĉe la temo klimatŝanĝo li evidente sentas sin remetita en la Malvarman Militon. Li komparas la klopodojn malebligi la Tervarmigon kun la „strebadoj de komunistaj planekonomikistoj kontroli la tutan socion" kaj klarigas: „Por iu, kiu grandan parton de sia vivo pasigis en la 'noblan' eraon de komunismo, tio estas simple neakceptebla."[32]

30 Intervjuo kun Bast, 2011-07-01.

31 „The Rt Hon. Lord Lawson of Blaby", Celebrity Speakers, http://speakers.co.uk; Nigel Lawson, *The View from No. 11: Britain's Longes-Serving Cabinet Member Recalls the Triumphs and Disappointments of the Thatcher Era* (Novjorko: Doubleday, 1993), p. 152-162, 237-240; Tim Rayment kaj David Smith, „Should High Earners Pay Less Tax", *The Times* (Londono), 2011-09-11; Nigel Lawson, *An Appeal to Reason: A Cool Look at Global Warming* (Novjorko: Duckworth Overlook, 2008), p. 101.

32 Naomi Oreskes kaj Erik M.Cpmway, Merchants of Doubt (Novjorko: Bloomsbury, 2010), p. 5, 25 s, 82, 135, 164; Václav Klaus, „The Climate Change Doctrine Is Part of Environmentalism, Not of Science", Inaugural Annual GWPF Lecture, 2010-10-19, http://www.thegwpf.org.

Oni povas kompreni, ke la science pruvita realo de la klimatŝanĝo aperas al ili kiel ekstreme maljusta, ĉar la partoprenantoj en la *Heartland*-konferenco pensis, ke ili gajnis siajn ideologiajn militojn malkaŝe, kvankam ne ĉiam tute honeste. Kaj nun la klimatesplorado ŝanĝas ĉion: Kiel ankoraŭ argumenti kontraŭ ŝtata interveno, se la loĝeblo de la planedo dependas de tiu interveno? En mallonga perspektivo oni povus maksimume diri, ke kontraŭdisponoj estas ekonomie pli kostaj ol se oni simple daŭrigas la klimatŝanĝon ankoraŭ kelkajn jardekojn (novliberalaj ekonomistoj diligente prezentas tiajn argumentojn helpe de kosto-utilo-kalkuloj kaj „diskontadoj" de la estonteco). Sed la plej multaj homoj ne ŝatas, ke la vivo de iliaj infanoj estas „diskontata" sur ia *Excel*-tabelo kaj opinias, ke la ideo malaperigi aliajn landojn el la Tersurfaco estas morale iom repuŝa.

Kaj pro tio la ideologi-militistoj ĉi tie kunvenintaj en la hotelo *Marriott* konkludis, ke oni povas kontraŭbatali tian masivan minacon nur per unu sola maniero: per la aserto, ke miloj kaj miloj da sciencistoj mensogas kaj ke la klimatŝanĝo estas elkovita trompo. La ŝtormoj, laŭ ili, tute ne fariĝas pli fortaj, ke tio estas pura fantazio. Kaj se tamen ili fariĝas pli fortaj, tiam tio tute ne rilatas kun tio, kion ni homoj faras – aŭ estontece povas ne fari. Per aliaj vortoj, ili neas la realon, ĉar la implicaĵoj de tiu realo ŝajnas al ili tutsimple nepenseblaj.

Jen nun venas mia malkomforta vero: Mi kredas, ke tiuj ĝisostaj ideologoj komprenas la veran minacon de la klimatŝanĝo pli bone ol la plej multaj „klimathisteriuloj" en la politika mezo, kiuj daŭre agas kvazaŭ laŭ paŝa kaj sendolora solvo de la problemo povus ekzisti kaj kvazaŭ ni devus neniun ataki, eĉ ne la fosili-konzernojn. Antaŭ ol mi pli detale pritraktu tion, mi ŝatus klarigi unu aferon: Kiel 97 elcentoj de la klimatesploristoj mondvaste konfirmas, la *Heartland*-uloj ege eraras en sia interpreto de la sciencaj rezultoj. Sed koncerne la politikajn kaj ekonomiajn *konsekvencojn* de tiuj ekkonoj, speciale la necesajn trancajn ŝanĝojn ne nur de nia energikonsumo, sed de la penso, kiu baziĝas sur nia liberaligita kaj profitorientita ekonomio, ili vidas la aferon tute klare. Kvankam la neantoj trompiĝas en kelkaj detaloj (ne, ĝi ne estas komunista konspiro; la aŭtoritata ŝtatsocialismo, kiel ni ankoraŭ vidos, estis ekstreme malutila al la medio kaj senretene neniigis resursojn), sed en unu punkto ili tute pravas: La necesa profunda ŝanĝo, por ankoraŭ eviti la katastrofon, kostas

monon.

## La kara mono …

Potencaj ideologioj, kiuj kolizias kun malmolaj faktoj, malofte tute formortas. Anstataŭ tio ili fariĝas marĝena fenomeno kun kulta karaktero. Ĉiam restas kelkaj ĝisostuloj kaj rakontas al si reciproke, ke ne la ideologio estis la problemo, sed ĝiaj gvidantoj, kiuj ne sufiĉe rigore plenumis ĝiajn regulojn. (Tiaj grupetoj efektive ankoraŭ ekzistas dise ĉe la novstalinista ekstrema maldekstro.) En la nuna momento de la historio – post la *Wall-Street*-kolapso de 2008 kaj meze de kruciĝantaj ekonomiaj krizoj – la merkatfundamentistoj intertempe devintus ŝrumpiĝi al simila statuso kaj en sia silenta ĉambro ĝui siajn eldonojn de la libroj de Milton Friedman „Libera por elekti" (orig.: *Free to Chose*) kaj „*Atlas Shrugged*" (laŭ la germana eldono: La striko). Tiu hontinda sorto estas al ili ŝparata nur ĉar iliaj ideoj pri senbrida entreprenismo, kvankam pruvite en konflikto kun la realo, estas profitigaj por la mondaj miliarduloj, tiel ke la novliberaluloj en pensfabrikoj estas flegataj de figuroj kiel Charles kaj David Koch, al kiuj apartenas la medidetrua mikskonzerno *Koch Industries*, kaj de *ExxonMobil*.

Tiel, laŭ nova studaĵo, klimatskeptikaj pensfabrikoj kaj aliaj premgrupoj – la sociologo Robert Brulle nomas ilin „klimatŝanĝo-kontraŭmovado" – ricevas entute pli ol 900 milionojn da dolaroj jare. Tiu mono, per kiu financiĝas la reklamo por plej diversaj dekstraj projektoj, venas precipe el „malklaraj fontoj" – el rimedoj de konservativaj fondaĵoj, kiuj ne komplete laŭspureblas.[33]

Per tio klariĝas, ke teorioj kiel tiu de la „kultura perceptado", kiuj rilatas nur al individupsiĥologiaj aspektoj, atingas siajn limojn. La klimatneantoj protektas ne nur siajn personajn mondperceptojn, sed potencajn politikajn kaj ekonomiajn interesojn, kiuj ege profitas el la nebuligo de la klimat-debato fare de *Heartland* kaj aliaj. La ligoj inter la neantoj kaj tiuj interesoj estas bone konataj kaj bone dokumentitaj. *Heartland* ricevis pli ol milionon da dolaroj de *ExxonMobil* kaj de fondaĵoj, kiuj interrilatas kun la fratoj Koch kaj la mortinta konserva-

33 Robert J.Brulle, „Institutionalizing Delay: Foundation Funding and the Creation of U.S. Climate Change Counter-Movement Organizations", Climatic Change 122 (2014), p. 681.

tiva monprovizanto Richard Mellon Scaife. Kiom precize la pensfabriko ricevas de firmaoj, fondaĵoj kaj individuoj, kiuj estas proksimaj al la fosilia industrio, restas neklara, ĉar *Heartland* ne publikigis la liston de siaj mondonacantoj. La pravigo por tio tekstas, ke la malkaŝo de la nomoj devojigus de la „avantaĝoj de niaj pozicioj". Tralikigitaj internaj dokumentoj malkaŝis, ke unu el la plej grandaj mondonacantoj por *Heartland* restas anonima – mistera mecenato, kiu donacis pli ol 8,6 milionojn da dolaroj eksplicite por tio, ke *Heartland* ataku la klimatesploradon.[34]

Dume la sciencistoj prelegantaj en la *Heartland*-klimat-konferenco tiom profunde vadas en la mono de la fosilia industrio, ke oni kvazaŭ povas flari la ellasgasojn. Por nomi nur du ekzemplojn: Patrick Mich-

34 Apud la demando, ĉu la koncepto de „mondpercepto" efektive distingiĝas de politika ideologio kaj posedas specifan klarigpovon, sociscienciistoj kritikis la teorion de kultura percepto ankaŭ pro tio, ke ĝi ne konsideras la strukturajn pelfortojn de la klimatŝanĝa kontraŭmovado. Pri gravaj ekz-oj de esploraĵoj, kiuj koncentriĝas al la socia, politika kaj ekonomia dinamiko de tiu movado, vidu Dunlap kaj McCraight, „Organized Climate Change Denial", kaj McCraight kaj Dunlap, „Anti-Reflexivity". Pri la financado de la Heartland-instituto: Laŭ la ExxonSecrets-projekto de Greenpeace Usono, la organizaĵo ricevis „ekde 1998 676.500 dolarojn de ExxonMobil"; laŭ la propraj indikoj de Heartland, ĝi ricevis en 1992 kaj 1993 sume 100.000 dolarojn de la Sarah Scaife Foundation kaj en 1994 50.000 dolarojn de la Charles G.Koch Charitable Foundation; kaj laŭ la datumoj de Conservative Transparency, funkciigata de la American Bridge 21st Century Foundation, Heartland inter 1986 kaj 1989 kaj en la jaro 2011 ricevis krome entute 225.000 dolarojn de la Sarah Scaife Foundation, inter 1992 kaj 1999 entute 40.000 dolarojn de la Claude R. Lambe Charitable Foundation (kiu rilatas kun la familio Koch) kaj en 1986 entute 10.000 dolarojn de la Carthage Foundation (fondaĵo de Scaife). Vidu: „Factsheet: Heartland Institute", ExxonSecrets.org, Greenpeace USA, http://www.exxonsecrets.org; Joseph L.Bast, „A Heartland Letter to People for the American Way", The Heartland Institute, 1996-08-20, http://heartland.org; „Heartland Institute", Conservative Transparencey, Bridge Project, American Bridge 21st Century Foundation, http://conservativetransparency.org. „AVANTAĜOJ DE NIAJ POZICIOJ": „Reply to Our Critics", The Heartland Institute, http://heartland.org/reply-to-critics; TRALIKIGITAJ DOKUMENTOJ: „2012 Fundraising Plan", The Heartland Institute, 2012-01-15, p. 20 s.

aels de la *Cato Institute*, kiu faris la ĉefan prelegon en la konferenco de 2014, iam klarigis ĉe *CNN*, ke 40 elcentoj de lia konsilista firmao devenas el petrolfirmaoj (la *Cato Institute* mem ricevis monon de *ExxonMobil* kaj de fondaĵoj de la Koch-familio). Laŭ esploraĵo de *Greenpeace* pri alia konferenc-prelegisto, la astrofizikisto Willie Soon, inter 2002 kaj 2010 la mono por liaj esplorsubtenoj venis 100-elcente el la fosilia premgrupo.[35]

La homoj, kiuj estis engaĝitaj por disvastigi la opiniojn de tiuj sciencistoj – en blogoj, komentoj kaj televidaj elpaŝoj – estas grandparte pagataj el la samaj fontoj. Mono el la petrolindustrio fluas en la *Committee for a Constructive Tomorrow*, kiu gastigas la retpaĝon de Marc Morano, same kiel en la *Competitive Enterprise Institute*, kie Chris Horner spirite sentas sin hejme. Laŭ raporto en la *Guardian* de februaro 2013, reto de anonimaj usonaj miliarduloj inter 2002 kaj 2010 donacis preskaŭ 120 milionojn da dolaroj al „grupoj, kiuj metas la esploradon pri la klimatŝanĝo en dubindan lumon. … La konstanta monfluo lanĉis konservativan kontraŭmovadon al la medi-agendo de Barack Obama, kiu neniigas ĉian ŝancon pri tio, ke la Kongreso aktiviĝos kontraŭ la klimatŝanĝo.”[36]

Malfacile takseblas, ĉu kaj se jes, kiel tiu mono formas la opinion de siaj ricevantoj. Ni tamen scias, ke homoj, kiuj havas konsiderindan ekonomian intereson pri la fosilia industrio, pli facile neas la ekziston de la klimatŝanĝo, kaj sendependе de tio, al kiu politika tendenco ili apartenas. Ekz-e la solaj regionoj en Usono, kie la opinioj pri la klimatŝanĝo estas iomete malpli disaj laŭ la politika linio, estas ĝuste tiuj, kiuj aparte dependas de la elminejo de fosiliaj brulaĵoj, ekz-e la karbmineja lando de Appalaĥoj kaj la golfa marbordo. Tie la klimat-

35 „Money Troubles: How to Kick-Start the Economy”, Fareed Zakaria GPS, CNN, 2010-08-15; „Factsheet: Cato Institute”, ExxonSecrets.org, Greenpeace USA, http://www.greenpeace.org; „Koch Industries Climate Denial Front Group: Cato Institute”, Greeenpeace USA, http://www.greenpeace.org; „Case Study: Dr. Willie Soon, a Career Fueled by Big Oil and Coal”, Greenpeace USA, 2011-06-28, http://www.greenpe ace.org.

36 „Factsheet: Committee for a Constructive Tomorrow”, EssonSecrets.org, Greenpeace USA, http://www.exxonsecrets.org;Suzanne Goldenberg, „Secret Fundign Helped Build Vast Netword of Climate Denial Thinktanks”, *Guardian*, 2013-02-14.

ŝanĝo, kiel ankaŭ en la cetera lando, estas daŭre neata de la plej multaj respublikanoj, sed ĝuste ankaŭ de multaj el siaj demokrataj najbaroj (en partoj de Apalaĥoj nur 49 elcentoj de la demokratoj kredas je homfarita klimatŝanĝo, kompare kun 72 ĝis 77 elcentoj en aliaj landopartoj). Kanado montras similajn regionajn diferencojn: En Alberto, kie la enspezoj pro la elminejo de gudrosablo ege altiĝas, ĉe enketoj nur 41 elcentoj de la loĝantaro esprimis, ke la homoj kontribuas al la klimatŝanĝo. En la provincoj de la atlantika marbordo, kiuj multe malpli profitas el la elminejo de fosiliaj brulaĵoj, 68 elcentoj de la demanditoj diras, ke la homoj varmigas la Teron."[37]

Simila tendenco observeblas ĉe sciencistoj. Dum 97 elcentoj de la aktivaj klimatesploristoj opinias, ke la homo estas ĉefa kaŭzanto de la klimatŝanĝo, la afero aspektas tute alie ĉe la „geologoj de la ekonomio" – sciencistoj, kiuj esploras pejzaĝojn pri ilia taŭgeco je ekspluatado fare de la krudmateriala industrio. Nur 47 elcentoj de ili kredas je la homfarata klimatŝanĝo. Do la konkludo estas: Ni ĉiuj tendencas nei la veron, se ĝi tro multe kostas – ĉu emocie, intelekte aŭ finance. Kiel konate, jam Upton Sinclair konstatis: „Oni povas nur malfacile instigi homon kompreni ion, se lia salajro dependas de tio, ke li ne komprenas ĝin."[38]

## Plano B: Per varmiĝanta Tero riĉiĝi

Unu el la plej interesaj rezultoj de la multaj pli novaj studaĵoj pri klimat-perceptoj estas la klara ligo inter rifuza sinteno al la klimatŝanĝa esplorado kaj privilegia socia kaj ekonomia pozicio. Neantoj de la klimatŝanĝo estas ne nur plejparte konservativaj, sed krome ankaŭ blankuloj, viroj kaj havas supermezume altan enspezon. Krome ili estas pli ol aliaj konvinkitaj pri siaj opinioj, kiom ajn evidente malĝustaj ili povas esti. Multe diskutata eseo de la sociologoj Aaron McCright kaj Riley Dunlap pri tiu temo (kun la karakteriza titolo „*Cool*

37 Lawrence C.Hamilton, „Climate Change: Partisanship, Understanding, and Public Opinion", Carsey Institute, printempo 2011, p. 4; „Vast Majority Agree Climate Is Changing", Forum Research, 2013-07-24, p. 1, http://www.forumresearch.com.

38 Doran kaj Zimmerman, „Examining the Scientific Consensus on Climate Change", p. 23; Upton Sinclair, I, Candidate for Governor: And How I Got Licked (Berkeley: University of California Press, 1994), p. 109.

*Dudes*", en Esperanto proksimume „Senĝenaj tipoj") rezultigis, ke la grupo de konservativaj blankaj viroj, kiuj pri siaj opinioj pri la klimatŝanĝo estas firme konvinkitaj, preskaŭ sesoble pli ofte ol la ceteraj demanditoj deiras de tio, ke la klimatŝanĝo „neniam okazos". Pri tiu misproporcio McCright kaj Dunlap liveras simplan klarigon: „Konservativaj blankaj viroj havas superproporcie ofte potencpoziciojn en nia ekonomia sistemo. Se oni konsideras, kiom masive la klimatŝanĝo dubindigas la kapitalisman industrisocion, tiam apenaŭ surprizas, ke konservativaj blankaj viroj, kiuj en sia baza sinteno pravigas la sistemon, tre ofte neas la Tervarmiĝon.[39]

La relative privilegiita ekonomia kaj socia pozicio de la neantoj tamen signifas ne nur, ke ili per tranĉa socia kaj ekonomia ŝanĝo havas multon por perdi. Ili povas ankaŭ pli trankvile alfronti la riskojn de la klimatŝanĝo, se iliaj kontraŭaj opinioj tamen montriĝas malĝustaj. Tiun ekkonon mi ekhavis, kiam mi dum la *Heartland*-konferenco por la iksa fojo devis aŭdi, kiel unu el la prelegantoj sen eĉ sparko da kompato esprimis sin pri la viktimoj de la klimatŝanĝo. Larry Bell (la spacarĥitekto) rikoltis ne malmultajn ridojn, kiam li deklaris al la publiko, ke iom da varmo estas tue ne tiel malbona: „Mi tute konscie transloĝiĝis al Houston!" (Estis la jaro, kiam Teksaso spertis sian plej teruran iam ajn registritan sekec-periodon.) La aŭstralia geologo Bob Carter opiniis, ke „la mondo el homa perspektivo fartas pli bone en varmperiodoj". Kaj Patrick Michaels konsilis al la homoj, kiuj maltrankviliĝas pro la klimatŝanĝo, ke ili agu laŭ la modelo de la francoj, kiam katastrofa varmondo en la jaro 2003 en Eŭropo kaŭzis preskaŭ 15.000 mortintojn nur en Francujo: „Ili malkovris *Walmart* kaj klimatizilojn."[40]

39 Persona retpoŝt-interŝanĝo kun Aaron McCraight, 2011-09-30; Aaron McCraight kaj Riley Dunlap, „Cool Dudes: The Denial of Climate Change Among Conservative White Males in the United States", Global Environmental Change 21 (2011), p. 1167, 1171.

40 Session 5: Sharpening the Scientific Debate (filemteo), The Heartland Institute; Chris Hooks, „State Climatologist: Drought Officialy Worst on Record", Texas Tribune, 2011-04-04; Keynote Address (filmeto), The Heartland Institute, 2011-07-01; „France Heat Wave Death Toll Set at 14.802", Associated Press, 2003-09-25; Keynote Address (filmeto), The Heartland Institute, 2011-06-30.

Mi aŭskultis tiujn fiaĵojn, dum proksimume 13 milionoj da homoj ĉe la korno de Afriko sur elsekiĝinta grundo batalas kontraŭ la malsatmorto. Tia sensentemo ebliĝas per la firma konvinko de la klimatneantoj, ke en la kazo, ke ili pri la klimatesplorado tamen trompiĝis, almenaŭ la riĉuloj en la industrinacioj ne bezonas maltrankviliĝo pro kelkaj gradoj de varmiĝo.[41] (Kiam pluvas, ni serĉas ŝirmon. Se varmegas, ni serĉas ombron," klarigis la teksasa kongresdelegito Joe Barton dum aŭskultado en la subkomitato pri energio kaj medio.)[42]

Kaj koncerne la reston de la mondo – tiu prefere ĉesu almozpeti kaj komencu mem gajni monon. (Ne gravas, ke la Monda Banko en raporto de 2012 avertas, ke la kreskantaj kostoj por malriĉaj landoj pro ŝtormoj, malsekecoj kaj inundoj estas jam nun tiom altaj, ke ili „estas minacataj de neniigo de jardekojn longa daŭrigebla disvolvado".) Kiam mi alparolis Patrick Michaels pri la respondeco de la riĉaj landoj finance subteni la malriĉajn landojn ĉe la multekosta adaptiĝo al pli varma klimato, li sarkasmis: Ne ekzistas kialo por disponigi rimedojn al lando, nur „ĉar ĝia politika sistemo pro ia ajn kialo estas nekapabla adaptiĝi". La vera solvo liaopinie troviĝas en la libera mondkomerco.[43]

Michaels certe scias, ke la libera mondkomerco apenaŭ helpos insulanojn, kies landoj malaperas el la mondomapo, kaj li certe konscias, ke la homoj de la Tero plej trafitaj de varmego-ondoj kaj malsekecoj plejparte ne povas solvi sian problemon per tio, ke ili per sia kreditkarto aĉetas novan klimatizilon. Kaj ĉe tiu ĉi punkto la

41 Tiu ideo baziĝas plejparte sur pura dezirpensado. La superriĉuloj povas eble dum iom da tempo aĉeti por si ioman protekton, sed eĉ la plej riĉaj landoj de la planedo per granda katastrofo eble metiĝas antaŭ ŝirprovo (kiel la uragano Katrina montris). Kaj nenia socio, eĉ plej riĉa aŭ plej bone organizita, sukcesas adaptiĝi al gravaj naturkatastrofoj, se unu sekvas al alia.

42 „World Bank Boosts Aid for Horn of Africa Famine", Agence France-Presse, 2011-09-24; „Mankind Always Adapts to Climate, Rep. Barton Says", Respublikanoj en la komitato pri energio kaj komerco de la reprezenta ĉambro, gazetara komunikaĵo, 2009-03-25, http://republicans.energycommerce.house.gov.

43 „Turn Down the Heat: Why a 4 °C Warmer World Must Be Avoided", Potsdam-Institut für Klimafolgenforschung, Weltbank, novembro 2012, p. ix; persona intervjuo kun Patrick Michaels, 2011-07-01.

kruciĝo de ekstrema ideologio kaj klimatneado fariĝas vere danĝera. Ĉar tiuj „senĝenaj tipoj” neas la klimatesploradon ne nur ĉar tiu minacas renversi ilian dominad-pensadon. Sed ilia dominad-pensado liveras al ili la intelektajn instrumentojn por simple amortize forlasi grandajn partojn de la homaro kaj krome ŝajnracie pravigi la proprajn profitojn el tiu katastrofo.

Ni devas konsciiĝi pri tio, kiom danĝera tia sinteno estas, kiu detruas ĉian empation – kulturteoriuloj nomas ĝin „hierarĥia” kaj „individuisma” –, ĉar la klimatŝanĝo submetos nian etikan karakteron al provo kiel eble neniu okazaĵo antaŭe. La usona komerca ĉambro, en peticio celanta malebligi reguladon de la $CO_2$-ellasoj per la mediprotekta instanco, argumentas, ke en la kazo de tutmonda varmiĝo „loĝantaroj per diversaj kondutŝanĝoj kaj per psiĥaj kaj teĥnologiaj adaptiĝoj povus kutimiĝi al pli varma klimato”.[44]

Kaj ĝuste tiujn adaptiĝojn mi trovas profunde maltrankviligaj. Se nia kulturo ne plenumas principan valorŝanĝon, kiel ni tiam povas serioze atendi ke ni „kutimiĝos” al tio, ke homoj per ĉiam pli gravaj kaj pli oftaj naturkatastrofoj perdas sian loĝejon kaj sian laboron? Kiel ni traktos la klimatrifuĝantojn, kiuj en difektaj boatoj panee albordiĝas ĉe ni? Kiel ni kondutos, kiam trinkakvo kaj nutraĵoj fariĝas ĉiam pli malabundaj?

Ni konas la respondojn al tiuj demandoj, ĉar la procezo jam komenciĝis. La batalo de la konzernoj por naturaj resursoj fariĝos per kreskantaj rabavido kaj perforto. Ili daure akaparos kampajn grundojn en Afriko por produkti nutraĵojn kaj brulaĵojn por la riĉaj landoj – nova ĉapitro de novkapitalisma prirabado en la regionoj de la Tero, kiuj sen tio jam estis senskrupule prirabitaj (kion la ĵurnalisto Christian Parenti en sia libro „En la tropiko de ĥaoso” tiel tre klare priskribas). Kiam malgrandaj bienoj kaj fiŝistaj vilaĝoj per la premo de varmego kaj per brutalaj ŝtormoj neniiĝas, la grundo transiras al grandaj konstrukonzernoj, kiuj sur ĝi estigas gigantajn havenojn,

44 „Petition of the Chamber of Commerce of the United States of America for EPA to Conduct Its Endangerment findig Proceeding on the Record Using Administrativa Procedure Act §§ 556 and 557”, anekso 1, „Detailed Review of the Health and Welfare Science Evidence and IQA Petition for Correction”, U.S. Chamber of Commerce 2009, p. 4.

luksajn feri-instalaĵojn kaj industriajn kampkulturajn entreprenojn. Iam memsufiĉaj kamparaj loĝantoj perdas sian grundon kaj estas devigataj transloĝiĝi en jam superplenajn urbajn mizerkvartalojn – por ilia propra protekto, kiel oni ŝajnigas al ili. Malsekecoj kaj malsatmizeroj daŭre servos pretekste por progresigi la uzadon de genetike ŝanĝitaj semoj, kiuj ankoraŭ pli profunde enŝuldigas la kampulojn.[45]

Ni en la pli riĉaj landoj protektos niajn grandajn urbojn per multekostaj digoj kaj ŝtormbariloj, dum ni translasos grandajn marbordajn sekciojn, kie vivas praloĝantoj kaj malruĉuloj, al la furiozado de ŝtormoj kaj al la altiĝantaj marniveloj. Io simila povus okazi planedvaste, kiam ni faros urĝajn riparojn por malaltigi la tutmondajn temperaturojn, kiuj por la homoj en tropikaj landoj prezentas multe pli grandan riskon ol por loĝantoj de la norda hemisfero (pri tio poste pli). Kaj anstataŭ koncedi, ke ni ion ŝuldas al la homoj, kiuj pro niaj agadoj (kaj pro nia neagado) devas fuĝi el siaj landoj, ni konstruos ĉiam pli da altteĥnologiaj fortikaĵoj kaj faros ĉiam pli striktajn leĝojn kontraŭ enmigrantoj. Nome de la „nacia sekureco" ĉe konfliktoj pri akvo, petrolo kaj grundo ni intervenos en aliaj landoj aŭ mem estigas tiajn konfliktojn. Mallonge, nia kulturo faros tion, kion ĝi faras jam nun, sed ankoraŭ pli brutale kaj pli barbare, ĉar ĝi estas tio, por kio nia sistemo estas starigita.

De kelkaj jaroj ne malmultaj multnaciaj konzernoj tute malkaŝe parolas pri tio, kiel la klimatŝanĝo povus efiki sur ilia komerca agado, kaj asekuroj atente observas kaj diskutas la kreskantan nombron de grandaj katastrofoj. Ekz-e la estrara prezidanto de la *SwissRe Amerika* deklaris laŭvorte: „La klimatŝanĝiĝo faras al ni sendormajn noktojn", kaj firmaoj kiel *Starbucks* kaj *Chipotle* alarmas, ĉar pro ekstremaj vetereventoj povus okazi livermankoj por gravaj ingrediencoj. En junio 2014 la projekto *Bisky Business* gvidata de la miliardulo kaj eksa novjorka urbestro Michael Bloomberg, de la eksa usona financministro Henry Paulson kaj de la *hedgefondus*-manaĝero, mediprotektanto kaj filantropo Tom Steyer avertis, ke la klimatŝanĝo kostos al Usono miliardojn da dolaroj jare, sole pro marbordaj damaĝoj, kaj ke la

45 Chritian Parenti, propic of Chaos: Climate Change and teh New Geography of Violence (Novjorko: Nation Books, 2011), germ. Im Wendekreis des Chaos: Klimawandel und die neue Geografie der Gewalt (Laika Verlag 2013).

ekonomia mondo devas preni tiajn klimatkostojn serioze.[46]

Tiaj esprimoj estas ofte konfuzataj kun subteno de decidaj disponoj kontraŭ la klimatvarmigo. Malprave. Nur ĉar firmaoj pretas nomi la verŝajnajn sekvojn de la klimatŝanĝiĝo, tio ankoraŭ tute ne signifas, ke ili subtenas radikalajn disponojn por limigi la Tervarmigon al 2 gradoj kaj per tio percepteblan malaltigon de la riskoj. En Usono ekz-e la asekura sektoro esprimis sin aparte laŭte pri la kreskantaj sekvoj, kaj ĝiaj plej grandaj entreprenoj laborigas tutajn skipojn de klimatesploristoj por prepari sin por la venontaj katastrofoj. Malgraŭ tio la asekura branĉo ĝis nun apenaŭ faris ion por antaŭenigi pli agreseman klimatpolitikon – tute male, multaj konzernoj kaj branĉaj ligoj disponigas konsiderindajn sumojn al la pensfabrikoj, el kiuj la movado de klimatneantoj elkreskis.[47]

Dum iom da tempo tiu ŝajne bizara dinamiko okazis eĉ ene de la diversaj sekcioj de la *Heartland*-instituto mem. La mondvaste gvida institucio de klimatneantoj gastigas la tiel nomatan *Center of Finance, Insurance and Real Estate*. Ĝis majo de 2012 tiu centro estis ia proparolanto de la asekura ekonomio kaj estis gvidata de la konservativa registara intimulo Eli Lehrer. Unu afero tamen distingis Lehrer disde liaj *Heartland*-kolegoj, nome ke li ne hezitis sobre konstati: „La klimatŝanĝo evidente estas realo kaj estas, kiel konate, grandparte farata de homoj. Mi ne kredas, ke ke iaj ajn agospacoj ekzistas por serioze diskuti pri eĉ nur unu el tiuj du punktoj.”[48]

46 Bryan Walsh, „The Costs of Climate Change and Extreme Weatheer Are Passing the High-Water Mark”, Time, 2013-07-17; Suzanne Goldenberg, „Starbucks concerned world coffe supply is threatened by climate change”, Guardian, 2011-10-13; Amily Atkin, „Chipotle Warns It Might Stop Serving Guacamole If Climate Change Gets Worse”, Climate Progress, 2014-03-04; Robert Kopp k.a., „American Climate Prospectus: Economic Risks in the United States”, farita de la Rhodium Group por la Risky Business Project, junio 2014.

47 „Insurer Climate Risk Disclosure Survey”, Ceres, marto 2013, p. 53, http://www.ceres.org; Eduardo Porter, „For Insurers, No Doubts on Climate Change”, New York Times, 2013-05-14; „2012 Fundraising Plan”, The Heartland Institute, 2012-01-15, p. 24 s.

48 Joseph Bast, „About the Center on Finance, Insurance, and Real Estate at

Do, dum liaj *Heartland*-kolegoj tutmonde organizis konferencojn, kiuj servis ĝuste la celon veki la ŝajnon de serioza scienca debato, la sekcio de Lehrer kunlaboris kun la asekura premgrupo pri la demando, kiel ĉe estonta klimata ĥaoso la konzernoj povu certigi siajn neto-profitojn. Laŭ Lehrer „ĝenerale en la ĉiutaga laboro ne okazis iom grandaj konfliktoj" inter lia laboro kaj tiu de liaj klimatskeptikaj kolegoj.[49] Kion la asekuraj societoj postulis de *Heartland* ja ne estis malebligi la klimatan ĥaoson, sed disponojn, kiuj certigu aŭ eĉ grandigu iliajn profitojn, kaj tion ĉe ĉia vetero. Temis do pri la celo forŝovi la ŝtaton el la asekura sektoro, doni al la firmaoj la liberecon laŭplaĉe altigi kotizojn kaj proprajn kontribuaĵojn kaj forlasi klientojn en regionoj de alta risko, kaj pri aliaj „merkatliberalaj" disponoj.

Fine Lehrer tamen disiĝis de la instituto *Heartland*, post ties disputata afiŝkampanjo, en kiu homoj, kiuj kredas je la klimatŝanĝo, estis komparataj kun amasmurdistoj. Ĉar ankaŭ la asekuraj kompanioj, kiuj tiom larĝanime subtenis la *Heartland*-instituton, estas konvinkitaj pri la klimatŝanĝo, tiu numero estis tute ne bone akceptita. Malgraŭ tio, Lehrer rapide deklaris en intervjuo, ke la disopinioj koncernas sole nur la laboron pri la publiko, kaj ne la politikan direkton. „La de *Heartland* subtenata politiko ĝenerale trovas daŭre mian konsenton", li deklaris.[50] Efektive la laboro de la diversaj sekcioj pli aŭ malpli kompletigis unu la alian. La klimatskeptika sekcio de *Heartland* faris ĉion por tiom dubindigi la klimat-esploradon, ke ĉiuj seriozaj provoj reguligi la ellason de forcejaj gasoj komencis interrompiĝi. Samtempe la asekura flanko progresigis politikajn decidojn kiuj, spite al la reale estiĝantaj sekvoj de tiuj ellasoj, permesis enpoŝigi siajn profitojn.

Kaj per tio ni proksimiĝas al la demando, kio envere troviĝas malantaŭ la indiferenta sinteno pri la klimatŝanĝo, same ĉu ĝi montriĝas kiel neado de katastrofoj aŭ kiel katastrofo-kapitalismo. La koncernatoj faras tiun alte riskan hazardludon senskrupule, ĉar ili kredas, ke ili

---

the Heartland Institute", Policy Documents, The Heartland Institute, 2012-06-05; persona intervjuo kun Eli Lehrer, 2012-08-20.

49 Intervjuo kun Lehrer, 2012-08-20.

50 Saml.

kaj iliaspeculoj estas protektataj kontraŭ la katastrofaj konsekvencoj, almenaŭ por la venonta generacio, aŭ simile.

Multaj klimatmodeloj efektive prognozas, ke la riĉaj landoj – el kiuj multaj situas sur pli altaj latitudoj – povus tiri certan avantaĝon el iomete pli varma klimato, de pli longaj vegetadperiodoj ĝis pli mallongaj komercaj vojoj, ekde kiam la polusaj glacioj akviĝas. Samtempe la riĉuloj en tiuj regionoj jam nun trovas ĉiam pli ruzajn manierojn por protekti sin kontraŭ estontaj veter-ekstremaĵoj. Instigitaj de okazaĵoj kiel la superŝtormo *Sandy*, la proponistoj de luksaj nemoveblaĵoj ofertas al siaj eventualaj klientoj orumitajn katastrof-bunkrojn – ekipitajn per ĉiaj akcesoraĵoj, de urĝa lumiga sistemo, akvopumpiloj movataj de tergaso, tra elektrigiloj ĝis kvar metrojn altaj pordegoj kontraŭ inundoj kun akvohermetikaj ĉambroj sigelitaj en stilo de submarŝipoj, ekz-e en proprieta loĝ-instalaĵo en Manhatano. Stephen G. Kliegerman, la afergvidanta direktoro de la nemoveblaĵ-surmerkatigo de *Halstead Property*, deklaris al la *New York Times*: „Mi kredas, ke la aĉetantoj pagas volonte, por povi esti iom certaj, ke en kazo de naturkatastrofo ili ne spertu malagrablaĵon.”[51]

Intertempe multaj grandaj entreprenoj jam ekipiĝis per urĝo-elektrigiloj, por ke dum amasa mallumiĝo ĉe ili ne ĉio estingiĝu (ekz-e ĉe *Goldman Sachs*, dum la uragano *Sandy*, kvankam tie tute ne okazis kurentoĉeso), ekipas sin per sablosakoj (tion *Goldman* faris jam anataŭ *Sandy*) kaj laborigas proprajn meteologio-skipojn (*FedEx*). Usonaj asekuraj kompanioj eĉ komencas sendi privatajn fajrobrigadojn al siaj noblaj klientoj, kiam ties proprietaĵoj en Kalifornio kaj Kolorado estas minacataj de sovaĝa fajro – „domzorgista” servo, ĉe

51 John R. Porter k.a.,. „Food Security and Food Production Systems”, en *Climate Change 2014: Impacts, Adaptation, and Vulnerability, Part A: Global and Sectoral Aspects, Contribution of Working Group II to the Fifth Assessment Report of the Intergovernmental Panel on Climate Change*, ed. de C.B. Field k.a. (Kambriĝo: Cambridge Univesity Press, 2014), p. 20 s; Joan Nymand Larsen k.a., „Polar Regions”, en *Climate Change 2014 Impacts, Adaptation, and Vulnerability, Part B: Regional Aspects, Contribution of Working Group II to the Fifth Assessment Report of the Intergovernmental Panel on Climate Change*, ed. de R. Barros k.a. (Kambriĝo: Cambridge University Press, 2014), p. 20; Julie Satow, „The Generator Is the Machine of the Moment”, *New York Times*, 2013-01-11.

kiu *AIG* ludas pioniran rolon.[52]

Samtempe la publika sektoro ĉiam pli cedas, kio okazas precipe pro la intensaj klopodoj de la multaj militistoj ĉi tie en la *Heartland*-konferenco. Ili malmuntas nian ŝtaton kun fajra fervoro, kaj ilia ideologio kavigis multajn sektorojn de la publika mano, interalie ankaŭ la protekton kontraŭ katastrofoj. Laŭ ilia pledo la buĝeta krizo de Usono estis simple ŝovita al la federaciaj ŝtatoj kaj al la komunumoj, kiuj siavice solvas la problemon per tio, ke ili ne riparas difektajn pontojn kaj ne anstataŭigas rompitajn fajrobrigadajn aŭtojn. La agendon „libereco", kiun ili tiom amare provas protekti kontraŭ sciencaj faktoj, estas unu el la kaŭzoj de tio, ke la socio estonte estos malpli bone preparita kontraŭ katastrofoj.

Dum longa tempo mediprotektantoj ne vidis la klimatŝanĝon kiel grandan egaligiston, kiel *la* temon, kiu koncernas ĉiujn, riĉulojn same kiel malriĉulojn. Kiu devis nin firme kunigi. Tamen ĉiuj signoj indikas, ke ĝi efikas precize kontraŭe, ĝi fendas nin ankoraŭ pli en socion de bonstatuloj kaj senhavuloj, kreas abismon inter la homoj, kiuj, almenaŭ ĝis nun, surbaze de sia riĉaĵo povas aĉeti por si relative efikan protekton kontraŭ veterekstremoj, kaj tiuj, kiuj estas elmetitaj al la favoro de la ŝtato, en kiu ĉiam malpli da aferoj funkcias.

## Kio tiom fiigas la klimatneadon

Ju malpli la efikoj de la klimatŝanĝo ignoreblas, des pli klara fariĝos la brutala flanko de la nead-kampanjo, kiu ĝis nun percepteblis nur subsojle. Tiu evoluo jam komenciĝis. Fine de aŭgusto 2011, kiam grandaj partoj de la Tero suferis rekordan varmegon, la konservativa blogisto Jim Geraghty aperigis kontribuaĵon en la *Philadelphia Inquirer*, en kiu li argumentis, ke la klimatŝanĝo „multrilate helpos la usonan ekonomion kaj ne malgrandigos la geopolitikan gravecon de Usono, sed fortigos ĝin." La klimatŝanĝo, laŭ li, havos la plej gravajn

52 William Alden, „Around Goldman's Headquarters, an Oasis of Electricity", *New York Times*, 2012-11-12; „How FedEx Survived Hurricane Sandy", KLTV, 2012-10-31; Kimi Yoshino, „Another Way the Rich Are Different: 'Concierge-Level' Fire Protection", *Los Angeles Times*, 2007-10-26; P. Solomon Banda, „Insurance Companies Send Crews to Protect Homes", Associated Press, 2012-07-05.

sekvojn por la evolulandoj, tiel ke „multaj potenciale danĝeraj ŝtatoj devos batali kontraŭ katastrofaj situacioj.” Kaj tio, en liaj okuloj, estas io bona: „La klimatŝanĝo tute ne estos nia pereo, sed ĝi povus esti garantianto por dua usona jarcento sinsekve.” Ĉu vi komprenis tion? Ĉar la timkontraŭloj de Usono havas la malbonan sorton vivi en malriĉaj, varmegaj regionoj, kie ili per la klimatŝanĝo rosteblas, Usono, kvazaŭ Fenikso el la cindro, povus leviĝi el la cindro de la Tervarmiĝo.[53];[54]

Preparu vin al ankoraŭ pli da monstraĵoj. Dum la Tero varmiĝas, la ideologio tiom minacata de la klimatesplorado – laŭ kiu ĉiu estas sia propra prokismulo, ĉiu viktimo meritas sian sorton kaj ni povas regi la naturon – kondukos nin en tre malvarmegajn regionojn. Kaj fariĝos ankoraŭ pli malvarme, kiam teorioj de rasa supereco, kiu en partoj de la klimatneantoj nur pene teneblas sub la surfaco, elrompiĝas kun kriego.[55];[56] En mondo stampita de krianta maljusteco, al kies cemen-

53 Jim Geraghty, „Climate Change Offers Us an Opportunity”, Philadelphia Inquirer, 2011-08-28; PIEDNOTO: „House Bill No. 459”, sesio-jaro 2011, Montana Legislature, 2011-02-15; Brad Johnson, „Wonk Room Interviews Montanta Legislator Who Introduced Bill to Declare Global Warming 'Natural'”, Think Progress Green, 2011-02-17.

54 Komence de 2011 Joe Read, freŝbakita parlamenta delegito en Montana, faris historion, per tio ke li prezentis la unuan leĝproponon, kiu oficiale deklaras la klimatŝanĝon kiel ion pozitivan. „La tutmonda varmiĝo efikas favore al la bonfarto kaj al la komerca etoso de Montana”, dirs la propono. „Se efektive pli varmiĝas, ni havos pli longan vegetaĵaran periodon. Tio povus esti tre avantaĝa por la ŝtato Montana. Kial ni haltigu tiun progreson?” La leĝpropono estis rifuzita.

55 „Mission Statement”, American Freedom Alliance, http://www.amercanfreedomalliance.org; Chris Skates, *Going Green: For Some It Has Nothing to Do with the Environmet* (Alachua, FL: Bridge-Logos, 2011).

56 Estas tipa, ke la Usona Alianco por Libereco (American Freedom Alliance) en junio de 2011 en Los-Anĝeleso organizis propran konferencon por neado de la klimatŝanĝo. Parto de ĝia deklarita misio estas, „identigi minacojn de la okcidenta civilizacio”, kaj, kiel konate, ĝi instigas al timo pro la „islama trapenetrado de Eŭropo” kaj pro laŭdire similaj planoj pri Usono. Unu el la libroj vendataj en la Heartland-konferenco havis la titolon *Going Green*. En tiu fikcia ekscitlibro de Chris Skates klimataj aktivuloj

tigo tiu ideologio multe kontribuis, oni nepre bezonas tiajn teoriojn por pravigi la malkoran sintenon kontraŭ la plejparte senkulpaj viktimoj de la klimatŝanĝo sur la suda duonglobo, kaj ankaŭ la senkompatecon kontraŭ la plejparte afrik-usonaj loĝantoj de urboj kiel Nov-Orleano, kuj sur la norda duonglobo estas plej vundeblaj.

En raporto el la jaro 2007 pri la sekurecpolitikaj sekvoj de la klimatŝanĝiĝo, kuneldonita de la *Center for Strategic and International Studies*, la eksa CIA-direktoro R. James Woolsey antaŭdiras, ke sur multe pli varma planedo „altruismo kaj grandanimeco verŝajne malvigliĝus".[57] Tiu emocia indiferentiĝo observeblas jam nun de Arizono ĝis Italujo. La klimatŝanĝo jam estas ŝanĝanta nin, krudiganta nin. Kun ĉiu granda katastrofo la ĝenerala ekkrio ŝajnas fariĝi pli mallaŭta, la sumo de donacoj malaltiĝi. La komunikilaj komentistoj parolas pri „kompatlaciĝo", kvazaŭ ne la fosiliaj brulaĵoj, sed la empatio estus finia resurso.

Kvazaŭ por pruvi tion, la organizaĵo Usonanoj por Prospero (*Americans for Prosperity*, AFP), post la detruoj, kiujn la uragano *Sandy* kaŭzis en grandaj partoj de la federaciaj ŝtatoj Novjorko kaj Nov-Ĵerzejo, lanĉis kampanjon por haltigi la ŝtatan helpon por tiuj ŝtatoj. „Ni devas simple akcepti tion kaj vidi, kiel ni povas helpi nin mem", diris Steve Lonegan, la tiama prezidanto de la AFP-loka grupo Nov-Ĵerzejo.[58]

Kaj nomindas la ekzemplo de la brita *Daily Mail*. Dum la katastrofa vintra inundo en 2014, la bulvarda gazeto aperis kun fraptitolo kun la instigo al siaj legantoj subskribi peticion al la registaro, ke „parto de la 11 milionoj da pundoj, kiuj ĉiujare fluas en la disvolvo-helpon [por evolulandoj], elspeziĝu por la britaj viktimoj de la inundo".[59] Ene de

aliancigas kun islamaj teroristoj por detrui la usonan elektro-reton.

57 Kurt M.Campbell, Jay Gulledge, J.R. McNeill k.a., „The Age of Consequences: The Foreign Policy National Security Implications of Global Climate Change", Center for Strategic and International Studies kaj Center for a New American Security, novembro 2007, p. 85.

58 Lee Fang, „David Koch Now Taking Aim at Hurricane Sandy Victims", The Nation, 2012-12-22.

59 „230,000 Join Mail Call to Use Some of the UK's £ 11 billion Foreign Aid

kelkaj tagoj pli ol 200.000 homoj subtenis la postulon redukti la disvolvo-helpon favore al la enlanda katastrofo-helpo. Tamen Britujo, kie la karbofajra vapormaŝino inventiĝis, ellasas karbondioksidon jam pli longe en industria mezuro ol ĉiu alia lando de la Tero kaj pro tio havas aparte grandan respondecon por altigi la disvolvohelpon en tiuj ĉi krizaj tempoj anstataŭ malaltigi ĝin. Sed ne gravas. Forgesu la malriĉulojn. Simple akceptu tion. Ĉiu estas plej proksima al si mem.

Se ni ne radikale ŝanĝas nian kurson, tiuj valoroj – ankoraŭ pli forte ol hodiaŭ – regos niajn ŝtorman estontecon.

## La konservativuloj estas dorlotataj

Klimataktivuloj provis ĉiam denove igi la neantojn forlasi siajn rigidiĝintajn poziciojn, per la argumento, ke ĉe prokrastado de klimatprotektaj disponoj la necesaj ŝtataj invervenoj fariĝos eĉ pli drastaj. La populara klimat-blogisto Joe Romm ekz-e skribas: „Se vi ne volas, ke la ŝtato enmiksiĝu en la vivon de la homoj, tiam prefere faru ion kontraŭ la katastrofa Ter-varmiĝo, ĉar nenio subtenas aktivan ŝtaton pli ol manko kaj malhavo … Nur forta ŝtato – kiun la konservativuloj laŭ propraj eldiroj rifuzas – povas transloĝigi milionojn da civitanoj, konstrui gigantajn digojn, organizi la distribuadon de gravaj resursoj kiel akvo kaj grundo, dekreti akrajn kaj rapidajn entranĉojn ĉe certaj energispecoj – kaj ĉio ĉi estas neevitebla, se ni ne agas nun.”[60]

Tio ĝustas, katastrofa klimatŝanĝo pufigus la rolon de la ŝtato al dimensioj, kiu certe maltrankiviligus multajn pensantajn homojn, dekstrajn same kiel maldekstrajn. Kaj la timoj antaŭ „ekologia faŝismo” – „ekofaŝimo”, kiel multaj nomas ĝin – media krizo, kiu estas tiom serioza, ke ĝi donas al aŭtoritataj fortoj pretekston, nome de restarigo de ia ajn klimata ordo, transpreni la potencon – estas ja pravaj. Sed por eviti tiajn katastrofajn scenarojn la ellaso forte kaj rapide malpliigendas, kaj tio funkcias *nur* per iom da ŝtata interveno, kio estas ne akceptebla por dekstraj ideologoj.

---

Budget to Tackle Floods Crisis”, *Daily Mail*, 2014-02-14.

60 Joe Romm, „Krauthammer, Part 2: The Real Reason Conservatives Don't Believe in Climate Science”, *Climate Progress*, 2008-06-01.

Tio ne estis ĉiam tiel. Se la registaroj, ankaŭ en Usono, komencintus malaltigi la ellasojn jam en la tempo kiam la scienca interkonsento firmiĝis, la disponoj por malebligi katastrofan varmigon tute ne tiom forte kolizius kun la reganta ekonomia modelo. La unua granda internacia kunveno, kiu donis specifajn celojn por malaltigi la ellasojn, estis la monda klimatkonferenco pri la ŝanĝoj en la atmosfero; ĝi okazis 1988 en Toronto kun partopreno de pli ol tricent sciencistoj kaj politikaj decidantoj el kvardek ses landoj. La konferenco, kiu kreis la bazon por la Tera Pintkunveno de Rio-de-Ĵanejro, estis trarompo, ĉar ĝi rekomendis al la registaroj ĝis 2005 malaltigi la ellasojn je 20 elcentoj sub la valoro de 1988. „Se ni akceptas tiun defion", deklaris iu el la ĉeestantaj sciencistoj, „ni povos verŝajne konsiderinde malrapidigi la ŝanĝon. Tio donos al ni tempon por disvolvi meĥanismojn, per kiuj la kostoj por la socio kaj la damaĝo por la ekologia sistemo minimumiĝos. Alternative al tio ni povas ankaŭ fermi la okulojn, esperi la plejan bonon kaj pagi la fakturon, kiam ĝi pagendos.[61]

Se ni aŭskultintus tiun konsilon kaj tuj post subskribo de la UN-klimata konvencio de 1992 en Rio komencintus agi por atingi tiun celon, la mondvasta ellado de karbondioksido devintus malaltiĝi ekde 2005 je proksimume 2 elcentoj jare.[62] Ĉe tiu rapido la riĉaj lando komforte havintus tempon por enkonduki novajn teĥnologiojn por anstataŭigi fosiliajn brulaĵojn, malaltigi la ellason de karbondioksido en siaj landoj kaj samtempe kunhelpi por lanĉado de ambicia verda ondo en la tuta mondo. Ĉar la moloĥo de tutmondiĝo establiĝis nur poste, tio donintus al Ĉinujo, Hindujo kaj aliaj rapide kreskantaj ekonomioj la ŝancon kontraŭbatali la malriĉecon sur $CO_2$-malriĉaj vojoj. (Tio estis la deklarita celo de „daŭrigebla disvolvado", pledata en la konferenco de Rio.)

Tiu vizio povintus integriĝi ankaŭ en la tutmonda komerca strukturo, kiu devis estiĝi komence ĝis meze de la 1990-aj jaroj. Se ni daŭre reduktintus niajn ellasojn en tiu rapido, ni estus ĝis meze de tiu

61 Spencer Weart, The Discovery of Global Warming (Kambriĝo, MA: Harvard University Press, 2008), p. 149.

62 Global Carbon Project emiision data, 2013 Budget v2.4 (julio 2014), konsultebla ĉe http://cdiac.ornl.gov.

ĉi jarcento survoje al tutmonda ekonomio komplete libera je karbondioksido.

Sed ni faris nenion el tio. Kaj la fama klimatsciencisto Michael Mann, direktoro de la *Penn State Earth System Science Center*, indikas: „Ekzistas drasta puno por prokrastema agado, koncerne la ellason de karbondioksido en la Ter-atmosferon”: Ju pli longe ni atendas, des pli ĝi akumuliĝas tie kaj des pli radikale ne devos ŝanĝi nin por malaltigi la riskojn de katastrofa varmigo. Kevin Anderson, vicdirektoro de la *Tyndall Centre for Climate Change Research*, diras ankoraŭ pli klare: „Eble la limigo de la temperatur-altiĝo al 2 gradoj estus farebla tempe de la Ter-pintkunveno de 1992 aŭ eĉ ankoraŭ ĉe la jarmilŝanĝo per laŭpaŝaj adaptiĝoj kadre de la politika kaj ekonomia hegemonio. Sed la klimatŝanĝo estas memfortiĝanta problemo! Hodiaŭ en la jaro 2013 la perspektivo por (post)industriaj landoj kun altaj ellasoj estas tute alia. Nia daŭra kaj komuna malŝpara ellaso de $CO_2$ neniigis ĉian ŝancon de 'laŭpaŝa ŝanĝo', kion nia antaŭa (kaj pli granda) $CO_2$-buĝeto ankoraŭ estus permesinta. Hodiaŭ, post du jardekoj da trompo kaj mensogoj, la restanta $CO_2$-buĝeto postulas revolucian ŝanĝon de la politika kaj ekonomia hegemonio.”[63]

Formulite iom pli simple: Dum pli ol du jardekoj ni ŝovis la problemon antaŭ ni. En tiu tempospaco ni faris el la dutraka $CO_2$-rapidvojo sestrakan aŭtovojon. Tiun majstraĵon ni plejparte dankas al radikala kaj agresema vizio, kiu postulis la kreadon de liberkomerco laŭ la reguloj de la merkatfundamentismo. Ĝuste tiuj reguloj elkoviĝis en la dekstraj pensfabrikoj, kiuj nun staras ĉe la pinto de la klimatneantoj. Ĉio ĉi ne estas sen certa ironio: Ĉar kun sia revolucio ili estis tiom sukcesaj, nun necesas revolucia ŝanĝo de la ekonomia sistemo, se ni volas malebligi klimatan ĥaoson.

* * *

Iuj sekvas alian strategion por revenigi la dekstrulojn sur la klimatan ŝipon. Anstataŭ timigi ilin per la minaco de interven-ŝtato, se ni

63 Saml.; intervjuo kun Michael Mann, The Big Picture with Thom Hartmann, RT America, 2014-03-24; Kevin Anderson, „Why Carbon Prices Can't Deliver the 2 °C Target”, KevinAnderson.info, 2013-08-13, http://kevinanderson.info.

daŭre restos senagaj, tiu tendaro vetas per metodoj de ellas-malaltigo, kiuj estas pli bone kongrueblaj kun ultrakonservativaj valoroj.

Dan Kahan de la universitato *Yale* indikas, ke la enketitoj konsideritaj aparte „hierarĥiaj" kaj „individuistaj" ektimas jam ĉe la vorto „regulado", sed ja povas konsenti kun centre stiritaj grandteĥnologiaj projektoj, se ili ne atakas la kredon je dominado de la homo super la naturo. En iu el siaj lastaj studoj Kahan kaj liaj kolegoj pridemandis personojn pri siaj opinioj pri la klimatŝanĝo, post kiam ili prezentis al kelkaj el ili falsitajn gazetarajn raportojn. La unuaj ricevis artikolon pri tio, kiel la Ter-varmiĝo kontraŭbataleblas per „mediprotektaj disponoj". Aliaj kontribuaĵon, kiu vidis la solvon en la atomenergio. Kaj ree aliaj tute ne ricevis artikolon por legi. La sciencaj eldiroj pri la Ter-varmiĝo estis samaj en ĉiuj gazetaraj artikoloj. La esploristoj eltrovis, ke ĝisostaj konservativuloj, kiuj legis la atomenergian artikolon, pli kredis je sciencaj pruvoj de homfarita klimatŝanĝo. La legantoj de la artikolo pri mediprotektaj disponoj, male, vidis „tiujn eldirojn eĉ ankoraŭ pli skeptike ol la hierarĥiaj kaj individuistaj partoprenantoj en kontrolgurpo sen gazetartikolo".[64]

Ne malfacilas diveni, kial. Atomenergio signifas grandteĥnologio, bazita sur elminado de krudmaterialo, funkciigata de konzernoj, kiuj dum longaj jaroj flegas ligojn kun la milit-industria komplekso. Kaj kiel la renoma psiĥiatro kaj aŭtoro Robert Jay Lifton rimarkigis, nenia teĥnologio kontribuas pli al konfirmo de la opinio, ke la homo malsovaĝigis la naturon, ol la kapablo de kernfendado."[65]

Apogite sur tiu studaĵo Kahan kaj aliaj argumentas, ke mediprotektantoj „vendu" la klimatprotekton per tio, ke ili parolu pri riskoj por la nacia sekureco kaj pri respondoj kiel atomenergio kaj geoteĥniko („*geo-engeneering*") – teĥnologiaj intervenoj sur tutmonda nivelo, kiuj provas kontraŭagi la rapidan varmiĝon per tio, ke ili ekz-e blokas parton de la sunradiado aŭ „sterkas" la marojn, tiel ke ili povu ligi pli da $CO_2$, apud aliaj neprovitaj, eksterordinare riskaj projektoj. Ĉar

64 Kahan k.a., „The Second National Risk and Culture Study", p. 5 s.

65 Robert Jay Lifton kaj Richard Falk, *Indefensible Weapons: The Political and Psychological Case against Nuclearism* (Novjorko: Basic Books, 1982).

multaj dekstruloj perceptas la klimatŝanĝon kiel pordon tra kiu enrompiĝas la timataj reformoj malamikaj al la industrio, la solvo konsistas laŭ Kahan en tio, „forigi tion, kio faras ĝin minaca". Simile trumpetas Irina Feygina kaj John T. Jost, kiuj paralele al tio faris esplorojn ĉe la novjorka universitato. Ili konsilas al la politikaj decidantoj deklari mediprotekton kiel ion kio protektas „nian vivstilon" kaj kiel ian patriotismon, kaj karakterize nomas tiun projekton „ŝanĝo subtenata de la sistemo".[66]

Tiaj rekomendoj estas eksterordinare influaj. La *Breakthrough Institute* ekz-e estas pensfabriko, kiu specialiĝis al batalo kontraŭ la herbradiko-mediprotekta movado pro ĝia laŭdire mankanta „moderneco". La instituto ĉiam iras tiun mezan vojon kaj rekomendas atomcentralojn, frakciigitan tergason kaj genteĥnike ŝanĝitajn plantojn kiel solvojn por la klimato, dum ĝi atakas programojn por renovigeblaj energioj. Kaj kiel ni poste ankoraŭ vidos, eĉ kelkaj verduloj varmiĝas por geo-inĝenierado.[67] Krome, verdaj grupoj, por proksimiĝi al la kontraŭa flanko, ĉiam nove formulas la klimatprotekton, ĝis kiam iam tute ne plu temas pri malebligo de katastrofa Tervarmiĝo kaj protekto de la vivo sur la Tero. Anstataŭ tio, ĉio prioritatas, kio multe pli plaĉas al la konservativuloj, ekz-e forpreni la enspezojn al arabaj ŝtatoj kaj konservi la ekonomian dominadon de Usono super Ĉinujo.

La unua problemo ĉe tiu strategio estas, ke ĝi ne funkcias: Ĝi estas de dek jaroj la kerna mesaĝo de multaj grandaj verdaj grupoj en Usono („Forgesu la klimatŝanĝon", konsilas Jonathan Foley, direktoro de

66 Dan Kahan k.a.a, „The Tragedy of the Risk-Perception Commons: Culture Conflict, Rationality Conflict, and Climate Change", Cultural Cognition Project Working Paper No-89. 2011, p. 15 s, konsultebla ĉe http://sulturalcognition.net; Umari Irfan, „Report Finds 'Motivated Avoidance' Plays a Role in Climate Change Politics", *ClimateWire*, 2011-12-19; Irina Feygina, John T.Jost kaj Rachel E. Goldsmith, „System Justification, the Denial of Global Warming, and the Possibility of 'System-Sanctioned Change'", *Personality and Social Psychology Bulletin 36* (2010), p. 336.

67 Ted Nordhaus kaj Michael Schellengerger, „The Long Death of Environmentalism", Breakthrough Institute, 2011-02-25; Michael Schellenberger kaj Ted Nordhaus, „Evolve", *Orion*, septembro/oktobro 2011.

la mediinstituto ĉe la universitato Minnesota. „Ĉu vi amas Usonon?"[68] Kaj kiel ni vidis, la konservativa rezistado kontraŭ la klimatprotekto en tiu tempo nur akriĝis.

Sed vere maltrankviliga ĉe tiu metodo estas, ke ĝi ne kontraŭbatalas la torditajn valorojn, kiuj nutras la katastrof-neantojn same kiel ankaŭ la katastrof-kapitalismon, sed eĉ aktive subtenas ilin. Atomenergio kaj geo-teĥniko ne estas solvoj por la ekologia krizo; ili fortigas ĝuste tiun senrespondecan, mallongtempan pensadon, kiu ja nur kaŭzis tiun mizeron. Same kiel ni senkonsidere blovis forcejgasojn en la aeron, ni produktus per tiuj alte riskaj teĥnologioj ankoraŭ pli danĝerajn defalaĵojn, kaj ĉe neniu el ili videblas elira strategio (pri tio mi okupiĝos ankoraŭ poste). Troigita patriotismo estas ankaŭ aktiva malhelpo por atingi ian ajn tutmondan interkonsenton, ĉar ĝi ankoraŭ pli forte instigas la landojn agi unu kontraŭ la alia anstataŭ instigi ilin kunlabori. Kaj prezenti mediprotekton por konservi la konsumavidan usonan vivstilon – tio estas aŭ mensoga aŭ iluzia, ĉar vivstilo surbaze de la promeso de senfina kresko ne konserveblas kaj eĉ tute ne eksporteblas en ĉiun angulon de la Tero.

## La milito de la mondperceptoj

Ĉio ĉi kompreneble levas la demandon, ĉu mi ne kondutas tute same kiel la klimatneantoj – ĉu mi rifuzas penseblajn solvojn, ĉar ili minacas mian ideologian mondpercepton. Kiel komence menciite, mi jam de iom pli longa tempo estis profunde konsternita pro la sciencaj faktoj pri la Tervarmiĝo –, sed mi komencis pli forte engaĝiĝi por tiu temo nur kiam mi ekkonis, ke ili povas fariĝi katalizilo por formoj de socia kaj ekonomia justeco, pri kiuj mi ĉiukaze estis konvinkita.

Tamen per tio la komunecoj estas jam elĉerpitaj. Unue mi postulas de neniu, koncerne la sciencajn faktojn, konfidi mian vorton; anstataŭe mi opinias, ke ni ĉiuj konfidu la 97 elcentojn de la klimatesploristoj kaj iliajn sennombrajn artikolojn ekzamenitajn en la *Peer-Review*-procedo, same kiel la mondvastajn akademiojn de sciencoj kaj, por ne forgesi, la agnoskitajn instituciojn kiel la Mondan Bankon kaj

68 Scott Condon, „Expert: Win Climate Change Debate by Easing off Science", *Glenwood Springs Post Independent*, 2010-07-29.

la Internacian Energi-Agentejon, kiuj ĉiuj diras al ni, ke ni direktas nin al katastrofa mezuro de varmigo. Kaj mi ne asertas, ke la respondoj al la klimatŝanĝo, kiujn mi favoras, estas la sole ebla interpreto de la esplorrezultoj.

Mi diras nur, ke la esploro devigas nin *decidi* nin, kiel ni volas reagi. Se ni restas sur la nuna vojo, ni ricevos konzerne stiritajn, militismajn, grandteĥnologiajn respondojn al la klimatŝanĝo – mondon, en kiu ekzistas eta grupo de superriĉaj gajnantoj kaj tutaj armeoj da forlasitaj perduloj, tiajn kiajn ni konas el preskaŭ ĉiuj filmaj malutopioj pri nia estonteco, de *Mad Max*, *Children of Men*, *Die Tribüne von Panem* ĝis *Elysium*. Aŭ ni decidas sekvi la vekan vokon de la Tero, kiun la klimatŝanĝo laŭtigas, kaj ŝanĝi nian kurson, ĉirkaŭveli ne nur la klifon de la ellasoj, sed ŝanĝi la tutan pensmanieron, kiu kondukis nin ĝis tiu ĉi abismo. Ĉar la „moderaj fortoj”, kiuj konstante provas igi nin aprezi la klimatprotekton, en la realo celas tion: Kiel ni povas formi la ŝanĝon tiel, ke la respondeculoj pri la krizo ne sentu sin minacataj? Kiel ni povas certigi al la membroj de ektimigita, megalomania elito, ke ili daŭre estas la mastroj de la universo, spite al la premaj kontraŭpruvoj?

La respondo estas: Neniel. Sed oni tiras sufiĉe da homoj al sia flanko por ŝanĝi la fortrilaton kaj ataki la respondeculojn, en la konscio, ke veraj popolmovadoj ĉiam kovras la tutan politikan spektron de dekstre ĝis maldekstre. Kaj anstataŭ kurbiĝi por mildigi la adeptojn de mortiga ideologio, oni provas konscie fortigi tiujn valorojn, (en la ĉi tie cititaj studaĵoj pri kultura percepto nomataj „egalismaj” kaj „komunistaj”), kiujn nuntempe la naturleĝoj pli konfirmas ol refutas.

Kulturo estas io fluanta. Ĝi jam multajn fojojn ŝanĝiĝis kaj povas ree fari tion. La delegitoj en la *Heartland*-konferenco komprenas tion, kaj pro tio ili ja ankaŭ tiom strebas subpremi la monton da pruvoj, ke ilia mondpercepto estas minaco por la vivo sur nia planedo. Nia tasko estas, surbaze de ĝuste tiuj pruvoj, kredi je tio, ke fundamente alia mondpercepto povas esti nia savo.

La *Heartland*-uloj scias, kiom rapide kulturo povas ŝanĝiĝi, ĉar ili etas parto de movado, kiu lanĉis tian rapidan ŝanĝon. „Ekonomia politiko estas nur la metodo”, foje diris Margaret Thatcher, „nia celo konsistas en tio, ŝanĝi la korojn kaj animojn.” Ŝi grandparte plenumis

sian mision. Por nomi nur unu ekzemplon: Enketo de 1966 inter usonaj ekstudentoj rezultigis, ke nur 44 elcentoj de ili konsideris „tre grava" aŭ „esenca" gajni multe da mono. 2013 tiu nombro kreskis al 82 elcentoj.[69]

Estas klariga, ke la *American Geophysical Union* (AGU) jam en 1998, kiam ĝi konvokis al serio da interparoladoj por ekscii la opiniojn pri la Tervarmiĝo, resumis: „Multaj partoprenantoj en niaj interparoladoj estis konvinkitaj, ke la kaŭzo de mediaj problemoj (ekz-e media poluado kaj venena rubaĵo) estas larĝe disvastiĝinta etoso de senbrida memismo kaj avido, kaj ĉar ili konsideras tiun moralan degeneron neinversigebla, ili konsideras la mediproblemojn nesolveblaj."[70]

Kaj ĉiam pli da psiĥologiaj kaj sociologiaj esploraĵoj indikas, ke la partoprenantoj en la interparoladoj de la AGU opiniis tute ĝuste: Ekzistas rekta kaj deviga ligo inter la dominado de valoroj, kiuj estas ligitaj kun la venkado de la kapitalismo, kaj la ekzisto de pensoj kaj kondutoj malutilaj al la medio. Multaj studoj montris, ke personoj kun konservativaj aŭ „hierarĥiaj" opinioj kaj krome favoraj al la industrio

69 Ekzemplo de tio, kiel psiĥologoj, kiuj interesiĝas pri generaciaj diferencoj, analizis datumojn de la „American Freshman"-studaĵo ĉe la universitato de Kalifornio, Los-Anĝeleso, troviĝas ĉe Jean M. Twenge, Elise C. Freeman kaj W. Keith Campbell, „Generational Differences in Young Adult's Life Goals, Concern for Others, and Civic Orientation, 1966-2009", *Journal of Personality and Social Psychology* 102 (2012), p. 1045-1062. Aliaj kaŭzoj, ekz-e la kreskantaj kostoj de profesia klerigado (mem produkto de la novliberalismo) povus kunklarigi, kial la materiisma sinteno ŝanĝiĝis. La datumoj de la studaĵoj de 1966 kaj 2013 troviĝas en: Alexander W. Astin, Robert J.Panos kaj John A. Creager, „National Norms for Entering College Freshmen – Fall 1966", Ace Research Reports, vol. 2, n-ro 1, 1967, p. 21; Kevin Eagan k.a., „The American Freshman: National Norms Fall 2013", Cooperative Institutional Research Program at the Higher Education Research Institute, University of California, Los-Anĝeleso, 2013, p. 40. THATCHER-CITAĴO: Ronald Butt, „Mrs Thatcher: The Firs Two Years", *Sunday Times* (Londono), 1981-05-03.

70 John Immerwahr: „Waiting for a Signal: Public Attitudes toward Global Warming, the Environmet, and Geophysical Research", Public Agenda, American Geophysical Union, 1999-04-15, p. 4 s.

tre tendencas nei la klimatŝanĝon, sed ekzistas ankoraŭ pli da studaĵoj, laŭ kiuj imagoj de materiismaj valoroj (kaj eĉ la ideologio de la merkatfundamentismo) kondiĉas indiferenton al la klimatŝanĝo kaj al multaj kromaj mediaj riskoj. La psiĥologo Tim Kasser ĉe la *Knox College* en *Illinois* estas unu el la pioniroj sur tiu esplorkampo. „Ju pli gravaj homoj konsideras valorojn kaj celojn kiel efikeco, mono, potenco, statuso kaj imago[71], des pli negativa estas ilia sinteno al la medio, des malpli favore al la medio ili kondutas kaj des pli facile ili malŝparas naturajn resursojn", skribis Kasser kaj la brita medistrategiisto Tom Crompton en sia 2009 aperinta libro *Meeting Environmental Challenges: The Role of Human Identity*.[72]

Per aliaj vortoj, la kulturo, kiu venkis en nia epoko de la konzernoj, konkurencigas nin kontraŭ la naturo. Pro tio oni povus facile malesperi. Sed se ekzistas ia ekzistokialo por sociaj movadoj, tiam ĝi ne konsistas en akceptado de regantaj valoroj kiel firmaj kaj neŝanĝeblaj, sed en proponado de alternativaj vivkonceptoj – fari militon de la kulturaj mondperceptoj kaj venki en ĝi. Do, koncepti vizion de la mondo, kiu havas nenion komunan kun la hororbildo montrata en la *Heartland*-konferenco kaj en multaj aliaj sferoj de nia kulturo, vizion, kun kiu la plej multaj homoj mondvaste simpatias, ĉar ĝi estas vera: nome ke ni ne estas disaj de la naturo, sed parto de ĝi. Ke ne estas suspekta, komune strebi al pli alta valoro, kaj ke tiaj komunaj reciprokaj helpprojektoj estigis la plej grandiozajn atingojn de la homaro. Ke avido estas disciplinigenda kaj malsovaĝigenda per reguloj kaj per bona ekzemplo. Ke malriĉeco meze de superabundo estas io maldeca.

Tio signifas ankaŭ defendi tiujn sferojn de nia socio, kiuj jam

71 En la senco de „percepto, bildo, identeco, kiun aliuloj (kaj ankaŭ ĝi mem) havas pri la koncernata persono", en la psiĥologia angla: *image*. -vl

72 Yuko Heath kaj Robert Gifford, „Free-Market Ideology and Environmental Degradation: The Case of Belief in Global Climate Change", *Environment and Behavior* 38 (2006), p. 48-71; Tim Kasser, „Values and Ecological Sustainability: Recent Research and Policy Possibilities", en *The Coming Transformation: Values to Sustain Human and Natural Communities*, eld. de Stephen R. Kellert kaj James Gustave Speth, Yale School of Forestry & Environmental Studies, 2009, p. 180-204; Tim Crompton kaj Tim Kasser, *Meeting Environmentasl Challenges: The Role of Human Identity* (Surrey: WWF-UK, 2009), p. 10.

enkorpigas tiujn nekapitalismajn valorojn, ĉu temas pri minacata publika biblioteko, pri publika parko, pri studenta movado postulanta forigon de studkotizoj aŭ iniciato batalanta por la rajtoj de almigrintoj kaj engaĝiĝanta por homdigno kaj por malfermitaj landlimoj. Kaj antaŭ ĉio ĝi signifas ĉiam ree fari la ligojn inter tiuj ŝajne disaj bataloj. La politiko, kiu preferas malaltigi pensiojn, nutraĵatribuojn kaj sanprizorgon ol pli alte imposti riĉulojn, baziĝas sur la sama pensado kiel la decido per eksplodigo de la litosfero de la Tero elsuĉi eĉ la lastajn gasvaporaĵojn kaj la lastajn petrolgutojn anstataŭ transiri al renovigeblaj energioj.

Jam nun multaj estigas tiujn ligojn kaj trovas sennombrajn eblecojn esprimi tiujn alternativajn valorojn. Kaj tamen la starigo de forta klimatmovado okazas tro malrapide. Kial? Kial ni kiel specio ne prezentiĝas al tiu historia momento? Kial ni ĝis nun lasas neuzite pasi la „jardekon nulo"?

Estas tute komprenebla, kial dekstraj ideologiistoj neas la klimatŝanĝon – agnoski ĝin havus sekvojn por ilia pensado. Sed kio detenas tiom multajn kontraŭulojn al tiu ideologio postuli tiujn efikajn disponojn, kiujn la *Heartland*-uloj timas? Kial maldekstruloj kaj maldekstraj liberaluloj en la tuta mondo ne postulas ĉesigi la ekstremajn metodojn akiri krudmaterialon kaj ne engaĝiĝas por kompleta transiro al nova, daŭrema ekonomio? Kial la klimatŝanĝo ne staras en la centro de la progresema agendo, kial ĝi ne estas la sparko por postuli fortan, nove difinitan komunan havaĵon, kial ĝi tiom ofte restas marĝena noto? Kial maldekstre tendencaj komunikiloj ŝovas degelantajn glaciŝildojn daŭre en la „verdan" angulon – apud filmetojn el Interreto pri nekutimaj bestamikecoj? Kial multaj el ni ne faras tion, kio necesas por malebligi katastrofan amplekson de la varmigo?

La konciza respondo estas: La klimatneantoj gajnis – almenaŭ la unuan raŭndon. Ne la batalon kontraŭ la klimatesplorado – sur tiu batalkampo ilia influo jam svenas. Sed la klimatneantoj kaj ilia ideologia medio gajnis batalon, kiu determinas, kiuj valoroj regas nian socion. Ilia kredo estas, ke ni lasu nin gvidi de avido, kaj ke, por citi la mortintan ekonomikiston Milton Friedman, „la ĉefa eraro" konsistis en tio, „kredi, ke eblas fari ion bonan per la mono de aliuloj". Tiu vizio en la lastaj kvardek jaroj ĝisfunde ŝanĝis nian mondon kaj grave

malfortigis kontraŭajn fortojn.[73] Ekstrema merkatliberalismo estis ankrita per la akraj kondiĉoj, kiujn la Monda Banko kaj la Internacia Mon-Fonduso ligis kun urĝe bezonataj kreditoj. Ĝi formis la modelon de eksportorientita disvolvado, kiu starigis liberkomercajn zonojn en la evolulandoj. Ĝi estis ankrita en sennombraj komercaj traktatoj. Tute ne ĉiuj estis konvinkitaj de tiuj argumentoj, sed tro multaj silente akceptis la eldiron de Margaret Thatcher, ke alternativo ne ekzistas.

Intertempe la fifamigo de kolektiva agado kaj la diigo de strebado al profito enŝoviĝis en preskaŭ ĉiujn registarojn mondvaste, en ĉiun grandan komunikilan organizaĵon, ĉiun universitaton kaj eĉ niajn animojn. Kiel la studaĵo de la *American Geophysical Union* montris, ie en ni ĉiuj troviĝas la kredo je ilia centra mensogo – ke ni estas nenio alia ol egoismaj, avidaj maŝinoj, kiuj strebas nur al kontentigo de la propraj bezonoj. Kaj se ni estas tiaj, kian esperon ni tiam ankoraŭ havas por aliri la gigantan, ofte malfacilan kolektivan taskon kaj ĝustatempe savi nin mem? Tio estas sendube la plej malutila heredaĵo de la novliberalismo. La realigo de ĝia malluma vizio tiom izolis nin unu de la alia, ke ni intertempe ne nur kredas, ke ni ne kapablas konservi nin mem, sed ke ni eĉ ne *valoras* saviĝon.

Samtempe multaj el ni konscias, ke oni tenas al ni distordan spegulon kaj ke ni en la realo estas komplekso de kontraŭdiroj – nia deziro kontentigi niajn bezonojn pariĝas kun profunda kompato, nia avido kun empatio kaj solidareco. Kaj kiel Rebecca Solnit tiel konkrete montris en sia en 2009 aperinta libro *A Paradise Built in Hell*, ĝuste en humanecaj krizoj tiuj aliaj, neglektitaj valorj reaperas, kio montriĝas ne nur ĉe la nekredeble grandanima internacia helpo post grava tertremo aŭ cunamo, sed ankaŭ en tio, kiel la novjorkanoj post la teroratencoj de la 11-a de septembro sponte kuniĝis por reciproke sin konsoli. *Heartland* prave timas, ke la ekzistograva krizo de la klimatŝanĝiĝo posedas la povon mondvaste veki tiujn subprematajn valorojn kaj ebligi al ni amasan fuĝon el la malliberejo de ilia ideologio – konstruaĵo, kiu montras jam klarajn fendojn kaj fendegojn.[74]

73 Milton Friedman kaj Rose D.Friedman, Two Lucky People: Memoirs (Ĉikago: University of Chicago Press, 1998), p. 594.

74 Rebecca Solnit, A Paradise Built in Hell: The Extraordinary Communities That Arise in Disaster (Novjorko: Penguin Books, [2009] 2010).

Sed antaŭ ol tio povas okazi, ni devas pli forte okupiĝi pri tio, kiel precize la heredaĵo de la merkatfundamentismo kaj la kulturaj imagoj, sur kiuj ĝi baziĝas, daŭre blokas gravajn, vivosavajn disponojn de klimata protekto ĉe preskaŭ ĉiuj frontoj. La mantro de la media movado, ke ĉe la klimato ne temas pri dekstro aŭ maldekstro, sed pli „ĝusta aŭ malĝusta", ne progresigis nin. La tradicia politika maldekstro ne estas preta por ĉiuj respondoj al tiu krizo. Sed ne povas esti dubo pri tio, ke la nuntempa politika dekstro kaj la dominanta ideologio, kiun ĝi reprezentas, estas konsiderinda baro por la progreso.

Kiel la sekvaj kvar ĉapitroj montros, la vera kaŭzo de tio, kial ni ne prezentiĝas al la historia momento, estas ke la necesaj disponoj dubindigas nian ekonomian modelon (malreguligita kapitalismo kombinita kun ŝpardevigo por publikaj buĝetoj) ; kaj ne nur tio, ankaŭ niaj okcidentaj kulturaj imagoj (ke ni staras super la naturo kaj ke iliaj limoj ne validas por ni) kaj multaj aktivecoj kiuj formas nian identecon kaj karakterizas niajn komunumojn, estas elprovataj. Tiuj disponoj signifas krome la estingon de la plej riĉa kaj plej potenca industrio, kiu iam ajn ekzistis en la mondo: la petrol- kaj gas-industrio. Ĝi ne povas transvivi en sia nuna formo, se ni homoj ne volas ekstermi nin mem. Mallonge, ni ne reagis al tiu defio, ĉar ni estis katenitaj – politike, korpe kaj kulture. Nur kiam ni ekkonos niajn katenojn, ni havos la ŝancon liberigi nin el ili.